

EL POPOLA ĈINIO

中國報道

I 1982


V-19034/1982

Esperanto



Taj-oj


Fotoj de QU WEIBO



Bambuaj domoj

Taj-nacieco kun 760.000 membroj estas unu el la ĉinaj naci-minoritatoj kaj loĝas ĉefe en Yunnan-provinco, en la subtropika zono. La taj-aj vilaĝoj sin kaŝantaj en verdaj bambuoj kaj altaj kokosarboj troviĝas plejparte en ebenaj lokoj ĉirkaŭitaj de montoj kaj riveretoj. La taj-oj loĝas en duetaĝaj bambuaj domoj kvadrataj. La supra etaĝo estas ilia loĝejo kun koridoro kaj balkono, kaj la malsupra sen muroj estas uzata kiel stalo kaj tenejo. La taj-oj manĝas rizon kaj ŝatas pladojn kun acida kaj akra gustoj. La subtropika klimato estas favora al ilia produktado de legomoj kaj fruktoj. Iliaj vestoj havas nacian stilon. La viroj portas senkoluman ĉemizon kun mallongaj manikoj kaj longan pantalonon, kaj volvas la kapon per blanka aŭ nigra tuko. La virinoj portas ĉemizon kun striktaj manikoj aŭ ĉemizon sen kolumo kaj manikoj, kaj jupon tuboforman, ili ŝatas volvi la kapon per kolora tuko kaj ornami ĝin per kolora kombilo kaj freŝaj floroj. La Akvo-verŝa Festo estas la plej gaja tradicia festo de la taj-oj. En la festotagoj la taj-oj, ĉu viroj aŭ virinoj, ĉu junuloj aŭ maljunuloj, en festaj kostumoj verŝas akvon unu sur alian por esprimi bondezirojn, kaj krome ili ankaŭ okazigas konkurson de remado, prezentas kantojn kaj dancojn k.a.

Lulkanto



Ĉe puo



Sur vojo al foiro



Antaŭ budhista templo

Kuirado de rizo en bambutuboj





Taj-a virino lerta en teksado



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Zhao Shuang, gajninto de la unua loko en la 1981-jara

Internacia Leterskriba Konkurso por Geknaboj

SUR LA DORSKOVRILLO:

En Vespera Krepusko (Kolora lignogravuraĵo)

KOLORAJ SERIOJ:

Taj-oj

Pejzaĝoj de Shidu

Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj de E-istoj

Stufitaj viandbuloj

La historia mita baletto "Feniksoj Ekkantas sur la monto Qishan"

Antikvaj konstruaĵoj en Xi'an

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Kampanoj uzas sunenergian fornon

Shenzhen en konstruado

D-ro P. Neergaard en Ĉinio

Geoffrey Sutton — volontulo por EPC

Pupteatra aktorino Jin Qihua

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN)
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Enhavo

Novajara mesaĝo	2
La energia problemo de Ĉinio	3
La nigra oro de Ĉinio	5
Uzebla energio de la ĉina kamparo	8
<i>Korespondi Deziras</i>	11
<i>Nia Kultivejo:</i>	
La rolo de estetiko en lingvouzado	12
Lingvo kaj nacia sento	17
<i>Esp-Novaĵoj</i>	19
<i>Sur Nia Librobreto:</i>	
Moderna "Ŝlosilo"	20
Traduko originala	20
Sennacieca revuo por 1981	20
<i>Mia Vivo:</i>	
Mi volonte fariĝis teksistino	21
<i>Kurantaj Aferoj</i>	23,45
<i>Vidindaj Lokoj: Shidu</i>	24
<i>Ĉinaj Pladoj: Iom pri la ĉinaj pladoj</i>	25
Glaĉerologo Shi Yafeng	26
Esperiga luktomaniulo	29
"Feniksoj ekkantas sur la Monto Qishan"	30
Diligenta knabino	32
Unu tago de leterportistino	33
<i>5000 Jaroj de Ĉinio:</i>	
De la primitiva homaro al la klana socio	34
<i>En La Regionoj de Nacimalplimultoj:</i>	
Pri popolanoj ĉe Wuzhi-monto	37
Ŝanĝigo de la monda petrol-merkato en livero kaj mendo	40
<i>Amikeco</i>	42
<i>Tra la Mondo:</i>	
Baobaboj de Senegalio	44
Apra batalludo sur Nikobaraj Insuloj	44
Trafi la postajon per unu pafo	45
Saĝa respondo	48

NOUGARA MESAĜO

Ĉina proverbo diras: “Tempo forflugas kiel sago, tagoj forpasas kiel naveto.” Preter nia atento jam adiaŭis nin la jaro 1981 kaj alvenis la nova jaro 1982.

Ĝuste pro tio, ke la jaroj forglitas rapide kaj la homa vivo estas mallonga, ĉiu seriozulo retrorigardas al la pasinta jaro por kontroli ĉu li faris ion utilan aŭ vane pasigis la valorajn 12 monatojn. Kvankam EPC estas nur ordinara Esperanta revuo, tamen ni, ĝiaj redaktantoj, ofte admonas nin serioze labori kaj ofte ekzameni nian laboron.

Taksante nian laboron en 1981 ni povus diri, ke ni akiris ian sukceson. Kaj enhave kaj forme nia gazeto pliboniĝis iagrade kaj estis laŭdata de multaj legantoj. Ankaŭ la abonantaro kreskis. Sed ni ne kontentiĝis per tio. Ni bone scias, ke ni devas fari ankoraŭ multon por plibonigi nian revuon.

Antaŭ ĉio ni devas konfesi, ke en la rubriko “Nia Kultivejo” aperis tro malmulte da signifoplenaj artikoloj. Ni esperis, ke ni pli multe publikigos enhavoriĉajn artikolojn pri nia lingvo, nia movado kaj lingvaj problemoj. Tamen tio ne tute realiĝis. Ni esperas, ke plibonigo efektiviĝos tiuflanke en la nova jaro dank’ al niaj klopodoj. En tiu ĉi numero ni publikigas la artikolon de W. Auld “la Rolo de

Estetiko en Lingvouzado” kaj tiu de Zhang Qicheng pri lingva problemo. Ni esperas, ke tio estos nur la komenco de nia strebado. Komprenoble, ne sufiĉas nur niaj klopodoj, necesas ankaŭ subteno de lingvistoj kaj esperantistoj de diversaj landoj. Ni urĝe alvokas al niaj kolegoj: kontribuu al ni per viaj valoraj verkoj, “El Popola Ĉinio” estas ĉiam malfermita al vi.

Kaj plie, multaj legantoj deziras, ke ni aperigu pli mallongajn artikolojn. Por efektiviĝi tion ni ankoraŭ devas fari multon. Nun, ankaŭ la gazetaro en nia lando alvokas, laŭ la volo de siaj legantoj, ke la kontribuantoj skribu mallongajn artikolojn. Ni esperas, ke influate de tio pliboniĝas ankaŭ nia laboro. Cetero, multaj el niaj artikoloj estas plibonigendaj.

La rubriko “El Ĉina Moderna Historio” jam aperigis sian lastan artikolon en la 12-a n-ro de la pasinta jaro. De la kuranta jaro, en la rubriko “5000 Jaroj de Ĉinio” ni konigados novan serion de artikoloj pri la ĉina historio de jarmiloj. Ni strebos por konigi al vi nian antikvan landon per vivecaj kaj popularaj artikoloj, kaj esperas ke ili interesos vin.

Alia nova rubriko por la kuranta jaro estas “Mia Vivo”. Ni petos personojn el diversaj rondoj rekte prezenti al niaj legantoj

siajn profesiojn, ŝatokupon, ĉiutagan vivon kaj familion. . . Ni kredas, ke tio akcelos la interkompreniĝon inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj.


Laŭ propono de multaj legantoj, ni malfermas novan rubrikon “Ĉinaj Pladoj” por prezenti al niaj amikoj diverslandaj kurarton facile lerneblan por prepari ĉinajn pladojn el facile akireblaj materialoj.

Ĉinio estas lando kun multaj naciecoj. Por helpi vin koni la morojn de tiuj naciecoj, ni prezentos la kostumojn, manĝaĵojn, loĝejojn k.a. de iuj el ili en la koloraj bildpaĝoj.

Plejparto de niaj legantoj esprimis sian deziron, ke ni daŭre eldonu la gazeton laŭ la lastjara modelo, tial ĝenerale ni ne ŝanĝos la stilon kaj fizionomion.

Kiel antaŭe, en la lasta jaro multaj fervoraj fremdlandaj amikoj sendis al ni siajn artikolojn aŭ fotojn, kiuj riĉigis la enhavon de nia gazeto. Al ili ni esprimas nian koran dankon, kaj krome ni ankaŭ sincere esperas, ke ili daŭre donos al ni valorajn helpojn. Komprenoble, ĉiam bonvenaj por ni estas la subtenoj de novaj amikoj.

Multaj legantoj faris al ni proponojn kaj kritikojn, ekz. svisa sinjoro Hector Boffejon donis al ni sincerajn kritikojn pri nia lingvaĵo. Ni ĉiam opinias, ke



*La aŭtoro (la dua de dekstre)
inter karboministoj*

GAO YANGWEN*:

LA ENERGIA PROBLEMO DE ĈINIO

EN ĉiuj landoj de la mondo la problemo de energio altiras grandan atenton. Multaj ekonomie evoluintaj landoj ellaboras siajn politikojn pri energio cele al solvo de la alfrontata streĉiteco de energio pro la "nafto-krizo". Antaŭ nelonge, UNO okazigis konferencon pri novaj energispecoj. Tamen ĝi ne trovis plene kontentigan solvon de la energia problemo. Estas antaŭvideble, ke en sufiĉe longa periodo tiu problemo decide influos la ekonomian situacion de la mondo.

Ankaŭ en Ĉinio ĝi estas grava problemo multe atentata de la

tuta popolo en la konstruado por modernigo de niaj agrikulturo, industrio, nacidefendo, sciencoj kaj teknikoj. Tamen la ĉina energia problemo diferencas de tiu de la evoluintaj landoj. Nia lando havas riĉegan rezervon de energio: ni jam trovis per grund-esplorado 640 miliardojn da tunoj da karbo, niaj akvoj povas liveri 680 milionojn da kilovattoj da energio ĉiujare; kvankam la trovita nafta rezervokvanto aldonita en la pasintaj jaroj ne estas sufiĉe granda pro ne sufiĉa grundesploro, tamen esperigaj naftotenantaj strukturoj ja troviĝas en niaj kon-

tingentaj bretoj kaj interne de la lando. Per esploraj putoj ni jam trovis nafton kaj tergason en la Suda Ĉina Maro kaj Bohaimaro. Ni bezonos nur tempon por plene ekspluati tiujn riĉfontojn. Laŭ konsidero pri iom longa periodo, ne ekzistas por nia lando nesufiĉeco de energio. Plena ekspluato de la energiaj riĉfontoj sufiĉe kontentigos la bezonojn de energio por la kvar modernigoj dum longa periodo.

** La aŭtoro estas vicprezidanto de la Energia Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko kaj karboindustria ministro.*

kritikoj pli utilas al ni, ol laŭdoj. Refoje ni sincere petas vin, karaj legantoj, ke vi senkaŝe montru al ni la mankojn kaj erarojn en nia gazeto por ĝin perfektigi.

Niaj legantoj troviĝas en diversaj lokoj de la mondo, sekve

la publikigitaj materialoj en ĝi povas atingi vastan esperantistaron. Ni volantas fari EPĈ-on informilo por esperantistoj diverslokaj pri iliaj esp-aj aktivadoj. Estos vera ĝojo por ni, se Esperantaj organizoj ĝin utiligos.

Fine, ni esprimu novjaran gratulon al vi, niaj karaj amikoj, legantoj, perantoj kaj kontribuantoj. Ni deziras, ke vi vivu pli feliĉe kaj laboru pli fruktodone en la nova jaro!

— LA RED.

Koncerne petrolon kaj karbon ni ne bezonas importi kaj ni ne estos malfavore influataj de la ŝanĝiĝoj en la monda energia merkato.

Hodiaŭ ankaŭ en Ĉinio estas streĉiteco en provizado de energio, kio influas la rapidecon de disvolvado de la nacia ekonomio. Tio sendube estas rekta sekvo de la nemulda kresko de la produktokvanto de karbo kaj petrolo en la reguliga periodo; sed ankaŭ la terura malŝparo de energio en nia lando estas grava kaŭzo. La efike utiligata procento de varmoenergio en nia lando estas tre malgranda, kaj por produkto de samkvantaj produktaĵoj ni konsumas kvaronon aŭ eĉ trionon pli multe da varmoenergio, kompare kun la teknike avangardaj landoj. Ĝuste pro tio, nia energia politiko emfazas egale ekspluatadon kaj ŝparadon, kaj metas la lastan sur la unuan lokon por la proksima estonteco.

Enerĝiŝparado, kiel grava politiko de nia lando, celas ne nur redukti la konsumon de energio ŝparebla, sed pli grave reformi la strukturon de la industrio kaj produktaĵoj, kaj renovigi la teknologiojn kaj ekipaĵojn dum la klopodoj por ŝparo de energio. Oni povas diri, ke energiŝparado estas grava politiko kaj grava paŝo por la modernigo de nia industrio. Nun ni estas energie farantaj tiajn reformojn kaj renovigon kaj jam akiris certajn fruktojn. En la pasintaj du jaroj la kreska procento de la industria produktovaleo superis tiun de la primara energio. Tio estas ĝuste rezulto de nia ŝparado de energio.

Ankaŭ la konsisto de la energio diferencas de tiu de la progresintaj landoj. Ekde la kvin-

dekaj jaroj, tiuj landoj iom post iom prenis petrolon kaj tergason kiel la ĉefan energian fonton anstataŭ karbo, kaj karbo cedis sian unuan lokon. En la sepdekaj jaroj, impete altiĝis la prezo de petrolo kaj la ekonomio de tiuj landoj ricevis fortan baton. Ankaŭ iuj landoj de la tria mondo, kiuj uzas petrolon kiel la ĉefan energifonton, estis influitaj de tio. Koncerne al nia lando, kvankam ekde la sepdekaj jaroj iom post iom plimultiĝis la procento de uzata petrolo, sekve de kreskado de la produktokvanto de petrolo en Ĉinio, tamen nur 23 procentoj de nia primara energio fontas el petrolo kaj tergaso, dum 70 procentoj de ĝi fontas el karbo. Ĝuste pro tio, ni ne renkontas tiel grandan malfacilon en ŝanĝado de la konsisto de la energia fonto, kiel la evoluantaj landoj.

Kian disvolvan vojon nia energiprodukta industrio prenos en la estonteco? Antaŭ ĉio ni vigle ekspluatos la riĉfontojn de karbo kaj hidroelektro, kiuj estas grandaj kaj malmulte tuŝataj. Hidroelektro havas grandan avantaĝon, kaj en konsiderinde longa periodo estonta ni aktive konstruos grandan nombron da grandaj, mezaj kaj malgrandaj hidroelektroj por plimultiigi la procenton de hidroelektro en la konsisto de primaraj energifontoj. Tamen pro tio, ke la ĉinaj hidroelektraj riĉfontoj troviĝas ĉefe en sudokcidenta, nordokcidenta kaj centrasuda Ĉinio, kaj la konstruado bezonas longan tempon, Ĉinio devos preni karbon kiel la ĉefan energian fonton en la venontaj 20 jaroj, kaj la ekspluatado de karbo estos samtempe emfazata. Ĉar tiuj riĉfontoj pliparte troviĝas en norda Ĉinio, ni do devas konstrui pli multe da hidroelektroj

en la suda parto por kontentigi la bezonojn de la koncernaj regionoj.

Ni plifortigos la grundesplo-radon por trovi nafton kaj mal-kovri novajn rezervaĵojn en la malnovaj petrolkampoj. Samtempe ni faros aktivajn paŝojn por malfermi la naftajn trezorejojn sur la kontinentaj bretoj, por ke la produktokvanto de petrolo de nia lando multe kresku post kelk-jara stabiliĝo. Petrolo ne estos uzata kiel hejtajo, escepte de la uzado de veturiloj, traktoroj kaj industriaj branĉoj nepre bezonantaj petrolon kiel hejtajon. Do petrolo ne konsistigos multe pli da procentoj de la uzata energia fonto. Ni uzos petrolon ĉefe kiel krudan materialon por kemia industrio kaj pliigi la eksporton.

Ankaŭ nukleaj elektroj estas bonaj kaj nun tiu industria branĉo ankoraŭ ne ekzistas en nia lando. Ĉinio havas la fundamentajn kondiĉojn por konstruado de tiaj elektroj. Materialo kaj teknikaj fortoj estas pretaj por tio. Disvolvo de nukleo-elektra industrio ĉe ni estas grava paŝo por reguligi la nesimetrian dislokiĝon de energiaj fontoj en nia lando kaj por malstreĉigi la transportadon de karbo. En la estonteco ni disvolvos tiun industrian branĉon en regionoj, kie estas nesufiĉaj energiaj fontoj, (ekz. en suda Ĉinio) por ŝtopi la breĉon kaj akumuli sperton por pretigi bazon de kompleta nukleo-elektra industrio.

Ankaŭ nia vasta kamparo kun multego da loĝantoj konsumas grandan kvanton da energio, kaj la manko de hejtajoj en iuj regionoj sur ebenaĵoj malfaciligas la disvolvon de agrikulturo kaj

La nigra oro de Ĉinio

DISLOKIĜO DE KARBOREZERVEJOJ

Karbo, konata kiel nigra oro, estas la ĉefa fonto de energio por Ĉinio en ĝia konstruado por modernigo. En nia lando ne nur abunde, sed ankaŭ vaste, troviĝas karborezervejoj. Statistikoj montras, ke 640 miliardoj da tunoj da karbo estas trovitaj per prospektorado, kaj Ĉinio estas la tria lando en la tuta mondo laŭ riĉeco je karbo. Escepte de Shanghai (Ŝanhajo) kaj Tianjin (Tiangin), ĉiuj ĉinaj

provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, inkluzive de Taiwan (Tajvan), havas karbajn rezervejojn. 1,168 el la pli ol 2,000 gubernioj de Ĉinio jam konstruis karbominejojn.

67 procentoj de la totala kvanto de la jam trovita karbo en Ĉinio estas en norda Ĉinio, kaj triono de ĝi, t.e. pli ol 200 miliardoj da tunoj, troviĝas en Shanxi (Ŝanhi)-provinco. Tiu provinco ne nur havas abundegon da karbo, sed ankaŭ karbon kun granda kalorienteno kaj

malalta cindroprocento, taŭgan por diversaj uzoj. Pro tio ke la tiea formacia strukturo estas nekomplika kaj la karbotavoloj troviĝas ne tiel profunde sub la tersurfaco, oni povas ekspluati la karbotrezorejojn per malferma minejo aŭ oblikva ŝakto. Tie troviĝas famaj karbominejoj, kiaj tiuj de Datong, Yangquan kaj Xishan, kiuj estas ĉe trunkaj fervojoj oportunaj por elporti la elfositan karbon al aliaj lokoj. Tial Shanxi-provinco fariĝos la plej granda karboindustria bazo de Ĉinio.

la vivon de kamparanoj. En la vastega teritorio de nia lando prezentiĝas tre variaj kondiĉoj de energio kaj por solvi la energian problemon de la kamparo ni alprenas diversajn konvenajn rimedojn. En regionoj kun varma klimato, ni aktive disvolvas produktadon de metano. Ĝis nun milionoj da metanaj basenoj jam estas konstruitaj tra la tuta Ĉinio. Disvolvo de tiu energia fonto povas multe pli bone utiligi plantomaterion kiel tigoj, herboj ktp. kaj ne nur solvi la problemon de hejtajomanko, sed ankaŭ fari la vilaĝojn pli puraj. En lokoj, kie estas karborezervo entera, malgrandaj karbominejoj de komunumoj kaj produktaj brigadoj devas esti aktive disvolvataj. Nun jam troviĝas 18,000 tiaj minejoj kun totala produktokvanto super cent milionoj da

tunoj. Tiuj malgrandaj entreprenoj ludas gravan rolon en livero de hejtajo al la kamparanoj kaj lokaj industriaj entreprenoj. En lokoj, kie estas riĉaj fontoj de akvoforto, oni aktive konstruas malgrandajn hidroelektrejojn. Hodiaŭ tiaj hidroelektrejoj kun kapacito de malpli ol 500 kilovattoj jam povas ĉiujare produkti 3.7 milionojn da kilovattoj da elektro kaj ludas gravan rolon en solvo de la energia problemo en la kamparo. La kamparanoj rigardas ilin kiel trezoraĵon. Krome ni ankaŭ kuraĝigas kulturadon de arbaroj por hejtligno kaj lignokarbo. Kamparanoj ricevis certan areon da kampo aŭ monto por privata uzo kaj povas kulturi arbojn sur ili kaj ankaŭ sur dezertaj montoj aŭ ambaŭflanke de vojoj aŭ ĉe kamprandoj, ĉirkaŭ domoj kaj aliaj utiligeblaj lokoj, por

akiri hejtajon. La utiligo de malgrandaj energiaj fontoj, kiel metanbasenoj kaj hidroelektrajetoj, jam vekis vastan intereson ĉe landoj de la tria mondo.

Ĉinio havas ankaŭ riĉajn fontojn de terovarmo, vento kaj tajdo. En iuj regionoj troviĝas favoraj kondiĉoj por utiligo de suna energio. Nun plifortigata estas la esplorado de tiuj energiaj fontoj por iom post iom plivastigi la eksperimentadon kaj praktikan uzadon.

Gravan aspekton de la ĉina energiopolitiko prezentas tio, ke nia energioindustrio estas malfermita al fremdaj landoj. Ĉu en produkto de petrolo, karbo kaj hidroelekto aŭ en utiligo de malgrandaj kaj novaj energiaj fontoj, ni bonvenigas diversformajn kunlaborojn kun eksterlandaj amikoj.

En la orienta parto de la Interna Mongolio abundas bruna karbo malprofunde sub la tersurfaco, facile ekspluatabla per malferma minejo. Ĉe Huolin-rivero sur Horqin-stepo konstruiĝos unu el la plej grandaj malfermaj karbominejoj de Ĉinio. Nun oni tie konstruas specialajn elektrejojn, aŭtoriparejon, fabrikojn de betonaĵoj, brikoj, tegoloj kaj lignaĵoj kaj preparejon de gruzoj. Grandaj ŝovelmaŝinoj, buldozoj, ŝarĝaŭtoj kaj gruoj importitaj el FR Germanio kaj Usono jam komencis labori tie.

PRODUKTADO DE KARBO

En la suda parto de Ĉinio troviĝas malpli multe da karbo-rezervo ol en la norda parto, kaj krome, la tiea geologia strukturo estas relative komplika. Ĝenerale konvenas tie mezaj aŭ malgrandaj karbominejoj por kontentigi lokajn bezonojn.

Post la fondiĝo de la Popola Respubliko, nia karboindustrio faris grandajn paŝojn antaŭen. En la lastaj jaroj la jara produktokvanto de karbo en Ĉinio superis 600 milionojn da tunoj kaj okupas la trian lokon en la mondo, nur post tiuj de Sovetunio kaj Usono.

Nun en nia lando funkcias pli ol 2,000 ŝtataj karbominejoj kun pli ol 4 milionoj da laboristoj kaj oficistoj. Inter ili 580 produktas laŭ la ŝtata distribua plano kaj produktis en 1980 344 milionojn da tunoj da karbo.

Nun en Ĉinio troviĝas dek karbominejaj administracioj, ĉiu kun produktokvanto de pli ol dek milionoj da tunoj en ĉiu jaro. Inter ili estas tiu de la Datong-aj karbominejoj, kies jara produktokvanto estas la plej alta en la tuta lando. En 1980 ĝi produktis 24.5 milionojn da tunoj da karbo. La kvalito de ĝia produktaĵo estas tre bona

kaj la elfosita karbo povas esti rekte uzata kiel bona hejtaĵo sen purigado kaj elektado. Nekomplikaj estas la tieaj geologia strukturo kaj hidrogeologiaj kondiĉoj kaj karbofosaj maŝinoj estas oportune aplikeblaj en la minejoj. La Karbomineja Administracio de Yangquan, je 200 kilometroj sude de tiuj minejoj, estas la plej granda bazo de antracito en Ĉinio. En 1980 ĝi produktis 12 milionojn da tunoj da karbo.

La Kailuan-a Karbomineja Administracio, je 300 kilometroj oriente de Beijing (Pekino), fondiĝis antaŭ pli ol cent jaroj; ĝi estas unu el la plej fruaj karbominejoj por industrio en nia lando. Ĝi produktas ĉefe karbon por koakso. En la sepdekaj jaroj ĝia jara produktokvanto atingis 25 milionojn da tunoj. Ĝiaj minejoj estis terure detruitaj de la tertremo en 1976 kaj post energia rekonstruado ĝi produktis 19 milionojn da tunoj da karbo en 1980.


La Xuzhou-a Karbomineja Administracio estas grava karboprodukta entrepreno de orienta Ĉinio. Ĝi troviĝas ĉe la kruciĝo de la trunkaj fervojoj Lanzhou-Haizhou kaj Tianjin-Pukou, kiuj interligas la orientan, okcidentan, nordan kaj sudan partojn de Ĉinio. En la jaro 1981 la 13 karbominejoj sub tiu administracio produktis 12.56 milionojn da tunoj da karbo, ĉefe gaskarbo.

La karbomineja distrikto de Huaibei en orienta Ĉinio kaj la Karbomineja Administracio de Pingdingshan en la centra parto de Henan-provinco ambaŭ estis starigitaj post la fondo de la Popola Respubliko en 1949. La antaŭa kun 11 ŝaktoj produktis

La Subĉiela Karbominejo Huolinhe en konstruado



pli ol 13 milionojn da tunoj da karbo en 1980, ĉefe gaskarbo, koakso kaj malgrasa karbo. Por kontentigi la bezonon de karbo en disvolvado de industrio de Shanghai kaj orienta Ĉinio, nun estas farata grandskala konstruado de novaj ŝaktoj kaj ilia totala kapacito estas 13.5 milionoj da tunoj. La ekspluatata areo de la ŝaktoj sub la Karbomineja Administracio de Pingdingshan estas 550 kvadrataj kilometroj, kun la totala produktopovo de 12.86 milionoj da tunoj. Ĝi produktis 13.65 milionojn da tunoj da karbo en la jaro 1980.



Nova meĥanizita doko de la haveno Qingdao speciala por karbotransportado

Kaj la Jixi-a Karbomineja Administracio en la orienta parto de Heilongjiang-provinco, kun areo de pli ol 3,000 kvadrataj kilometroj, produktis 12.7 milionojn da tunoj da karbo en 1980. Ĝi produktas ĉefe koakson kaj gaskarbon. La Karbomineja Administracio de Hegang en la nordorienta parto de la sama provinco produktis 10.14 milionojn da tunoj da karbo, ĉefe gaskarbo. La produktaĵoj de tiuj du minejoj estas uzataj ĉefe por kontentigi la bezonon de la industrio en nordorienta Ĉinio.

En la nuna periodo de reguligo de la nacia ekonomio, la ŝtata registaro postulis, ke la industria branĉo de karbo klopodu energie por stabiligi kaj levi sian produktadon, ekde 1981, per novaj ŝaktoj kun totala produktopovo de dek milionoj da tunoj. En 1980 konstruiĝis kaj ekfunkciis 21 novaj ŝaktoj kun kapacito de sep milionoj da tunoj. En 1981, 58 ŝaktoj kun kapacito de pli ol 75 milionoj da tunoj estas en konstruado. Inter ili la modernaj karbominaj ŝaktoj meĥanizitaj

kaj projektitaj de ĉinaj teknikistoj en Xinglongzhuang de Yanzhou en Shandong-provinco, jam finkonstruiĝis kaj komencis produkti.

La ĉina karbo estas uzata ĉefe por kontentigi enlandan bezonon, kaj krome ankaŭ eksportata ĉiujare al Koreio, Japanio, Rumanio, Bangladeŝo, FR Germanio, Nederlando, Francio, Danlando, Italio kaj Belgio. La porkoaksa karbo de Kailuan kaj Zaozhuang, la pormovforta karbo de Datong kaj Huaibei kaj la antracito de Yangquan estas transportataj al Japanio per la havenoj de Qinhuangdao kaj Lianyungang. La karbopecoj kun diametro de 20 ĝis 60 milimetroj, produktitaj de Tanjing de la Aŭtonoma Regiono de Ningxia (Ninghia), estas tre varme akceptataj de la eŭropa merkato pro sia granda kalorienteno, senfumeo kaj malalta procento de cindro kaj sulfuro, kio estas kvalito tre bona por hejtado de kameno.

PLANO POR DISVOLVO DE LA KARBOINDUSTRIO

Plano por disvolvo de la karboindustrio en la estonteco estas nun ellaborata laŭ la ŝtata politiko por disvolvado de energiaj fontoj, kiu celas kontentigi la bezonojn en la moderniga konstruado de Ĉinio.

Laŭ la energibezono de ĉiuj regionoj, la geologiaj kaj trafikaj kondiĉoj kaj la efiko de investado, la plano prenos Shanxi-provincon, orientan Ĉinion, nordorientan Ĉinion (inkluzive de la Interna Mongolio) kaj Henan-provincon kiel la kvar ĉefajn regionojn de konstruado. Orienta Ĉinio estas la plej evoluinta ekonomia regiono de nia lando, sed ĝi longe suferis de manko de karbo. Efektive, tiu regiono tamen havas sufiĉe abundan rezervon de karbo sub la tero. La rezerva kvanto de karbo en Huainan, Huaibei, Yanzhou kaj Xuzhou superis 40 miliardojn da tunoj. Kvankam estas iom malfacile kons-

Uzebla energio de la ĉina kamparo

EN la vasta ĉina kamparo oni aktive utiligas energion de la suno, vento, metano kaj termofontoj kaj plantas arbojn por lignokarbo por solvi la problemon de energio en la konstruado de moderniga kamparo.

MALGRANDAJ HIDRO- ELEKTREJOJ

En la pasintaj jaroj ĉiam pli multe da terkulturaj maŝinoj kaj elektro estas bezonataj en la kamparo por produktado kaj

vivo. De la jaro 1958 konstruiĝis sume en la tuta lando pli ol 90,000 malgrandaj hidroelektraj kun totala generatora kapacito de pli ol 6,800,000 kilovattoj, kiuj estas trioblo de tiuj de ĉiuj elektroproduktaj ekipaĵoj en la tuta lando komence de la Liberiĝo.

Por bone funkciigi malgrandajn hidroelektrajn en la kamparo la ĉina registaro helpas lokajn instancojn, popolajn komunumojn kaj produktajn brigadojn per mono kaj ekipaĵoj.

Ĉiujare ĝi subvencias por tio 200-300 milionojn da juanoj, kaj krome ankaŭ pruntedonas centmilionojn da juanoj. Nun escepte de Shanghai (Ŝanhajo), Tianjin (Tiangin) kaj Taiwan (Tajvan) ĉiuj aliaj 27 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la tuta lando havas malgrandajn elektrajn, kiuj formas elektran reton en multaj lokoj. Elektro uzata de industrio, terkulturo kaj popola vivo en 720 gubernioj estas liverita de malgrandaj hidroelektraj.



trui ŝaktojn en tiuj lokoj pro trodikeco de la sedimenta formacio, tamen la kvalito de tiea karbo estas bona kaj nun ni jam mastras novan teknikon de ŝakto konstruado per frostigo kaj gigantaj boriloj. Kaj krome, tiuj minejoj proksimas al maraj havenoj kaj fervojoj kaj ĝuas trafikajn oportunaĵojn. En la estonteco oni energie disvolvos la ekspluatadon de tiuj minejoj.

La Nordoriento estas bazo de ĉina peza industrio kaj bezonas grandan kvanton da karbo. Tial, tiu regiono estas rigardata kiel ĉefa konstrua punkto de la karboindustrio por longa periodo. Ekde nun ni emfazos la ekspluatadon de la karbo rezervoj en Liaoning, Heilongjiang kaj la Interna Mongolio.

En la centra kaj okcidenta partoj de Henan-provinco abundas karbo subtera. Per karbo el tieaj karbokampoj oni povas ne nur provizi helpe Hebei-provincon, sed ankaŭ kontentigi la bezonon de eksporto.

Krom tiuj kvar ĉefaj regionoj, ni ekspluatos paŝon post paŝo ankaŭ la karbokampojn de la provincoj Guizhou (Gujōu) kaj Shaanxi (Ŝenhi) kaj la Aŭtonoma Regiono de Ningxia por plenumi la kreskantajn bezonojn.

Kun disvolvo de la karboindustrio, oni devas solvi ankaŭ la problemon de transportado. La ŝtato faros konformajn rebonigojn de la fervojoj. Nun la transporta kapablo por karbo en Shanxi jam atingis 70 milionojn

da tunoj en ĉiu jaro. En la estonteco ni konstruos novajn trunkajn kaj specialajn branĉajn fervojojn por altigi la kapablon de transportado de karbo en tiu provinco. Kaj por grandigi la eksportan kvanton de karbo ankorejoj por 50,000-tonelaj ŝipoj estas konstruataj ĉe la haveno de Qinhuangdao. Krome oni ankaŭ konstruos ankorejojn por 100,000-tonelaj ŝipoj ĉe la haveno de Shijiusuo. Tiuj konstruadoj estos finitaj en 1985. La totala ŝarĝa kapablo de la havenoj de Qinhuangdao, Lianyungang, Qingdao, Dalian, Zhanjiang kaj Shijiusuo ĉiujare atingos 50 ĝis 60 milionojn da tunoj. Kaj tiam multe pligrandiĝos la eksporta kvanto de karbo.

Tiuj elektrejoj ne nur havigis malmultekostan movforton por irigaciado, prilaborado de terkulturaj, brutobredaj kaj neĉefaj produktaĵoj, kaj la industrioj, kiujn funkciigas komunumoj kaj brigadoj, sed ankaŭ akumulis por ili kapitalon. La jara produktovaloro de industrio kaj terkulturo en 162 gubernioj de Ĉinio, kiuj havas malgrandajn elektrejojn kun kapacito de pli ol 10,000 kilovattoj, atingis 30-40 milionojn da juanoj. Iuj eĉ atingis cent milionojn da juanoj.

Vasta perspektivo prezentigas en ekspluato kaj utiligo de akvoenergio kaj konstruado de hidroelektrejoj en la ĉina kamparo. Nun la akvoenergio de Ĉinio sufiĉas por konstrui elektrejojn kun generatora kapacito de 150 milionoj da kilovattoj kaj duono de ĝi estas utiligebla, sed nun nur 10% de ĝi estas utiligataj. La ĉina registaro planas helpi lokajn instancojn konstrui malgrandajn hidroelektrejojn kun generatora kapacito de 2.9 milionoj da kilovattoj antaŭ 1985.

METANO

Krom malgrandaj hidroelektrejoj, la uzado de metano en la ĉina kamparo rapide disvolviĝas. Oni povas diri, ke en la mondo metanon plej multe uzas Ĉinio. Nun konstruiĝis jam pli ol 7 milionoj da metanbasenoj por familia uzo, ĉiu kun volumeno de 8-10 kubmetroj, kiuj povas provizi 30 milionojn da kamparanoj per metano por ilia kuirado kaj lumigado.

Ankaŭ popolaj komunumoj kaj produktaj brigadoj konstruis pli ol 36,000 kompare grandajn metanbasenojn por funkciigi dizelojn, produkti elektron, pumpi akvon, irigacii kampojn, mueli

grenon, dispecigi furaĝon kaj sekigi terkulturajn kaj aliajn produktaĵojn per metano. Nun stariĝis nombro da esploraj institutoj de metano, kaj ankaŭ multaj altlernejoj kaj sciencaj institutoj esploras metanutiligon.

Ni opinias, ke produktado de metano el organikaĵo havas grandan perspektivon. Se oni en la kamparo uzas duonon de la homa kaj bruta fekaĵo kaj plantaj tigoj por produkti metanon, oni povas akiri ĉiujare 68.3 miliardojn da kubmetroj da metano, inter kiuj 62.3 miliar-

doj da kubmetroj jam sufiĉas por kontentigi la vivbezonojn de 800 milionoj da kamparanoj. Per la superfluaĵoj 6 miliardoj da kubmetroj da metano oni povas funkciigi 890,000 12-ĉevalpovajn staciojn ĉiutage ses horojn, aŭ produkti ĉiujare naŭ miliardojn da kilovattoroj da elektro. Antaŭ la jaro 1985 la ŝtato planas plie starigi kvin milionojn da metanbasenoj por familia uzo.

MALGRANDAJ KARBOMINEJOJ

Krom la ŝtataj grandaj kaj mezgrandaj karbominejoj, ko-



Ventoenergia generatoro kun kapacito de 20 kilovattoj, fabrikita de la Meĥanika Instituto de Heilongjiang-provinco

munumoj kaj brigadoj en la ĉina kamparo funkciigis pli ol 1,800 malgrandajn karbominejojn, kiuj multe helpas fabrikojn, minejojn kaj entreprenojn funkciigitajn de gubernioj kaj komunumoj. Ili ne nur malpezigis la ŝarĝon de la ŝtato en provizo de karbo, sed ankaŭ pligrandigis la enspezon de komunumoj kaj brigadoj.

ARBARO POR LIGNOKARBO

La praktiko en multaj lokoj pruvis, ke disvolvo de arbaro por lignokarbo estas efika rimedo por solvi la problemon de brulaĵo en la kamparo. En Yanling-gubernio, Henan-provinco, oni plantis sablajn salikojn (*Salix cheilophila* Schneid) kaj karaganojn (*Caragana Korshinskii*) ambaŭflanke de vojoj kaj apud kanaloj, vilaĝoj kaj domoj, kaj per tio solvis post kvin aŭ ses jaroj la malfacilon de la kamparanoj akiri brulaĵon. Antaŭe grave mankis brulligno al la gubernio Shule en Xinjiang, kaj pro tio unu homo por familio kun kvin membroj devis

tutjare kolekti brullignon. De la jaro 1973 la loka registaro mobilizis komunumanojn por planti arbojn en sabla kaj salalkala tero. Nun ĉiu familio en la gubernio havas meznombre 1.6 muojn da arbaro (1 muo = 1/15 hektaro). Tio ne nur havigis al la kamparanoj brullignon kaj al brutoj furaĝon, sed ankaŭ reformis la salalkalan teron.

Ĉinio havas tre favorajn kondiĉojn por disvolvi forstokulturadon por lignokarbo. Nun en la tuta lando troviĝas miliardo da muoj da arbarigebla virga tero. Se oni kulturos arbaron por lignokarbo sur 150-200 milionoj da muoj da virga tero, oni povos, post dek jaroj, kontentigi la bezonon de brulligno por ĉirkaŭ 300 milionoj da kamparanoj. Oni jam kulturis multspecajn arbojn kaj arbedojn rapide kreskantajn kaj adaptiĝemajn. En norda Ĉinio kaj sablaj regionoj oni plantas karaganon, tamarikon (*Tamarix ramosissima*) kaj sekecan salikon (*Salix matsudana* Koidz), ĉar ĉiun trian ĝis kvinan jaron


oni povas haki ilin. En suda Ĉinio oni plantas koriarion (*Coriaria*), hibiskon (*Hibiscus synriacus*) kaj aliajn arbedojn por brulaĵo. Unuvorte la arbaroj por lignokarbo ne nur povas liveri brullignon por la kamparanoj, sed ankaŭ povas konservi teron kaj akvon kaj teni ekologian stabilecon.

SUNENERGIO

En la nordokcidenta parto de Ĉinio kaj Qinghai-Tibeta Altebenaĵo sunenergio estas riĉa. Tie oni ĉiujare havas 2,800-3,000 horojn da sunlumo kaj la sunradia varmo sur ĉiu kvadrata metro donas 1.4-1.6 milionojn da grandaj kalorioj. Nun en la ĉina kamparo oni uzas sunenerĝion en sekigo de terkulturaj kaj neĉefaj produktaĵoj, kulturo de plantidoj, varmigo de staloj kaj domoj, kuirado ktp.

En la aplikado plej antaŭe iras Beijing (Pekino), Hubei, Liaoning, Henan, Shaanxi kaj Gansu. Nun pli ol duono de la provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio eksperimentas pri uzo de sunenerĝio por sekigi grenon kaj aliajn kamparajn produktaĵojn. La grentenejo de Xingtai-subprovinco en Hebei-provinco kaj la Beijing-a Instituto de Agrikultura Mekanikigo kune elfaris la plej grandan sunenerĝian maŝinon por sekigi grenon. Ĝi povas sekigi 20-25 tunojn da greno en ok horoj kaj ankaŭ mortigi fiinsektojn. En la Interna Mongolio kaj Jilin oni uzas sunenerĝion por enstali brutojn. Unue oni transformas sunenerĝion en elektron kaj poste enkondukas ĝin al palisaro de stalo. Kiam brutoj tuŝas palisajn dratojn, ili tuj sin turnas frapetite de elektro. Dank' al uzo de sunenerĝio

Kamparanoj de Hai'an-gubernio, Jiangsu-provinco, uzas sunenerĝiajn fornojn por kuirado.





Kampanoj de Mianyang, Sichuan-provinco, uzas metanon por rizo-senŝeligo.

oni povas ŝpari materialojn kaj monon.

Laŭ nekompleta statistiko, en la ĉina kamparo funkcias pli ol 2,000 sunenergiaj kuiriloj, kaj la radiokolekta areo por akvohejtado jam atingis 70,000 kvadratajn metrojn.

VENTO, TERMOFONTO KAJ FLUSO


En la ĉina kamparo oni jam komencis uzi venton, termofonton kaj fluson por produkti elektron.

Tre riĉa estas la ventoenergio en la regionoj ĉe marbordo, paŝtejoj, altebenaĵoj kaj montopasejoj. Laŭ la dislokiĝo de ventoenergio kaj nunaj teknikaj kondiĉoj Ĉinio fabrikis en la lastaj jaroj ĉefe malgrandajn ventoenergiajn generatorojn malkarajn kun simpla strukturo. Inter ili la plej granda, en Sidui-insulo de Zhejiang-provinco, havas generatoran kapaciton de 18 kilovattoj kaj funkciis jam pli ol 3,000 horojn. En la Interna Mongolio oni instalas pli ol 200 ventoenergiajn generato-

rojn, ĉiu kun 100-250 vattoj, kiuj liveras elektron al tieaj paŝtistoj por lumigado, filmprojekciado kaj brutobredado.

Nun Ĉinio havas pli ol 3,000 termofontojn, kiuj troviĝas en Beijing, Tianjin, sudorienta marbordo, Yunnan kaj Tibeto. La ĉinaj termofontoj estas varmetaj aŭ malalttemperaturaj kaj taŭgaj por uzo en agrikulturo. Nun oni studas pri kulturado de plantidoj, legomoj, fruktaroj kaj floroj en forcejoj, printempa semado kaj irigaciado per varmakvo, kulturo de akvaj plantaĵoj, bredado de fiŝoj kaj salikokoj, elovigo de dombirdoj, sekigo de kamparaj produktaĵoj, hejtado kaj elektroproduktado.

En la jaro 1958 Ĉinio ekprovis produkti elektron utiligante fluson. Nun funkcias en Ĉinio pluraj tiaj elektrejoj, inter kiuj estas Rushan-elektrejo en Shandong-provinco kun generatora kapacito de 300 kilovattoj, Xiaoheshan-elektrejo kun generatora kapacito de 200 kilovattoj kaj Xiangshan-elektrejo. Ili multe helpas lokan terkulturon kaj fiŝkaptadon.



* Kadre de Lika Biblioteko ni fondis Esp-an Sekcion. Ni bezonas diversspecajn materialojn — libroj, gazetoj, broŝuroj ktp. Ĉiuj donaculoj ricevos dank-respondon, sendu al: Polski Związek Esperantystów, Biblioteka Sekcio, PL-67-400 Wsxhowa, Str. Swierczewskiego 1, Pollando.

* Acuŝi Hoŝida, dez kor. kun gesanoj loĝantaj en la urboj Chengde k. Zhangjiakou en Hebei-provinco de Ĉinio, Itoi, 393-83, Tomakomai, 053 Japanio.

* Mi deziras korespondi, amikiĝi, kun unu s-anino (eble parolanta ankaŭ italan...), libera, moderna, bonaspekta, mezaĝa, kiu ŝatus ekzerci jogo-arton, sporton, krei harmonian, esperantan familion. Obligata fotografio (laŭeble en la naĝkostumo). Respondo garantiita. Adreso: Tomislav Plackovic, Uskočka 26/VII, 52000 pula, Jugoslavio.

* Irana esperantisto deziras korespondi tutmonde pri ĉiu temo, precipe pri muziko. Alireza Kargarpur, 20-j. fraŭlo, P.O. Box 431, Karaj, Iran. (kun lia foto)

* Vekas M. Rodica, 36-j. instruistino, dez. kun infanoj tutmondaj pri ĉiu temo, 2825, Or, Sebis, B-Dul Victoriei No. 2/a, Jud. Arad, Rumanio.

* Juan Carlos Nuno Casion, 18-j. lernanto, strato Lapuyade 39-41, Zaragozo 7, Hispanio, dez. kor. tutmonde.

* S-ro Kusuda Zensuke, emerita oficisto de privata fervojo, dez. kor. kun ĉinoj, Amagasaki/660, Kandidadori 7-195, Japanio.

* Wladyslaw Stasiow, 43-j. Skrytka Pocztowa 518, 30-960 Krakow, Polska-Pollando, vol. kor. tutmonde, interesiĝas pri interŝanĝo de p.m., moneroj, banknotoj, gramofondiskoj.

* Mi estas 17-jara studento pri arto. Mi deziras interkorespondi. J. A. Hierro Plz. Xaho, 1, 5 A/Leiola -Vizczya Hispanujo.



LA ROLO DE ESTETIKO EN LINGVOUZADO

de WILLIAM AULD*

Kiam temas pri lingvokono oni povas distingi diversajn gradojn de posedo. Por miaj nunaj celoj sufiĉas distingi tri: la ĉiutagan, la klarigan, la artan.

Ĉiutaga lingvaĵo estas tiu, kiun oni uzas por ordinara babilado; kutime ĝi estas supraĵa kaj senkolora, uzanta vortprovizon relative malgrandan, en kiu ripetiĝas senfantazie ĉiam la samaj parolturnoj. Ĝi uzas abunde kliŝojn; novaj esprimoj rapide kliŝiĝas pro trouzado. Laŭ sia karaktero ĝi estas relative malpreciza, sed la komunumo sukcesas subkompreni multon ne rekte esprimitan. La efektiva grado de subtileco, kompreneble, varias de individuo al individuo; sed kun tre maloftaj esceptoj ĝi restas tre baza kaj malsubtila komunikilo.

Klariga lingvaĵo estas tiu, kiun uzas ekzemple sciencistoj kaj instruistoj por komprenigi kiel eble plej klare kaj nemiskompreneble iun teorion aŭ faktaron. Ĝi ofte postulas specialan vortprovizon (= jarĝonon) aparte lernendan, por ke la grado de konkreta ekzaktecio aŭ precizeco en la esprimado de konceptoj estu kiel eble plej alta.

Kutime tiu lingvaĵo do estas ekzakta, pragmatika kaj senkolora.

Arta lingvaĵo estas tiu, kiu esploras kaj ekspluatas la latentajn esprimivojn de la koncerna lingvo. Ĝin uzas ekzemple verkistoj, poetoj kaj advokatoj. Ĝi celas esti plejeble subtila, kolorplena kaj freŝa; kliŝon ĝi klopodas eviti (kvankam ne malofte ĝiaj plej trafaj eltrovaĵoj eniras la ĉiutagan lingvaĵon kaj kliŝiĝas). Ĝi estas aluda kaj implica. En ĝi abundas metaforoj. Beleco kaj eleganteco aparte karakterizas ĝin. Elstara ekzemplo de arta lingvaĵo en ĉiutageca kunteksto estas la "Proverbaro Esperanta" de Zamenhof.

Lingvoposedo varias de persono al persono. Plej dotitaj estas tiuj, kiuj scias trafe uzi ĉiujn tri jam priskribitajn gradojn aŭ kategoriojn. Necesas emfazi, ke tio tute ne estas afero klasa: ekzistas profesoroj, kiuj sin esprimas plumpe, banale aŭ malprecize, kaj ekzistas simplaj laboristoj, kiuj spicas sian ĉiutagan lingvaĵon sprite, kolorplene, eble eĉ poezie. Lingvouzado estas talento, kiel la aprecado de ekzemple muziko estas talento, kiun posedas la homoj tre diversgame.

Sed kiel ĉiuj talentoj ĝi estas edukebla. Miaj nunaj komentoj pritraktas antaŭ ĉio la lingvaĵon artan; sed ĝiaj principoj estas aplikeblaj je ĉiu ŝtupo de la lingvouzado. Ĉu ne estas dezirinde, ke eĉ en nia ĉiutaga Esperanto ni esprimu niajn pensojn ne nur klare kaj trafe, sed ankaŭ, se eble, elegante? En ĉiu momento ni havas vastan elekton inter disponeblaj rimedoj lingvaj. La plej simplan frazon ni povas formi aŭ bele aŭ malbele. Kvankam pli gravas la enhavo de la penso, tamen se oni komunikas tiun enhavon freŝe kaj elegante, tio plifortigas la impreson ricevatan de la aŭskultanto aŭ leganto.

Tio klare estas demando estetika.

SUBTILECO DE LA VORTORDO

Homoj posedantaj lingvon kun relative rigida vortordo ne ĉiam komprenas la avantaĝojn de vortordo relative libera. Efektive ili ne malofte supozas la ekziston de ia "natura" vortordo (kiu spegulas, kompreneble, la vortordon kutiman en ilia propra etna lingvo), sed kiel eksplikis Wells** (1978, p. 53), tio estas iluzio. Iu lingvo havas

vortordon *kutiman*; sed la ebleco variigi tiun kutimajon liveras valoran rimedon de subtileco kaj eleganteco (kiel ekzemple en la klasikaj lingvoj latina kaj greka). Ju pli libera estas la vortordo, des pli da rimedoj ekzistas; kaj vere Esperanto havas grandan liberecon tiurilate. Tio devenas parte de ĝia noveco — ĝi ankoraŭ ne havis tempon sufiĉan por ŝtoniĝi — kaj parte de la tutmondeco de ĝiaj uzantoj, kiuj kutimiĝis al la diversaj vortordoj de siaj etnaj lingvoj.

Tiu libereco de Esperanto evidente ne estas tuta. Kiel montris Piron*** (1977, p. 18), se oni diras la frazon: *por ke homo la juna homojn la maljunajn respektu, necesas ke komprenu li ilin*, tio restas Esperanto, sed “vekas senton de strangeco”. Prave. Tiu vortordo estas nekutima kaj samtempe pravigas sin nek signife nek estetike. La frazo fariĝis neklara, kaj sekve nebona.

Sed vortordo kapablas multon komuniki. Se ni komparas du variantojn de simpla frazo, ni povas tion esplori: *Morgaŭ mia helpanto faros tiun taskon. Morgaŭ helpanto mia faros tiun taskon.*

En la unua, “mia helpanto” implicas, ke nur unu helpanton mi havas; en la dua, “helpanto mia” implicas la ekziston de pli ol unu helpanto, kaj preskaŭ egalas al “unu el miaj helpantoj”. Se mi skribas: *Morgaŭ mia helpanto faros taskon tiun*, tio implicas “kaj ne taskon alian anstataŭe”.

Sed ankaŭ tie ne finiĝas la eblecoj. Se ni prenas la kvar elementojn, kiuj konsistigas tiun propozicion: subjekto (*mia*

helpanto), predikato (*faros*), objekto (*tiun taskon*), kaj adjekto (*morgaŭ*), ni konstatas, ke la parolonto (aŭ skribonto) disponas pri 24 diversaj manieroj aranĝi ilin!

Mi ja ne listigos ĉiujn (tion povas ĉiu interesiĝanto mem), sed jen kelkaj specimene: *Mia helpanto faros morgaŭ tiun taskon. Faros tiun taskon morgaŭ mia helpanto. Tiun taskon mia helpanto faros morgaŭ. Mia helpanto tiun taskon morgaŭ faros.* El tiuj kvar, nur la lasta ŝajnas al mi ne konsilinda; la senco ne fluas, ĉar kontraŭkadenca, kaj la vorto *faros* estas tro neŭtrala por stari sur la emfazeta lasta loko. Sed povas esti, ke en iu difinita kunteksto ĝi estus konvena.

Kunteksto ofte gvidas la elekton. Ekzemple: *Jam delonge riparendas la alia maŝino. Tiun taskon mia helpanto faros morgaŭ.* La antaŭecon de *Tiun taskon* trudas la ĵusa mencio pri la farotaĵo, kaj la graveco de la tempo de riparo (*morgaŭ*) sugestias ĝin sur tiun gravan lastan lokon. Ĝeneralregule, la komenciĝo kaj finiĝo de bona frazo aŭ frazero estas lokoj ŝlosilaj.

ROLO DE LA BONGUSTO

Je ĉiu paŝo, do, oni disponas, pli-malpli nekonscie, pri amaso da esprimeblecoj. Kiam Zamenhof verkis la esperantistan himnon “La Espero”, li estus povinta skribi ekzemple:

Nova sento venis en la mondon,

Tra la mondo voko forta iras;

Facilvente flugu ĝi trans ondon

Ĝis ĝi ĉiujn lokojn jam alspiras.

aŭ:

En la mondon venis sento nova,

Forta voko iras tra la mondo;

Perflugile vento facilblova

Flugu jam de homa rond' al rondo.

Sed ne. Li elektis skribi:

En la mondon venis nova sento,

Tra la mondo iras forta voko;

Per flugiloj de facila vento

Nun de loko flugu ĝi al loko.

La preferindeco de lia teksto estas klara al ĉiu sana orelo (se vi dubas, provu kanti la variantojn!), kaj certe ne konscie li elektis ĝin. Sed la rolo antaŭ ĉio de poeto estas trovi la ĝustan lingvan formon por la konceptoj. Efektive pravigas per la supra ekzemplo difino de Coleridge, nome: *Poezio estas la plej taŭgaj vortoj plej taŭge ordigitaj* — malgraŭ la sprita riposto**** de Raymond Schwartz (“nica literatura revuo” I. p. 197).

Pro tio mi asertas, ke la libereco vortordo de Esperanto estas: unu el ĝiaj gravaj avantaĝoj kiel lingvo internacia, kaj tute precipe, cetere, kiel traduklingvo (pro la multnombraj eblecoj ĉiam prezentataj al la tradukanto). Elekto de la plej bona kaj trafa estas afero de bongusto, kiu malgraŭ opinidiferencoj en lingvotaksado estas konstatebla kaj eĉ mezurable feno-

meno. Grandaj verkistoj estas plej ofte tiuj, kiuj altgrade posedas lingvan bonguston. La maloftajn esceptojn oni pardonas pro iu alia faktoro, ekzemple graveco de la enhavo; sed ilin oni ja pardonas, kvazaŭ pro iu manko aŭ peko.

ABUNDAJ ALTERNATIVOJ

Ne nur pri vortordo regas elekteleco laŭ bongusto. Alternativoj abundas ĉiam, dank' al la strukturo de la lingvo.

Ekzistas elekto, ekzemple, inter adjekta prepozitivo kaj samsignifa adverbo. Depende de la kunteksto, oni povas diri *per facila gesto* aŭ *facilgeste*; *laŭ alia maniero* aŭ *alimaniere*; *dum multaj jaroj* aŭ *multjare*, ktp. Adverbo povas roli ankaŭ priskribe aŭ kompare: oni laboras *kiel volontulo* aŭ *volontule*; knabo kuras *kiel leporo* aŭ *lepore*; li estis timata *kvazaŭ rabia hundo* aŭ *rabiahunde*. Magneta nadlo celas *al la norda*

poluso aŭ *nordpolusen*. Tiu rimedo estas ofte konciziga.

Konciziga estas ankaŭ la ebleco diri: *plenumitas* anstataŭ *estas plenumita*, *venontis* anstataŭ *estis venonta*, k.s. Tiuj formoj estas korektaj kaj laŭregule formitaj; oni ofte proponas ilin, kvankam ili malofte *uzatas*. . . Ilia uzado aŭ neuzado estas afero de gusto.

Multaj kontraŭuloj de Esperanto asertas, kvazaŭ tio estus memevidentaĵo, ke "kompreneble" en Esperanto ne ekzistas sinonimoj. Kulpas ni mem pri tiu fuŝa aserto, ĉar niaj unuopaj vortaroj plejofte ne registras ĉiujn formojn efektive ekzistantajn (des malpli ĉiujn latentajn). Ni mem do ofte kondutas kvazaŭ nur unu esprimformo estus ebla.

Sed la vortprovizo de Esperanto deriviĝas dumaniere. Povas troviĝi por iu nocio radikoj kaj ankaŭ almenaŭ unu kunme-

tita vorto. Konsideru ekzemple la parojn: *sobra/malebria*; *afabla/bonkora*; *soldato/militisto*; *pirato/kaperisto*; *filantropo/bonfaremulo*; *paro/duo*; *zorgoplena/angoreta*. Konsideru la triojn: *barbiro/hartondisto/frizisto*; *pigra/mallaborema/malpenema*; *descendi/malsupreniri/desupri*. Konsideru la serion (tute ne kompletan): *putino, malĉastulino, amoristino, ĉiesulino, stratulino, prostituitino, amajistino*, ktp.

Kiel en aliaj lingvoj, inter sinonimoj ofte sentiĝas nuanca diferenceto sed ili estas sinonimaj. Ankaŭ elekto de la ĝusta vorto venas sub la rubrikon *estetiko* aŭ *bongusto*.

Elekto, kiun ofte frontas precipe la prozverkistoj, estas: ĉu aktivo aŭ pasivo? Ĉu mi skribu, ekzemple: *La poŝtisto estis mordita de hundo* aŭ *La poŝtiston mordis hundo*? Tute klare, ambaŭ estas ĝustaj. Elekto dependas de stilfaktoroj: elegan-



Prof. W. Auld kune kun ĉinaj kaj brazilaj esp-istoj

teco, klareco, la ĝenerala etoso de la kunteksto. Tro abunda sinsekvado de pasivoj nepre efikas peze, kaj ne malofte fariĝas pro tio malfacile sekvi senĝene la sencon. Iom da eleganta variado samtempe faciligas la fluaĉon de la teksto kaj agrable variigas ĝin. Ekzemple, ambaŭ jenaj propozicioj estas tute bonaj: *Mia rigardo de tempo al tempo estis allogata de la nur malforte brilanta spegulo.* (Jane Eyre) *La luno estis preskaŭ tute forkaŝita de la nuboj.* (Ŝi)

Sed la ĉirkaŭajn tekstojn plenŝtopas participoj, tiel ke oportune oni eble povus utile skribi: *Mian rigardon de tempo al tempo allogis la nur malforte brilanta spegulo, aŭ La lunon preskaŭ tute forkaŝis nuboj (mi havas dubon pri ĝusteco de tiu "la" antaŭ "nuboj", ĉar ne temas pri la solaj, unikaj nuboj).* Eĉ en tiu lasta parentezo trudiĝis al mi elekto: ĉu mi skribu "havas dubon" aŭ "dubas"; ĉu ekzistas ia nuanco? Cetere, ni gardu nin kontraŭ unu danĝero tradukante: lingvoj strukture malsimilas inter si, kaj strukturo bela en originalo povas iĝi malbela en tro laŭvorta traduko; ekzemple, sinsekvo de pasivoj eleganta en la angla povas fariĝi tede peza se tradukanto tro sklave reproduktas tiun sinsekvon!

Similaj eblecoj svarmas, cetere. Ĉu mi diru *belas aŭ estas bela, vomemas aŭ estas vomema*, kaj kia diferenco nuancas inter la alternativoj? Kien mi starigu adverbbon: ĉu mi diru, *mi rapide trarigardis la gazeton, mi trarigardis rapide la gazeton, aŭ mi trarigardis la gazeton rapide?*

Sed mi jam proksimiĝas al punkto, kie mi devus, anstataŭ skizi kelkajn tiajn ideojn, verki

seriozan disertacion kun plenaj referencoj kaj eventuale statistiko. Tie ĉi ne estas ĝusta loko por tio. Sed respondon al la starigitaj kaj similaj demandoj oni trovu per zorga studado de rekonataj stilistoj (ekz-e Zamenhof, Kabe, Baghy, Forge, Szilágy, k.a.). Modeloj ne mankas al ni, kaj ili estas pli fidindaj ol ĉiaj teoriaĵoj.

ESTETIKO EN PLI VASTA KADRO

Estetiko rolas ne nur en unuopaj vortoj kaj frazoj, sed ankaŭ en multe pli vasta kadro. Ne malofte okazas, ke ies tuta sinteno al la lingvo estas estetike manka. Por tion klarigi, ni rigardu tri tradukojn de sama teksto (el "Romeo kaj Julieta" de Shakespeare).

(1)

... Ho, se mi nur havus la voĉon de falkĉasisto por revenlogi ĉi tiun amindan falkon! Raŭkvoĉa estas la servuto kaj devas ne laŭte paroli, alie mi disfendus la abismon kie Eĥo troviĝas, kaj ŝian aerecan langon raŭkigus pli la mia per ripetado de la nomo de mia Romeo. (Stephen A. Andrew)

(2)

... Ho, por falkestra voĉo por logi ĉi virfalkon re al mi!

Nur raŭkas mallibero, ne kuraĝas

paroli laŭte, ĉar alie mi la groton ŝirus, kie Eĥo sidas,

kaj tedus ŝian langon aerecan,

la nomon de Romeo ripetante.

(R. Rossetti)

(3)

... Ke mi havus voĉon Falkistan por ĉi falkon re-allogi!

Sklaveco raŭkas, kaj ne rajtas brui,

Aŭ la kavernon ŝirus mi de Eĥo,

Raŭkigus ŝian langon pli ol mian,

Per ripetado de la nom' Romeo.

(W. Auld)

Ŝajnas al mi evidente, ke la decido de Andrew traduki ekzaltitajn versojn de majstra poeto proze estis estetike erara; kaj ŝajnas al mi, ke la citaĵoj tion pravas. Ne temas nur pri tio, ke la proza stilo de Andrew estas peza kaj malbela — kvankam tio gravas — sed ankaŭ, pli grave, la enhavo mem de la versoj ne sidas nature en proza formo. Tiu prozo baraktas por esprimi konceptojn al ĝi fremdajn. En la poezio (inkluzive de la versaj tradukoj) la sencon subportas kaj emfazas la ritmo; ankaŭ prozo povas havi ritmon, kompreneble, sed al tiu de Andrew ĝi mankas.

Sed Andrew diras, ke li elektis prozon por eviti vortordojn ne naturajn kompreneblajn nur per pena analizo, kiuj, laŭ li, karakterizas la plimultajn versajn tradukojn. Certe ekzistas en Esperanto unu-du fuŝaj tradukoj tiuspecaj, sed ili same certe ne estas kutimaj. En la supraj citaĵoj, se entute troveblas vortordoj, kiuj malhelpas rektan komprenon, ĉu ili ne emas aperi pli en la prozo de Andrew (*raŭkvoĉa estas la servuto; devas ne*), ol en la versaj versioj? Ĉu la fundamenta tezo de Andrew ne montriĝas senbaza? Kaj

ĉu ne estas lia prozo “ne natura”? Ĉu li ne kulpis gravan eraron estetikan?

Eble ankaŭ interesas komparo de la du versaj tradukoj, ĉar ili ilustras la abundecon de alternativoj de dispono de niaj aŭtoroj. Efektive, la du lastversoj estas tute samsignifaj, kaj oni povus ilin interŝanĝi senperturbe! Tiu traduko de Auld, paren-teze specimenas alian estetikan elekton (ĉu pravigitan aŭ ne), nome: traduki la originalon per la sama nombro da versoj.

Legantoj eble miras, vidante diversecon de almenaŭ du vortoj: *servuto*, *mallibero*, *sklavenco* (angle: *bondage*) kaj *abismo*, *groto*, *kaverno* (angle: *cave*). Tio simple pruvas ankoraŭfoje, ke ni staras ĉiam an-

taŭ la neceso — kaj la privilegio! — elekti sur ĉiuj kampoj lingvaj.

KONKLUDO

Mi imagas, ke multaj legantoj pensas: kia tumulto pri bagateloj! Kaj tamen homoj ofte asertas la malsuperecon de Esperanto kompare kun aliaj lingvoj. Mi klopodis pensigi al vi, ke ne lingvoj estas superaj aŭ malsuperaj, sed nur la talento de iliaj uzantoj. Kiel povu diri niaj varbantoj, ke Esperanto estas lingvo klara, bela, eŭfonia, eleganta, k.s., se ni mem uzas la lingvon plumpe, krude, senkolore kaj malbele?

* Prof. William Auld estas prezidanto de la Akademio de Esperanto. Li verkis la artikolon speciale por EPC.

** WELLS, John. “Lingvistikaj aspektoj de Esperanto” UEA, Rotterdam, 1978.


*** PIRON, Claude. “Esperanto: ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?” UEA, Rotterdam, 1977.

**** riposto: rapida rebato per rapiro (en skermo) aŭ vortoj (en disputo).



Prof. W. Auld estas intervjuata de raportisto de Radio Pekino.





Parto de la vilaĝeto


Kamparanoj uzas sunenergian fornon

Fotoj de LI CHUNGENG


En la gubernio Hai'an de la provinco Jiangsu de Ĉinio troviĝas malgranda vilaĝo, kie preskaŭ ĉiuj familioj uzas sunenergian fornon. Tia forno estas farita de intelekta junulo Gao Jie. Ĝi estas malmulte kosta, kaj 35 juanoj jam sufiĉas por fari ĝin, kiu povas levi temperaturon al pli ol 600° C. Tia forno kuiras rapide kaj ne kaŭzas malpurecon, tial ricevis laŭdojn de kamparanoj.

Kuirado per sun-
energia forno





La projektinto Gao Jie (maldekstre)





Gao Jie klarigas al vizitantoj kiel fari kaj uzi sunenergian fornon.

Shenzhen en Konstruado

Shenzhen kun areo de 327 kvadrataj kilometroj estas unu el la specialaj ekonomiaj distriktoj de Guangdong-provinco, Ĉinio. Ĝi limtuŝas Hongkong kaj havas facilan trafikon akvan kaj teran. Per favoraj kondiĉoj ĝi altiras al si fremdlandajn komercistojn por investado. Nun pli ol 600 enkondukitaj konstruaj projektoj estas efektiviĝataj.

Parto de la doko Shunfeng 600 metrojn longa





Jus muntita sunenergia forno

Ĉinaj kaj fremdlandaj teknikistoj diskutas pri projekto konstrui fabrikon.



Novaj domoj en la industria kvartalo Shangbu







Koncernaj respondeculoj aŭskultas raporton pri konstruado de la speciala distrikto.

La ĵus konstruita Xinnanxin-a Tinktura Fabriko administrata de Hongkong-a kompanio

La bela orienta parto de la speciala distrikto estos konstruita en turisman lokon.



Lingvo kaj nacia sento

Antaŭ nelonge la aŭtoro de tiu ĉi artikolo verkis por la duonmonata gazeto «Monda Kulturo», kiu raportas la mondajn okazajojn kaj distribuiĝas en 250,000 ekzempleroj, artikolon pri lingvaj problemoj. En la artikolo li tuŝis interrilatojn de lingvo kaj nacia sento kaj la problemon de internacia komuna lingvo. Nun ni aperigas la koncernajn partojn de la artikolo, kiuj eble interesos niajn legantojn.

— LA RED.

Antaŭ ol ektuŝi la problemon de lingvo kaj nacia sento, mi volus citi tri rakontojn. La unua estas «La Lasta Leciono» de la franca verkisto Alphonse Daudet en la 19-a jarcento. Ĝi rakontas pri la lasta leciono de la franca lingvo persiste donata de instruisto en granda malĝojo kaj indigno, kiam la prusaj agresantoj, konkerinte Alsace kaj Lorraine de Francio, devigis tieajn elementajn lernejojn instrui nur la germanan lingvon, anstataŭ la francan. La rakonto radias patriotismon. Ĝi profunde infektas la legantojn, precipe tiujn de subpremataj nacioj. Mi legis la rakonton kun larmoj kiam mi estis juna.

La dua estas tagnoto de la granda dana fabelisto H. C. Andersen. En 1864 prusaj agresantoj invadis Danlandon. Andersen skribis en sia taglibro:

La 8-an de aprilo 1864, mi estis kune kun brita diplomato Bulvar Liden, filo de verkisto. Mi devis paroli kun li en la angla lingvo. Li bone parolis la germanan lingvon. Sed en mia koro mi ne volis paroli en tiu lingvo, ĉar ŝajnis al mi, ke ĝi tute kontraŭas al la sento de la danoj. Tial mi diris al li: “Mi kvazaŭ aŭdus en tiu ĉi lingvo kanonadon kaj kriadon de la malamikoj. Mi

preferas mian mallertan anglan lingvon.” (el «Filo de Ŝuisto» de Ye Junjian)

La tria rakonto temas pri la japana esperantistino Verda Majo. Ŝi staris koron ĉe koro kun la ĉina popolo kaj tre malamis la agresadon de la japanaj imperiistoj al Ĉinio. En iu internacia kunveno ŝi solene proklamis, ke ŝi ne volas paroli en la japana lingvo uzata de la agresantoj.

Laŭ mia opinio la tri rakontoj pruvas, ke lingvo havas intiman rilaton kun nacia sento.

En la nuna mondo ĉiuj lingvoj havas sian respondan nacion, kaj oni nomas tiujn lingvojn naciaj lingvoj. (La problemon pri tribaj lingvoj kaj dialektoj kaj indiĝenaj lingvoj mi ne traktos en tiu ĉi artikolo.) Kiel ni ĉiuj scias, unu el la karakterizoj de nacio estas ĝia lingvo, kaj la aliaj karakterizoj de komuna loko, komuna ekonomio, komuna psiko enkorpigita en la komuna kulturo, ĉiuj havas intiman rilaton kun lingvo, precipe la komuna kulturo. Estas ne imageble, ke la antikva kulturo de la hanoj de Ĉinio povus herediĝi kaj disvolviĝi dum miloj da jaroj sen ideografio, la skriba lingvo de hanoj*.

Ĉiu nacio amas sian propran lingvon pro tio, ke ĝi havas intiman rilaton kun la nacio. Se tiu nacio estas mistraktita rilate ĝian lingvon, precipe se al ĝi estas altrudita alinacia lingvo, tio certe vekos grandajn malŝaton kaj malamon de tiu nacio.

POLITIKA SENTEMO DE LINGVO

La tri supraj rakontoj ankaŭ pruvas, ke la problemo de lingvo estas ofte miksita kun politiko de la homaro, la lingvoj nature havas diversajn rilatojn kun la ekonomio, kulturo, kaj precipe la politiko, unu el la gravaj agadkampoj de la homa socia vivo.

Ĝuste kiel ni ĉiuj scias, imperiistoj agresas malfortajn naciojn ne nur per politiko, ekonomio kaj milito, sed ankaŭ per kulturo; kaj trudi al la malfortaj nacioj siajn lingvojn estas unu el la rimedoj de kultura agreso.

En lando kun multaj nacioj, oni devas praktiki la politikon de egalrajteco inter la nacioj por teni ilin en unueco kaj frateco, kaj tiu politiko ofte inkluzivas la gravan punkton pri egalrajteco inter la lingvoj. En iuj multnaciaj landoj, malegaleco inter lingvoj ofte kaŭzas nacian

konflikton, ribelon aŭ sangverŝon.

Ĉar lingvo estas nemalhavebla instrumento por la homaro en ĝiaj politika, ekonomia kaj kultura aktivadoj, tial ju pli disvastiĝas iu nacia lingvo, des pli potenciĝas la forto kaj la influo de la nacio. Nun Britio kaj Usono klopode disvastigas la anglan lingvon, kio ja ne povas esti senrilata kun ilia klopodo por disvastigi iliajn forton kaj influon. Onidire, la francaj aŭtoritatuloj afliktiĝis pro malvastiĝo de la tereno uzanta la francan lingvon. Ĉar tio ne estas pure lingva problemo, sed ankaŭ koncernas la forton kaj influon de Francio sur la monda scenejo.

El ĉio ĉi ni povas vidi, ke la lingva problemo rilatas al la internacia influo de iu lando, kaj estas problemo havanta politikan sentemon. Kial UNO vole-nevole devas uzi ses laborlingvojn, elspezante ĉiujare centojn da milionoj da usonaj dolaroj? Kial Eŭropa Ekonomia Komunumo timas pligrandiĝon de sia elspezo pro aldono de pliaj lingvoj, se ĝi akceptos pliajn membrolandojn? Unu el la kaŭzoj estas: por eviti superecon de unu aŭ grupo da landoj, ili ne povas akcepti iun nacian lingvon kiel komunan. En la mondo, kompreneble, ekzistas tiel multe da lingvoj, ke la internaciaj organizaĵoj ne povas akcepti ilin ĉiujn kiel oficialajn komunajn lingvojn. En la nuna cirkonstanco kun manko de internacia komuna lingvo, la konvena elirejo estas difini kelkajn popularajn kaj kompare gravajn kiel komunajn lingvojn. Sed tiamaniere neeviteble aperas maljusto kaj malracio, kaj pli grave, lingva kaj nacia diskriminacio.

BEZONO DE INTERNACIA KOMUNA LINGVO

Nedubeble estas, ke la homa socio urĝe bezonas ian komunan internacian lingvon. La fokuso de la problemo estas, kiun lingvon oni prenu kiel la komunan. Iuj proponas ke oni nature devas preni la anglan lingvon kiel la komunan pro ĝia vasta uzateco. Ili asertas, ke la problemo estos baldaŭ solvita, se la tuta mondo lernas la anglan lingvon krom la nacia. Aliaj opinias, ke la angla lingvo jam fakte fariĝis internacia lingvo. Sed la problemo ne estas tiel simpla kiel oni opinias. La angla estas la lingvo de Britio, kiu historie havis gigantan imperion, kaj ankaŭ la lingvo de Usono, unu el la mondaj superpotencoj, tial multaj landoj malvolontas akcepti la anglan kiel la komunan lingvon. Ĉar tio sentigus humiliĝon antaŭ la brita-usona forto kaj diskriminacion kaj malestimon al aliaj naciaj lingvoj. Ĝuste tion oni klopodas por eviti. Al la realo ne konformas ankaŭ la aserto, ke la angla lingvo jam fariĝis internacia komuna lingvo. La angla lingvo estas unu el la plej popularaj lingvoj en la mondo, sed ĝi fore distancas de ĝenerala uzateco en la tuta mondo. Iu angla esperantisto diris prave, ke li povas paroli en la franca lingvo, kaj lia franca amiko povas en la angla. Sed en renkontiĝo ili parolas nek la anglan, nek la francan, sed Esperanton, ĉar parolante Esperanton, ambaŭ sentas sin egalrajtaj unu al la alia.

Esperantistoj proponas Esperanton kiel la internacian komunan lingvon, substrekante ĝian neŭtralecon, t.e. Esperanto respektas naciajn lingvojn kaj

neniam havas intencon anstataŭi ilin. Tial ne estiĝos la komplikajo de lingva diskriminacio, nek humiligo al la nacia sento. Laŭ mia persona opinio, ĝi estas ideala solvo. Oni bezonas longan tempon por koni iun novan aferon, kaj kompreneble la homoj ankoraŭ ne plene konscias pri la avantaĝoj de Esperanto. Ne estas surprize, ke oni demandas, kial Esperanto ne populariĝis, se ĝi estas konvena por esti la internacia komuna lingvo. Foje, kun tiu demando, mi konsultis personon, kiu longe okupis sin pri la Esperanto-movado. Lia respondo estas tre interesa. Li diris: Kiam telefono jus venis en la mondon, multaj homoj ne volis havi ĝin, ĉar tiam nur multaj homoj havis telefonon, kaj telefono estis por ili preskaŭ senutila. Nun Esperanto ja troviĝas en simila stadio. Li daŭrigis sian argumentadon: Ĉar la homa socio bezonas telefonon, tial ĝi populariĝis. La nuna fakto estas, ke oni povas telefoni unu al alia ne nur en la sama urbo kaj sama lando, sed ankaŭ kien ajn en la tuta mondo. Same estas Esperanto, se ĝi estus bezonata de la homa socio, ĝi certe disvastiĝos tra la tuta mondo.

Sendube diversaj problemoj de la homaro estos solvitaj nur en la homa socia praktiko, kaj la problemo de internacia komuna lingvo ne estas escepto. La nuna Esperanto atendas rafinadon. Tamen, la naskiĝo kaj evoluado de Esperanto en la lasta jarcento almenaŭ prezentis al ni la direkton, en kiu eblas solvi la problemon.

* *Fremdlandanoj kutime nomas ideografion la ĉina lingvo, fakte ĝi estas nur la lingvo de hamoj.*

AMIKAJ RILATOJ INTER ĈINAJ KAJ FRANCAJ ESPERANTISTOJ

Junie de 1981 delegacio de la ĉina urbo Chengdu, sub gvido de la urbestro Mi Jianshu, vizitis la francan urbon Montpellier. Urbestro Mi kunportis tieĝ la amikajn salutojn de 2.5 milionoj da Chengdu-anoj kaj tieaj esperantistoj. La delegacio estis fervore kaj amike akceptita de la urbestro de Montpellier kaj diversrondaj personoj. Ĝi intervidiĝis ankaŭ kun lokaj esperantistoj. Interalie s-ro Lentigne, veterana franca esperantisto, esprimis, ke li volonte faros kontribuon por disvolvi amikajn rilatojn inter la esperantistoj de la du urboj. Krome pere de la delegacio, li transdonis al la Chengdu-a Esp-asocio pakon da donacoj (Esperantaj propagandaj lumbildoj kaj sonbendoj). Nun Chengdu kaj Montpellier jam fariĝis ĝemelaj urboj, kio prezentas bonajn kondiĉojn por plue disvolvi la amikajn rilatojn inter la du urboj.

NEDEVIGA ESPERANTO- KURSO EN LA UNIVERSITATO DE SICHUAN

Antaŭ 16 jaroj la Universitato de Sichuan instruis Esperanton en nedeviga kurso, kiu estis ĉesigita pro la kultura revolucio. Septembre de 1981 la universitato decidis denove starigi Esperanto-kurson en la Fremdlingva Fakultato. En ĝi lernas 25 studentoj de la triajara klaso de la angla lingvo. Laŭ ĝisdataj informoj okazas nedeviga Esperanto-kurso ankaŭ en la Orientĉinia Normala Universitato,

*Nanjing-aj
esperantistoj en Maŭ-
zoleo de d-ro Sun
Jatsen*



Mezĉinia Normala Instituto, Universitato de Nanjing (Nankino) kaj la Tria Normala Lernejo de Chongqing.

DIVERSASPECAJ ESPERANTO- KURSOJ EN GUANGZHOU

Depost sia fondiĝo en aprilo 1981, la prepara grupo de la Esperanto-asocio de Guangzhou (Kantono) funkciigis diversaspecajn kursojn. Inter ili estis tri elementaj, unu mezgrada kaj unu konversacia. Nun studas tie pli ol 300 kursanoj, inkluzive de scienc-teknikistoj, administraj oficistoj, laboristoj, instruistoj de elementaj kaj mezaj lernejoj kaj studentoj.

ESP-PRELEGO FUNKCIIGITA DE LA HUNAN-A ESP-ASOCIO

La 6-an de oktobro 1981 la Hunan-a Esp-asocio kaj la provinca biblioteko kune organizis prelegon pri Esperanto. Estrarano de la asocio Chen Zhen prelegis pri la temo "Esperanto kaj modernigo de nia lando". Li lekciis pri tio, kio estas Esperanto, kiel ĝin lerni kaj pri ĝia utilo en la moderniga konstruado de Ĉinio kaj internacia scienc-kultura interfluo, kaj estis varme aplaŭdata de la pli ol 200 ĉeestantoj.

NANJING-A ESP-ISTOJ AL LA MAŬZOLEO DE D-RO SUN JATSEN

En la tagoj de la 70-a datreveno de la Revolucio de 1911 esperan-

tistoj de Nanjing (Nakino), organizitaj de la prepara grupo de la loka Esperanto-societo, vizitis la Maŭzoleon de d-ro Sun Jatsen. Inter la vizitintoj estis veteranaj esperantistoj Zensto, Feng Yongyi kaj aliaj.

ESPERANTO-KONSULTEJO EN YANGZHOU

Subtenate de la prepara grupo de Esperanto-societo de Yangzhou, veterana esperantisto Qian Yangu ekfunkciigis Esperantan konsultejon en sia urbo en la dua tagdeko de majo 1981. Tie lernas nian lingvon proksimume cent homoj, kaj nun jam diplomitiĝis la unuaj kursanoj. Por ke oni firme memoru la lernitajn sciojn, tra la tuta urbo nun stariĝis kvin studgrupoj gvidataj de la konsultejo.

ESPERANTO-LERNEJO, UNUA EN LA MONDO

En la suda parto de Bulgario, en montaro Rodopi apud urbo Smoljan, la bulgara ministerio por edukado kaj kulturo konstruis grandegan domon kun la nomo Internacia Esperanto-kursejo. La kursejo estas sufiĉe komforta kun lernoĉambroj, bibliotekoj, diskoteko, moderna kuir-rejo kun manĝejo kaj dormoĉambroj kun du, tri aŭ kvar litoj, lavejo, duŝejo ktp. Apud la kursejo estas fonto kun malvarma sanna akvo. La naturo estas pitoreska kaj pura. Lokita for de trafiko kaj urba bruoj, la kursejo certigas al la kursanoj laboron en silento. Ĉi-jare la kursejo donis sian unuan generacion al la mondo. La instruistoj estas eminentuloj de bulgara Esperanto-movado, inter kiuj troviĝas ankaŭ docentoj de la Sofia Filologia Fakultato.

*Membroj de la Dua Esp-kurso de la Tria Normala
Lernejo de la urbo Chongqing*



En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitaĵajn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekomencas pro la kontribuajtoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

LA RED.

MODERNA "ŜLOSILO"

TEN-LESSON FREE POSTAL COURSE IN THE INTERNATIONAL LANGUAGE ESPERANTO

Jen dek-leciana kurso por instrui Esperanton al anglingvanoj per korespondado. Ĝi estas ankaŭ speco de moderna "Ŝlosilo" de Esperanto kun aktualaj informoj pri la movado kaj lerte aranĝitaj lecionoj kiuj donas ĝeneralan bildon pri la facila lingvo mem. Kompreneble en dek lecionoj sur dekkvarpaĝaj faldfolioj (formato: 14.5 × 22 cm.) oni ne povas konigi ĉion pri Esperanto al la lernantoj, tamen la materialo certe vekos ilian intereson pri la internacia helpa lingvo. Kaj la eldonintoj jam antaŭzorgis pri plua studo de la lingvo kaj estas pretaj doni necesajn helpojn. Ĝi estas bona lernilo kaj propagandilo. Kiuj do eldonis ĝin? Kredeble ges-roj R. kaj V. Eichholz, kiuj prizorgas la senpagan instruadon al la

lernantoj, multe faris por tio. Prezon oni ne indikis. Eble oni disdonas la foliojn senpage? Interesitoj skribu al ges-roj R. kaj V. Eichholz (R. R. 1, Bailieboro, Ont., KOL 1 BO, Kanado) aŭ la Kanada Esperanto-Asocio.

Recenzis V. K.

TRADUKO ORIGINALA

POST ŜTORMO de Boris Pasternak en traduko de Kris Long, eldonita de la tradukinto mem. 15 × 10.5 cm. 36 p. Prezo ne montrita. Eble akirebla ĉe la eldoninto; adreso: 85 Point Royal, Bracknell, Berks, Britio.

Kris Long uzis rimedon iom originalan en traduko de versaĵoj de Boris Pasternak, jen ekzemplo:

*Mi plantus versojn en ĝarden':
anservic-kune
tilioj florus tie, vejn-
tremante, nuke.*

Eble tiel malfacila estas la tasko, ke la tradukinto devas sin helpi per tia rimedo. Sed mi dubas pri ĝia taŭgeco, ĉar oni ne povas facile kapti la sencon pro la alligita prononco.

Koncerne al la enhavo mi volas rimarkigi, ke iuj pecoj estas facile kompreneblaj kiel la linioj en "L' arbar' aŭtuna":

*Kok' elgorĝigas raŭkan krion
kaj restas longe en silent',
ĉar li refoje volas scii
ĉu estas en la kanto senc'.*

Sed oni renkontas ankaŭ vortojn tie kaj tie, kiuj sonas kiel enigmoj.

Kompreneble ne estas la intenco de la tradukinto kaŝi la sencojn per ludo de ĉirkaŭparoloj, ofte oni devas agnoski neinterpreteblaĵojn de poeziaj verkoj.

Recenzis N. M.

SENNACIECA REVUO POR 1981

56-paĝa kajero kun 7 ampleksaj artikoloj pri svisa Bazelo (la kongresa urbo de SAT en 1981), la germana filozofo Frederiko Nietzsche, la antikva kojnoskribo kaj la asiribabilonia lingvo, naciismo kaj universalismo en muziko, la homa fenomeno, opinioj de Comenius pri artefarita lingvo kaj romano "Di-Reĝoj" en du volumoj pri egiptaj faraonoj, kaj krome ankaŭ unu originala kaj 3 tradukitaj poemoj aldonantaj beletran koloron al la revuo. Ja estas bone por Esperanto kaj la E-movado, ke oni multe verku en la internacia lingvo pri fakaj sciencaj demandoj por riĉigi ĝian literaturon kaj la lingvon mem. Kvankam ne faka scienca gazeto, S. R. tamen faras sian kontribuon tiuflanke per siaj seriozaj kaj pli malpli profundaj studoj pri sociologiaj kaj natursciencaj demandoj. Ankoraŭ multegon oni devas fari por ebligi seriozan studadon de sciencaj fakoj per Esperanto. Kredeble la kontribuantoj de S. R. kaj fakaj Esperantaj eldonaĵoj ne haltos post la unuaj paŝoj, sed plirapidigos sian marŝon por fari Esp-on ankoraŭ pli celtaŭga kaj alloga.

Recenzis L. S.


ZORGEMA KOLEKTADO DE EPC

S-ro Bert Sitte, leganto de F.R. Germanio, skribis al ni dirante, ke li zorgeme kolektadis EPC jam

kvar jarojn kaj nun posedas tri binditajn librojn, kiuj estas bone konservataj en lia libroŝranko kiel ĉiam atingebla valora posedaĵo. Jen fotoj, kiuj montras la jarkolektojn de EPC.

ELSENDO DE ESPERANTO- KURSO

Elstara loka radiostacio en Forlì (Italio), kies oficiala nomo estas "ARIA RADIO", elsendas kurson



S-ro Bert Sitte kaj la binditaj jarkolektoj de EPC



MI VOLONTE

FARIĜIS

TEKSISTINO

de ZHANG LIHUA



Zhang Lihua (meze) prezentas sperton al siaj kolegoj.

La aŭtoro estas 29-jara teksistino de la Dua Spin-teksejo en la urbo Shijiazhuang, Hebei-provinco. Ŝia edzo laboras en akvopumpila fabriko de la sama urbo. Ili havas filinon de du kaj duona jaroj. Ili loĝas en domo luigita de la ŝpin-teksejo. La aŭtoro ĉi tie rakontas sian ordinaran vivon al niaj legantoj.

— LA RED.

Regas tra nia laborejo senĉesa bruego de la teksmaŝinoj. Dum interparolo ni devas altigi nian voĉon kiel en kverelo kaj eĉ fari mangestojn. Enirinte la laborejon, ni parolemaj kaj ŝercemaj junulinoj povas nur teni niajn

buŝojn fermitaj. Tamen mi amas mian profesion. Post kiam mi diplomitiĝis el mezlernejo en 1969, miaj gepatroj esperis, ke mi serĉos por mi agrablan okupon. Sed fariĝi teksistino ja estis mia deziro.

Nia laborejo kun pli ol 1,500 teksistinoj produktas sep specojn da ŝtofo, el kiuj kvin estis elektitaj kiel bonaj produktaĵoj de la lando. 72 teksmaŝinoj de la laborejo speciale produktas fajnman poplinon. Tiu teksaĵo estas de alta klaso. Laŭ regulo difinita de la fabriko, teksistino devas transiĝi al alia laboro, se ŝi ne povas plenumi sian planon dum sinsekvaj tri monatoj. Mi teksistino poplinon jam du jarojn. Ĉiutage mi devas teksi 720 metrojn da poplino, prizorgante 24 maŝinojn. La fabriko postulas altan kvaliton. Dum labora konkurso unu teksistino povus perdiri honoron al sia grupeto per fuŝa laboraĵo.

de Esperanto ĉiun sabaton matene ekde oktobro 1981.

La lecionojn gvidas s-ro Luigi Tadolini de la Itala Instituto de Esperanto.

TELEFONA ESPERANTO-KURSO EN VIENO

En Vieno, Aŭstrio, ekde la 1-a de oktobro 1981 eblas sekvi telefonan Esperanto-kurson. Similan eksperimenton oni faris antaŭ kelkaj jaroj en Usono.

MALFERMO DE KURSO EN INTERESA MEDIO

Alvokite de la prezidanto de la Klubo de Geinstruistoj-Emeritoj, s-ro Rene Llech-Walter, malfermis kurson por la membroj la 15-an de oktobro.

La kurso okazas ĉiun jaŭdon posttagmeze ĉe la sidejo de la Klubo, 21, Boulevard Clemenceau, F-6600 Perpignan, Francio.

Nia ŝpin-teksejo finkonstruiĝis kaj ekfunkciis en la jaro 1955. Kaj nun ĝi havas 110,000 spindelojn, pli ol 2,000 teksmaŝinojn kaj preskaŭ 8,000 gelaboristojn (la virinoj konsistigas 54%). Iuj ne tiel estimas nin kaj asertas, ke la virinoj povas konsciencie plenumi sian devon nur post trapaso de tri "pasejoj", nome amafero, edziniĝo kaj nasko. Ni laboristinoj malaprobas tian opinion kaj respondas al ili per nia ago.

Laŭ ilia diro, mi havis mian unuan "pasejon" en 1976. Tiam mi enamiĝis al laboristo de akvopumpila fabriko. Mi foje refoje atentigis min mem: Mia amafero ne malhelpu mian laboron. Ĉiu geamanta paro kutime donas apartan atenton al la rendevuoj dum la komenca tempo de sia amo, kvazaŭ ili reciproke provus sian fidelecon. Ankaŭ ni havis

niajn rendevuojn, tamen ili neniam malhelpis niajn laborojn. Kelkfoje mi ne povis esti akurata en rendevuoj aŭ eĉ ne iris rendevui pro tio, ke post la laborado mi devis instrui lernoknabinojn fari nodojn aŭ ĉeesti kunvenetojn haste aranĝitajn. Sed neniam pro tio okazis al ni malplezuroj. Ju pli li komprenis min, des pli mi amis lin.

Ni geedziĝis en 1978. Antaŭ tio ni decidis inviti niajn geamikojn partopreni en nia geedziĝa ceremonio, sed elspezi ne pli ol tiom da mono, kiom ni ŝparis, por ne droni en ŝuldoj kaj kaŭzi malagrablojn en la familio. Dank' al nia bona aranĝo ni havis ceremonion neluksan sed gajan.

Baldaŭ mi naskis infanon kaj mi nature fariĝis aferplena. Ĉiutage antaŭ la laborado mi devis

porti la infanon al la fabriko vartejo. Komence mi bezonis kvaronon da horo por tion fari piedire. Poste mi portis ĝin multe pli facile, ĉar la fabriko faris nombron da kromĉaroj kroĉeblaj ĉe flanko de biciklo kaj donis po unu al ĉiu infanportantino. La fabriko permesas al la laboristinoj mamnutri sian suĉinfanon po duonhoro ĉiun antaŭtagmezon kaj ĉiun posttagmezon. Se estus tiel, mi devus peti alian prizorgi miajn teksmaŝinojn. Mi decidis do nutri mian infanon per bovlakto du fojojn ĉiutage. Kiam la infano atingis la aĝon de du kaj duona jaroj, mi metis ĝin en infanĝardenon de la fabriko. La infanĝardenistinoj tre bone flegadas. Ili tondas al la infanoj la kapharojn, tondetas al ili la ungetojn, banas ilin kaj lavas iliajn vestojn. Krome ili ankaŭ longigas siajn laborhorojn, tiel ke oni povas porti sian infanon al kaj el la ĝardeno en kiu ajn horo. La fabriko asignis parton de la laborista bonstatiga fonduso al aĉeto de kukoj, fruktoj kaj litaĵoj por la infanoj. Tio trankviligis min kaj multe malpezigis mian ŝarĝon, tiel ke mi povas denove verŝi pli da energio en mian laboradon. Jes, estas tre streĉa nia ĉiutaga okhora tekstado. Ni havas nur unuhoran ripozon en tagmezo. Plejparto de la laboristoj manĝas en la fabriko manĝejo. La kuiristoj preparas tre abundajn manĝojn. Kelkfoje mi aĉetis iom por kunporti hejmen. Ĉiutage ni finas nian laboradon je duono post la kvara posttagmezo. Post laboro ni banas nin kun granda plezuro kaj revenas hejmen pure vestitaj.

Iuj rigardas sengusta nian tekstistan vivon, sed mi kaj miaj koleginoj malsamopiniis kun ili. Ni pensas, ke la tekstila indus-

Zhang Lihua brodas.



trio, unu el la ĉefe disvolvataj industriaj branĉoj de la ŝtato, kompakte rilatas al la popola vivo. Dum pli ol 30 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio stariĝis pli ol 40 tekstilaj fabrikoj en nia urbo sur la Nordĉinia Ebenaĵo, kotonproduktejo de nia lando, kaj nia urbo jam fariĝis grava tekstila bazo de la lando. Ni devas kaj povas bone fari nian aferon. Ĉiujare nia fabriko superplenumis sian produktan planon, kaj ĝia fajna poplino ricevis oran premion de la ŝtato kaj ĝuas grandan renomon en la mondo. Kaj nian teksistinan vivon akompanas ĝojoj kaj ridoj, kvankam ni estas ŝarĝitaj per laboro pli-malpli peniga.



Zhang Lihua kune kun siaj edzo kaj infano

Ni laboras ne nur energie, sed ankaŭ lerte. Ofte ni diras “energio plus lerto”, tio signifas, ke necesas perfektigi teknikon kaj fari teknikajn renovigojn. Inter niaj maŝinoj transformitaj dum la pasintaj jaroj, iuj estis renovigitaj de laboristoj mem. Tiel nia laborefiko plialtiĝis kaj niaj laborkondiĉoj pliboniĝis. En nia fabriko ofte okazas interŝanĝo de produktaj spertoj kaj diskuto pri teknikaj problemoj. Plej plaĉas al mi la teknika prezentado de teksistinoj, kiu okazas ĉiunprintempe, ĉar tio estas por mi bona ŝanco lerni. Sed dum la unua tempo de mia teksado turmentis min maltrankvilo, ĉar mi ne povis ĉiunmonate plenumi la produktan planon. Nelonge poste mi rigardis teknikan konkurson inter fabrikoj. Mi vidis kun admiro, ke laboristino de najbara fabriko tre vigle prezentadas kaj ĉiun movon ŝi faras akurate kaj lerte. De tiam mi mem restis en la teksejo post la laborhoroj por lerni nodadon kaj aliajn fundamentajn teknikojn. Al mia ĉiutaga teksado mi donis tre grandan atenton. Kelkfoje mi intence

rompis fadenojn kaj tuj faris nodojn per ili por provi mian lertecon. Dank’ al mia ĉiutaga ekzercado, mi jam bone scipovas la teksarton. Multfoje miaj kolegoj proponis min kiel partoprenanton en teknikaj konkursoj inter lertulinoj de la fabriko aŭ de la urbo. Dum la pasintaj ja-

roj mi estis elektita kiel avangarda laboristino kaj oni dufoje altigis mian salajron. Ĉiunmonate mi ricevas la plej altan premion en nia teksejo pro pliproduktado.

Fine miaj gepatroj komprenis la signifon de mia laboro. Ili kuraĝigis min, ke mi ne haltu sur la vojo irata de mi mem.




SHANGHAI-A PORSATELITA TER-STACIO ATINGIS UNUAGRADAN NIVELON

En la pasinta jaro la seninterrompa servado de la Shanghai-a Porsatelita Ter-stacio, laŭdata de iu internacia kompetenta organizaĵo, estis duafoje klasifikita en unuagradan nivelon.

La stacio estis projektita kaj konstruita de Ĉinio. La mondo

havas 212 tiajn staciojn. La stacio estis menciita de la Internacia Satelita Organizaĵo en ĝia aktaro pri kvalito de la laboro de la stacioj en la unua duono de 1981.

La Shanghai-a Stacio estis konstruita en 1973 kaj telekomunikas kun Usono, Japanio, Aŭstralio, Tajlando, Singapuro, Hongkongo k. a. lokoj de la mondo pere de la komunika satelito “4f8” super la Pacifiko.



de SONG ZHENWEN

Ilustraĵo de Lu Dacheng

PLEJPARTO de la loĝantoj de Beijing ŝatas viziti en ferioj kaj festotagoj la Imperiestran Palacon, la Someran Palacon, Xiangshan-monton kaj aliajn belajn lokojn. Sed de la lastaj jaroj iuj urbanoj, precipe gejunuloj altirate de la pejzaĝoj de Shidu, arope veturas tien por somerumi. Ili grimpas montojn, naĝas, remas en kaŭĉukaj boatoj, ĝuas sunbanon kaj muzikon kaj ĝoje piknikas. Ili raviĝas de la naturo.

Shidu, montvilaĝeto kun malmultaj loĝantoj, situas en Fangshangubernio, ĉ. 90 kilometrojn sudokcidente de Beijing. Antaŭe estis neniu ponto super Juma-rivero kaj oni devis 10-foje transiri ĝin por veturi de Zhangfang-vilaĝo ĝis Shidu, inter kiuj estas ĉ. 20 kilometroj. Tial tiu loko ricevis la nomon "Shidu", kiu signifas 10-fojan transiron. Nun Shidu ampleksas ne nur unu vilaĝon, sed ankaŭ belajn montojn kaj akvon ĉirkaŭe.

La klarega Juma-rivero serpentas en la montaro. Pro miljara erozio formiĝis krutajoj interesaj. Norde de la vilaĝo staras la okulfrapa Vesperta Monto. Tiu nuboskrapanta

monto aspektas kiel vesperto kun disetenditaj flugiloj. Vilaĝanoj diris, ke nur unu vojeto malantaŭ la monto kondukas al ĝia supro. Ili nomas ĝin Ĉiela Vojo, kiu signifas, ke laŭ ĝi oni povas iri rekte al la Ĉiela Palaco.

Irinte de Shidu-vilaĝo 1-2 kilometrojn nordorienten laŭ Juma-rivero, oni atingas la Budhorigardan Altanon, kiu fakte estas nur rokego elstaranta en Juma-rivero kun alteco de 8-9 metroj. Ĝia supra parto havas areon de ĉ. 40 kvadrataj metroj kaj en ĝia malsupra parto estas kaverno fosita de la torento. La kaverno estas malvarmeta kaj antaŭ ĝi steniĝas arĝenta strando. Vere agrabla loko por somerumi. Okcidenten rigardante sur la altano, oni povas vidi fore la vorton "budho" ĉizitan sur rokmuro de la kontraŭa monto, tial la altano ricevis tiun nomon.

Malsupren irinte de la altano, transirinte la riveron kaj marŝinte kontraŭflue, oni baldaŭ atingas la plonĝan terason. Ĝi estas giganta roko. Sub ĝi estas lazura lageto, kie fiŝoj naĝadas libere. Estas interese, ke tagmeze de la varmegaj someraj tagoj testudoj grimpas surborden.


Daŭre marŝinte ĉ. 2-3 kilometrojn laŭ la rivero, oni povas vidi du montojn starantajn unu tuj apud la alia. La rivero torentas tra la ravino inter ili kvazaŭ tra pordego, tial oni nomas la lokon "ŝtona pordego".

Malantaŭ la Ŝtona Pordego la montaro pli kaj pli krutiĝas. Irinte plu antaŭen, oni atingas Pingyu-vilaĝon, ĉe kiu staras alta monto Donghugang, pli kruta ol la Vesperta Monto. Ŝajnas, ke troviĝas neniu vojo sur la krutajoj. Tiam montvilaĝanoj montras al la vizitantoj zigzagan vojeton en la orienta flanko kondukantan al la montsupro. Malsupren rigardante sur la montsupro, oni povas vidi, ke agloj ĉirkaŭŝvebas la valon, kaj Juma-rivero, kiel zigzaga arĝenta zono, sin kaŝas inter la montoj. Interesas la ekskursantojn ankaŭ la ronda lageto kun areo de 100 kvadrataj metroj sur la montsupro, kiu trembrilas en la sunlumo.

Tie oni povas ne nur somerumi, sed ankaŭ gustumi freŝajn fruktojn en aŭtuno. En ĉiuj vilaĝoj kreskas persimon- kaj jujubarboj. Kaj oni povas akiri tie freŝajn, dolĉajn fruktojn tre malkarajn.


Pejzaĝoj de Shidu

Fotoj de YAN JIN kaj HAIFENG



Ĉe la rivero Juma

Foto de MA XIAOQING



Nubskrapantaj montpintoj



En aŭtuno



La unua ponto de Shidu

FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

Aŭgusta pejzaĝo de
norda Finnlando
de AINO PETKOV
(Finnlando)



Stufitaj
viandbuloj



TOM PRI LA ĈINAJ PLADOJ

La ĉina kuirarto estas parto de la brila kultura heredaĵo kreita de la ĉina laboranta popolo dum longa periodo. La ĉinaj pladoj bongustaj, aromaj kaj en plaĉaj koloroj estas ne nur plezuraj al la ĉinoj, sed ankaŭ interesaj al eksterlandaj amikoj, kiuj havas ŝancon ilin gustumi. Ĉar ni ricevadis leterojn de legantoj, kiuj petis nin prezenti ĉinajn pladojn, por ke ili povu mem kuiri kaj ĝui manĝojn kun ĉinaj gustoj, ni decidis aldoni la rubrikon "Ĉinaj Pladoj" al nia revuo ekde tiu ĉi numero. En tiu ĉi angulo ni prezentos al vi krom ĉinaj pladoj ankaŭ iujn el la ĉinaj ĉefmanĝaĵoj kaj supoj. Ni elektos por vi tiajn pladojn, kies materialo estas facile akirebla kaj la kuirado ne tre komplika.

La plena listo de la ĉinaj manĝoj ampleksas pli ol dekmil pladojn kaj la kuirarto konsistas el pli ol 40 kuirmanieroj, inkluzive de rosto, stufo, frito, boligo, fumaĵado, frikaso, brogo kaj bako. La ok specoj de lokaj pladoj el Beijing (Pekino), Jiangu (Giangsu), Anhui, Sichuan (Siĉuan), Hunan, Fujian (Fugian) kaj Guangdong estas plej famaj. Ĝenerale tiuj el Beijing kaj Shan-


dong (Ŝandong) estas karakterizataj de forta bonodoro; tiuj el Jiangu kaj Anhui de milda kaj freŝa gusto; tiuj el Sichuan kaj Hunan de akra gusto pro uzo de papriko; kaj tiuj el Fujian kaj Guangdong de lerte kuiritaj maraj nutraĵoj. Kompreneble inter la pladoj el la nomitaj lokoj troviĝas iuj aparte famaj. Ekzemple inter tiuj de Beijing plej famaj estas la rostita pekina anaso, la brogita ŝafajo, rostita ŝafajo kaj porpalacaj pladoj.

Multaj scias, ke la ĉinoj kutime uzas manĝbastonetojn por preni rizajon, viandon kaj legomon, kaj kuleron por ĉerpi supon. Ĉar la viandaĵoj por ĉinaj pladoj estas plejparte pecigitaj, oni dum manĝado ne bezonas uzi tranĉilojn kaj forkojn kiel la eŭropanoj. La paro de manĝbastonetoj estas uzata en jena maniero: Unu el la du bastonetoj estas fikse tenata inter la dikfingro kaj la montra fingro kun la malsupra parto apogita sur la ringofingro iom kurbigita; la alian oni tenas per la meza kaj montra fingroj laŭ la maniero kiel oni kutime tenas kraĵonon (vidu la bildon). Tenu la bastonetojn en or-

do, movetu tiun tenatan de la montra kaj meza fingroj, tiel ke la paro servu kiel pinĉilo taŭga por preni manĝaĵojn.

Ĉe festena tablo en Ĉinio la mastro kaj la ĉefa gasto prenas la honorajn sidlokojn vizaĝe al la sudo. Kiam komenciĝas la manĝado, la mastro unue prenas la plej bonan parton de la plado kaj ĝin donas al la honora gasto. Ĝenerale la unua plado estas malvarma, kiel ekzemple kunmetitaj legomaĵoj kaj viandaĵoj. La ĉefaj pladoj ofte estas pli ol kvar pladoj el viando, fiŝo, salikoko kuiritaj en oleo aŭ graso. Post la malvarma plado ofte sekvas unu aŭ du dolĉaj pladoj kaj poste abundaj pladoj kun tuta koko, tuta anaso aŭ tuta fiŝo. Je la fino oni donas supon kaj po bovleton da rizajo al la manĝantoj. Eĉsepte de rizajo, ĉiuj manĝaĵoj estas surtabligataj en grandaj teleroj por la kunmanĝantoj.

Provu mem prepari ĉinajn manĝaĵojn laŭ la donotaj receptoj kaj klarigoj pri kuirado. Eble vi fuŝos en la komenco, tamen certe vi sukcesos finfine. Do bonan apetiton al vi, karaj amikoj!



Stufitaj Viandbuloj

RIMARKINDAJ KARAKTERIZAĴOJ: HELA ROZKOLORO, PLAĈA GUSTO, NEGRASA SUPO

MATERIALOJ:

negrasa ripoviando de porko	500 g.
brasikaj internaĵoj	100 g.
viandsupo (sen viando)	1,000 g.
ovoblanko de du kokovoj	
tritika vino*	5 g.
tubajlo** kaj pistita zingibro	10 g.
amelo	15 g.

PREPARADO:

1. Dishaku la porkaĵon ĝis taŭgeco por pasteĉo, enmiksi la ovo-blankon, vinon, salon, tubajlon pecigitan, pistitan zingibron kaj amelon. Faru el la sufiĉe kirlita miksaĵo 4 viandbulojn.

2. Verŝu la viandsupon en poton (prefere argilan), aldonu al ĝi salon, vinon kaj boligu. Poste metu la viandajn bulojn en la supon,

kovru la poton per la tegilo kaj kuiradu du horojn per milda fajro. Fine metu la pecigitajn brasikajn internaĵojn en la supon, denove boligu ĝin kaj tiam pretiĝas la bongustaĵo.

* Anstataŭigebla per neforta vino.

** Tubajlo (*Allium fistulosum*) estas anstataŭigebla per bulbo.



SHI CHEN:

Glaĉerologo

Shi Yafeng

Glaĉerologo Shi Yafeng

PASINTAN majon fama ĉina glaĉerologo Shi Yafeng estis elektita kiel membro de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Tiu 63-jara specialisto estas afabla kaj multescia. Li gvidas la esploristojn de la Lanzhou-a Glaĉera kaj Kriogrunda Instituto de la nomita akademio por pli bone koni la misterojn en tiu sfero.

Jam en la unuaj jaroj post la fondo de la nova Ĉinio li montris sin fervora por disvolvi novajn sciencojn, solvi novajn problemojn kaj plenumi novajn taskojn. Ekde 1958 li iniciatis studon de nuntempaj glacikampoj en Ĉinio, organizis kaj partoprenis esploradon de glaciejoj en la montaroj Qilian, Tianshan, Himalaya kaj Karakorum, proponis kaj organizis studon pri kriogrundo kaj kotŝtona fluo, fondis glaĉeran kaj kriogrundan instituton, kulturis sciencistojn kaj teknikistojn, rikoltis nombron da fakaj fruktoj kaj per ĉio ĉi kontribuis al tiuj novaj sciencaj branĉoj de Ĉinio.

Somere de 1957 Shi Yafeng kun esplora taĉmento venis en la nordokcidentan parton de Ĉinio por studi la ĉinan geomor-

fologian dispozicion. Terura soifo ofte turmentis ilin. Iun nokton kuŝante en jurto post longa irado en Gobio, li neniel povis endormiĝi. En lia cerbo ekaperis senhoma dezerto kaj fendiĝinta tero, ĉe liaj oreloj aŭdiĝis kvazaŭ la voĉo de la soifantaj nordokcidentanoj: "Akvo, akvo. . ." Jes, kiom terure soifas la popolo kaj la tero! Sed kie trovi akvofonton en tiu senlima Gobio? Li dronis en medito. Jen prezentigis antaŭ li bildo de altebenaĵo kaj li vidis tre riĉan naturan akvofonton. Tiam fulmigis lian saĝon la ideo postuli akvon de glaciriveroj kaj neĝmontoj.

La sekvantan matenon li diris sian penson al la kunesploristoj, kaj ĝin ili tuj aprobis. Ili formis grupon de kvar personoj, kiuj surkamele rajdis al al glacirivero pli ol 4,000 metrojn super marnivelo. Alproksimiĝinte, ili vidis neĝkovritan valon. Ili ĝin gustumis kaj kriis preskaŭ unuvoĉe: "Kia granda glacitenejo!"

Shi Yafeng tuj telefonis al gvidanto de la akademio kaj proponis organizi ĝeneralan taĉmenton por esplori la provincojn Qinghai (Kinghaj) kaj Gansu.

Lia propono estis tuj aprobita. Kaj ekde tiam li fariĝis ne disigebla kun glaciejoj sur altaj montoj.

Baldaŭ la unua ĉina taĉmento de pli ol 100 personoj, sub lia gvido, entreprenis esploron pri 10 glaĉeraj regionoj, 32 glaĉeraj grupoj, 135 glaĉeraj blokoj kaj 941 grandaj kaj malgrandaj glaciriveroj, prezentis klaran bildon pri la dispozicio kaj tipoj de la glaĉeroj sur Qilian-montaro, taksis la konservokvanton de ilia akvo kaj skribis "Raporton pri Esplorado de Nuntempaj Glaĉeroj sur Qilian-montaro". Li pensis, ke estas necese solvi la problemojn kaj de akvofonto kaj de scienca teorio pri glaĉera geomorfologio.

Minacate de lavango, ŝtormo, superakvo kaj blindiga lumo, Shi Yafeng pasigis tiujn jarojn en malfacilega situacio, tamen atingis sinsekvon da novaj sukcesoj en sia esplorado. Foje, kiam li surgrimpis la supron de Qilian-montaro, iu taĉmentano perdis siajn neĝokulvitrojn. Tiam Shi Yafeng demetis la siajn kaj ilin donis al la perdinto. Post nur kelkaj minutoj ŝveliĝis liaj oku-

loj, li eksentis doloregon kaj resaniĝis nur post unu semajno.

Kiam li gvidis sian taĉmenton por esplori glaciejojn sur la norda deklivo de la montpinto Xixabangma, aperis multaj malfaciloj. Pro manko de oksigeno ili devis anheli preskaŭ ĉiufoje post kelkpaŝa grimpado. Ili, senfortiĝintaj, povis nur rideti unu al alia anstataŭ malfermi la buŝon por paroli. Transgrimpinte interkruciĝantajn glaciajn zonojn kaj transpasinte interkavernan glaciponton en valo, ili eniris glacian kavernon en formo de ŝranko kaj vidis eĉ "fean landon" kun mirinda pejzaĝo: La glacia kaverno trembrilis interne kaj ekstere. Sub ĝia alta glacia muro kuŝas glacilago kiel klara spegulo. En la kaverno staras grandegaj glaciaj stalagmitoj en diversaj formoj kaj vicoj da kristalaj glaciaj stalaktitoj kiel lampoj pendas super la kapo. La sunlumo penetras en aron de glaciaj piramidoj, kaj tiel la kaverno fariĝas bunte brila kiel fajraĵo. La vidaĵo faris ilian vivon pli agrabla kaj la nova eltrovo multe inspiris ilin.


Dum la pasintaj 20 jaroj Shi Yafeng gvidis sian taĉmenton por atingi pli ol 50 ĉefajn glaciriverojn, klasifiki kaj statistiki la pli ol 10,000 glaciriverojn jam konatajn. La libro "Ĉefa Karakterizaĵo de Nuntempaj Glaĉeroj de Ĉinio" kaj la atingoj en la esplorado de la montpintoj Xixabangma kaj Qomolangma kaj la glaĉero de Batula, ĉiuj sub lia prizorgado, estis premiitaj de la Ĉina Akademio de Sciencoj. En la pasintaj kvin jaroj li publikigis 13 sciencajn disertaĵojn. Lastatempe li elmetis la problemon pri kunlaboro por ampleksa esplorado de ĉirkaŭ triono de la sekaj kaj duonsekaj regionoj de Ĉinio.

En la studo de nuntempaj glaĉeroj li havas sisteman resumon kaj regulan konon pri la dispozicio, karakterizaĵo kaj ŝanĝiĝo de ĉinaj glaciejoj, kaj liaj atingoj estas agnoskitaj kaj aplikataj en kaj eksterlande. Li la unua elokvente klarigis la formiĝon de arbaro de mirindaj glaciaj piramidoj sur la montaro Himalaya. La kolektiva atingo en la esplorado de la glaĉero de Batula sub lia gvido proksimas al internacia avangarda nivelo. Li elpensis teorion de ekvilibro por kvanto de onde moviĝanta glacio

kaj donis kvantan prognozon pri la plej granda progreso de la glaĉero de Batula en la nuna jarcento, kaj per tio li efike helpis la konstruon de ŝoseo inter Ĉinio kaj Pakistano kaj elekton de la loko por pontoj en tiu regiono.

En sia raporto al monda glaĉer-klasifika konferenco okazinta en Svedio en la vintro de 1978, li rakontis pri siaj esploroj kaj fakaj atingoj, kiuj mirigis eksterlandajn sciencistojn kaj ricevis iliajn laŭdojn.

Shi Yafeng (meze) esploras en montaro.



KANTO DE JUNECO

La Unua Parto

Romano de ĉina verkistino

Yang Mo

(Zigzaga kaj kortuŝa historio de juna studentino en la malnova Ĉinio”

Esperantigita de Yang Yongsen

Ilustrita de Hou Yimin

Eldonita de “El Popola Ĉinio”

(10-Es-605P)

130 × 184 mm. 312 paĝoj broŝ.

kun ilustraĵoj kaj mapo

Prezo: £1.90 US\$3.90



SIMIOJ PROVAS ELAKVIGI LA LUNON

Kolora Infanlibro

(Du bildrakontetoj pri petolaj simioj)

Teksto de Xia Xia

Bildoj de Wan Laiming


Eldonita de la Ĉina Esperanto-Ligo

(Tria eldono)

(88-Es-61P)

210 × 260mm. 16 paĝoj


Prezo: £0.50 US\$0.95



Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Peranto de EPC

aŭ: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj
Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O.
Kesto 313, Beijing, Ĉinio

CHENG ZHIMING:



Gao Wenhe, hani-a luktisto de Yunnan-provinco

ESPERIGA

LUKTOMANIULO

GAO Wenhe estas brava hani-a luktisto de Ĉinio. Li kvinfoje sinsekve gajnis la landan ĉampionecon pri libera luktado en la 48-kilogramo kategorio. En julio pasintjare li partoprenis la Mondan Studentan Sportkunvenon en Rumanio. Tiel grandan internacian konkurson li partoprenis unuafoje, kaj per brava persistemo gajnis la kvaran lokon en sia disciplino. Tian sukceson ĉinaj luktistoj neniam atingis en tiu sporto kadre de monda konkurso.

Oni eble pensas, ke Gao Wenhe estas veterano kun riĉa sperto. Sed fakte li estas 23-jara kaj komencis lerni liberan luktadon nur antaŭ tri jaroj. Kio estas la sekreto, per kiu li akiris tiel bonan sukceson en tiel mallonga tempo?

La respondo estas simpla: li estas diligenta kaj pripensema en lukta trejnado.

Gao Wenhe naskiĝis en familio de hani-a kamparano en Yuanyang-gubernio, Yunnan-provinco, en sudokcidenta Ĉinio. Tie la tero estas fekunda kaj la pejzaĝoj belaj, kaj precipe

en vintro kaj printempo ofte aperas variaj naturaj mirindaĵoj pro abundo de nuboj kaj nebuloj. Deantikve la laboremaj kaj bravaj hani-oj, kiuj vivas en tiu loko, amas luktadi. En festaj tagoj ili okazigas luktokonkurson, kaj la venkinto ĉiam ricevas respekton de la publiko. En sia infaneco Gao Wenhe plej ŝatis rigardi lukton kaj revis fariĝi lukta heroo.

Post lecionaj horoj li ĉiam volis lukti kun siaj kamaradetoj. Riverbordo, herbejo, draŝejo kaj korto estis ilia luktejo. Komence li rigardis luktadon nur pro intereso, iom post iom li eklernis serioze, memoris ĉiun movon de luktistoj kaj sin ekzercis, imitante iliajn movojn foje kaj refoje. Eĉ kiam la brakoj ŝveliĝis kaj la gamboj kontuziĝis pro tio, li ankoraŭ daŭrigis sian ekzercon.

Multaj aferoj en la mondo estas tiel okazintaj. Se nur vi estas ravita per luktado kaj kuraĝe praktikas ĝin, vi certe akiros sukceson. Kun la tempopaso, la lukta tekniko de Gao Wenhe estis multe altigita. En

malsupera mezlernejo li jam estis elstara luktisto en sia gubernio. En 1976, kiel reprezentanto de la lernejo, li partoprenis la naciecan luktokonkurson de la gubernio kaj gajnis la duan lokon pro luktado en la 42-kilogramo kategorio. Post du jaroj, kiel membro de la gubernia luktoteamo, li partoprenis la provincon konkurson kaj gajnis la ĉampionecon en la 45-kilogramo kategorio. Rigardinte lian luktadon, spertuloj diris, ke li estas esperiga sportisto.

Post nelonge oni sendis lin al la provinca luktotrejna teamo. La teamaj gvidantoj postulis, ke Gao Wenhe lernu liberan luktadon. Kvankam la libera luktado estas simila al tiu de lia nacieco, tamen ankoraŭ iuj movoj estas lernindaj, ekz. la movo brakumi gambon, kiu estas grava rimedo en la libera luktado. Por bone posedi la arton de libera luktado, oni devas ellerni la movon. Komence Gao Wenhe ofte malsukcesis brakumi gambon de sia rivalo. Eĉ brakuminte la gambon li ne sukcesis kapti ĝin fikse. Por ellerni tiun movon li pripensadis la esencajn

punktojn de la movo kaj neniam enuis. Li ofte pliigis sian ekzercadon post plenumo de la difinita trejna programo.

Iufoje, kiam li ekzercis sin per la movo brakumi gambon de rivalo, li kontuzis sian dekstran oretradikon. Kiam lia kontuzita orelo ektuŝis la korpon de la rivalo, li tuj sentis pikan doloron. Lia trejnisto ordonis, ke li foriru por ripozi, sed li persistis sin trejnadi. Reveninte, li faris por sia orelo varman kompreson kaj en la sekvanta tago regule iris al la trejnejo. La aliaj teamanoj profunde kortuŝiĝis de lia spirito.

Gao Wenhe lernis la luktan arton konsciencie, tial li rapide komprenis kaj posedis novajn teknikojn. Komence, kiam li ekzercis sin per libera luktado, li ofte brakumadis la du gambojn de rivalo, sed lia kapo ofte estis pinĉita de la rivalo per la gamboj, kio metis lin en pasivecon. Por sukcesi en luktado, helpate de sia trejnisto, li atente lernis teknikon ofte uzatan de diverslandaj luktistoj brakumi unu gambon de rivalo. Post ekzercado de certa tempo Gao Wenhe lerte posedis tiun teknikon. Li formis sian apartan stilon rapidan kaj varian kun tiu tekniko kiel la ĉefa trajto kaj per tio gajnis sukceson en pluraj grandaj konkursoj. Spektantoj laŭdis lin kiel esperigan luktomanulon.



LI PING:

“Feniksoj Ekkantas sur la Monto Qishan”

—PRI NOVA DANCODRAMO LAŬ HISTORIA MITO

ANTAŬ nelonge la Danco-drama Trupo de la Shanghai (Ŝanhaj)-a Operejo prezentis en Beijing (Pekino) la nomitan dancodramon.

Tiu dramo estas adaptaĵo de antikva ĉina mito-romano “Diigo de Homoj” kaj historiaj materialoj. Ĝi spegulas per formo de mito gravan eventon en la ĉina historio, fame konatan kiel “Puna militiro de reĝo Wu kontraŭ reĝo Zhou”. Reĝo Zhou, la lasta reganto de Shang-dinastio en la periodo de la ĉina sklava socio antaŭ ĉ. 3,000 jaroj, estis fifama diboĉema tirano. Li estis kruelega al la sklavoj kaj per sia tiranado akriĝis la sociajn kontraŭdirojn. Reĝo Wu, origina tribestro sub lia regado, gvidis sklavan militon kaj post sanga batalado fine detronigis la tiranon kaj fondis Zhou-dinastion.

Kiam malfermiĝas la kurteno, aperas antaŭ la rigardantoj sceno pri la sklava socio: sklavoj pendantaj kun la kapo malsupren, rostataj per fajro aŭ trenataj de ĉevalo. La dua sceno priskribas la diboĉadon de reĝo Zhou en forta kontrasto al la

unua sceno. La intrigo disvolviĝas ekde la savo de sklavino Ming Yu fare de reĝo Wu en kontrasto kun la diboĉado de reĝo Zhou kun sia sorĉe bela edzino Daji, transformita de vulpo, kiun alvenigis la perfidema kortegano Fei Zhong. Reĝo Zhou tuttage drinkadas kaj amuzas sin kune kun Daji, ne prizorgas la ŝtatajn aferojn, metas perfidemajn korteganojn en gravajn postenojn kaj kruele torturas korteganojn, kiuj kuraĝis admoni aŭ kritiki lin. Li eĉ ordonas malfermi al iuj la bruston kaj elpreni la koron. Ankaŭ reĝo Wu venas al la limo de tolero kaj elpaŝas por indigne riproĉi reĝon Zhou, kaj pro tio li estas kruele torturita. En la kriza momento de vivdanĝero li estas savita de dio. Sur la monto Qishan li denove renkontiĝas kun Ming Yu ĉiamaniere insultata kaj turmentata de reĝo Zhou kaj Daji. Ili malkaŝas sian amon unu al la alia kaj ĵuras puni la tiranon per armitaj trupoj. En la fino reĝo Wu atakas per siaj trupoj kaj venkas la malamikan armeon. Reĝo Zhou estas bruligita kaj Daji reprenas sian originan formon de vulpo.

Tiam la popolo ĝojkrias kaj feniksoj — la simbolo de feliĉo — ekkantas sur la monto Qishan. Naskiĝis la nova Zhou-dinastio.

La dancodramo “Feniksoj Ekkantas sur la Monto Qishan” aplikas ĉefe solojn kaj duetojn el nia nacia dancarto kaj samtempe ankaŭ uzas certajn esprimmanierojn de baletoj kaj moderna dancarto. Krome oni ankaŭ sorbis por la verko nutraĵon el antikvaj pentraĵoj kaj survazaj desegnaĵoj por formi ĝian apartan stilon.

Por profunde speguli la spiritan mondon de la herooj en la epopea dancodramo, la koregrafo kuraĝe aplikis la skizitan esprimmanieron de filmoj rompante la limon de tempo kaj spaco. Ekzemple en la tria sceno reĝo Zhou deziras ĉirkaŭflirti Ming Yu, kio timigis la sklavinon kaj flamigis la ĵaluzon de Daji. En la komenco verda lumkolono vidigas nur la avidan kaj diboĉeman tiranon dum la aliaj roluloj kaŝiĝas ĉiu en aparta angulo sur la malluma scenejo. Kiam malaperas la verda lumo, ruĝa lumkolono montras Ming Yu kuntiriĝantan pro timo. Kiam la ruĝa lumo malaperas, purpura lumkolono vidigas la kruelan virinon Daji. Fine ekbrilas samtempe la tri lumkolonoj, montrante la tri personojn samtempe. Kvankam ili dancas laŭ la sama melodio kaj eĉ faras saman dancmovon, tamen la tri prezentas tute malsamajn karakterojn kaj animstatojn.

La ĉefa koregrafo de la dancodramo Zhong Lin estas kona-

ta nacistila dancisto, kiu partoprenis en verkado de la baletoj “Magia Lotuslanterno”, “Glaveta Asocio” kaj “Hou Yi kaj Chang E” kaj la muzika-danca epopeo “Ruĝas la Oriento”. En sia kreado de “Feniksoj Ekkantas sur la Monto Qishan” li klopodis karakterizi ĝin per lakoneco kaj imponeco en strukturo, simpleco en stilo kaj brileco en koloroj.

Ankaŭ en muziko kaj dekoraĵoj tiu dancodramo prezentis ion originalan. Por trovi antikvajn muzikaĵojn, la juna komponisto Liu Nianju faris vastan esploron, migrante tra duono de nia lando. En la muziko por la dramo li faris relative lertan kombinon de ĉina klasika muziko kun moderna kompona arto. La desegnistoj konsultis bronzaĵojn de la antikvaj dinastioj de Shang kaj Zhou kaj tiel aranĝis, ke la dekoraĵoj prezentu fortan lirikecon kaj karakteron de la koncerna tempo.

Aparte menciinde estas, ke la ĉefaj roluloj de la dancodramo estis junaj aktoroj kun aĝo de ĉirkaŭ 20 jaroj. Junulino Zhou Jie, kiu ludis la rolon de Daji, estis nur 19-jara. Ŝi brile ludis la rolon de maliculino kaj per sia arto profunde impresis la rigardantojn.

Multaj eksterlandaj amikoj en Beijing rigardis la dancodramon. La estro de la Verkista Delegacio de Jugoslavio, kiu antaŭe funkciis kiel estro de la Beograda Teatro, diris kun varma koro, ke la bonega temo havigis al la dancodramo riĉan enhavon, kiu formis la bazon por ĝia sukceso.



Duopa danco de reĝo Wu kaj Ming Yu




Duopa danco de reĝo Zhou kaj Daji



Triopa danco de reĝo Wu, Ming Yu kaj Daji

DILIGENTA KNABINO



Veterana edukisto Ye Shengtao subskribas por memoro al Zhao Shuang.

EN la Internacia Leterskriba Konkurso por Geknaboj en 1981, kiun iniciatis la Universala Poŝta Unuiĝo, la ĉina mezlernejanino Zhao Shuang gajnis la ĉampionecon kaj antaŭ nelonge la Juĝa Komisiono de Ĉinio transdonis al ŝi en Beĵing (Pekino) oran medalon kaj honoran atestilon pro la internacia konkurso. Okaze de tiu ceremonio mi intervjuis la diligentan 14-jaran knabinon.

Zhao Shuang estas lernantino de la unuajara klaso de la Supera Mezlernejo por Infanoj de Fabrikoj kaj Minejoj en la Ili-a Kazaha Aŭtonoma Subregiono de Xinĵiang. Ŝia plaĉa vizaĝo kun paro da grandaj brilaj okuloj impresis per inteligenteco. Ŝi naskiĝis en ordinara familio ĉe Ili-rivero. Ŝia patro instruas lingvon kaj literaturon en la mezlernejo kaj ŝia patrino estas laboristino. Ekde kiam ŝi komencis viziti lernejon en la aĝo de ses kaj duona jaroj, ŝi ĉiam ricevis bonegajn notojn. Ŝi estis elektita kiel eminenta lernantino dum la lernoperiodo de elementa lernejo kaj elementa mezlernejo. Por kulturi ŝian imagkapablon, preskaŭ ĉiuvespe-

re ŝia patro rakontis aŭ voĉlegis novelon kompreneblan por ŝi. Poste ŝi mem komencis legadi novelojn kaj romanojn. Dum ŝi vizitis elementan lernejon, ŝi legis la romanon "Ĉe Akvorando", kiu priskribas ribelon de kamparanoj en la antikva Ĉinio, "Elektitaj Fabeloj de Andersen", "Patrino" de M. Gorkij kaj aliajn literaturajn verkojn ĉinajn kaj alilandajn, ankaŭ ĉinajn klasikajn poeziaĵojn kaj premiitajn literaturaĵojn aperintajn en la lastaj jaroj en nia lando. Hodiaŭ sur ŝiaj librobretroj jam troviĝas ĉirkaŭ mil libroj.

Diligenteco kaj penemo estas la elstara karakterizaĵo de la lernado de Zhao Shuang. Ĉiutage ŝi klopodas trovi tempon por legi kaj fari notojn pri la legaĵoj. Ŝi skribadas taglibron por sin ekzerci per verkado. Dum la trijara lernado en elementa mezlernejo, ŝi skribis ĉirkaŭ ducent mil ideografiaĵojn en siaj taglibroj, kiuj notis ŝiajn pensojn, sentojn, interesaĵojn en la vivo, diversajn personojn kontaktitajn, la medion kaj vivoscenojn kun naciaj kaj lokaj karakterizaĵoj. Ŝi atente observadas kaj zorge notas la aferojn. Ekde la antaŭ-

lasta jaro ŝi komencis sin ekzerci per verkado de noveloj kaj eseoj.

La verko, per kiu Zhao Shuang gajnis la premion de la Internacia Leterskriba Konkurso por Geknaboj, havas la titolon "Unu Tago de Leterportistino". Tiu artikolo kun freŝa ideo, kompakta strukturo kaj senluksa lingvaĵo prezentas la fratecon inter hanaj poŝtistoj kaj nacimalplimultaj popolanoj.

"Kiel vi sukcesis krei la premiitan verkon?" mi demandis ŝin.

"Mia artikolo estas ankoraŭ ne bona," honteme diris Zhao Shuang. "Mi ŝatas literaturon kaj kutime klopodas multe min ekzerci per verkado, pensado, observado kaj kolektado de materialoj. Miaj skribaĵoj plejparte temas pri miaj propraj travivaĵoj." Ŝi diris al mi, ke ŝia verkaĵo por la konkurso prenis kiel modelon iun veteranan poŝtiston de la mineja poŝtoŝicejo. "Mi ofte sendas leterojn al miaj parencoj en aliaj lokoj," ŝi diris, "tial mi frekventadas la poŝtoŝicejon. La diligenta laboro de la tieaj oficistoj min kuraĝigadis." Por sukcese krei la figuron de la

D-ro P. Neergaard en Ĉinio

D-ro P. Neergaard en la tekunveno aranĝita de ĈEL kaj EPC



D-ro P. Neergaard (la kvara de maldekstre) en la inaŭguro de la semopatologia kaj kvarantena kurso



Dana esperantisto d-ro P. Neergaard, mondfama semopatologo, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, refoje vizitis Ĉinion por prelegado, laŭ invito de la Agrikultura Ministerio de Ĉinio.

En la 5-a de oktobro 1981 inaŭguriĝis en Beijing la semopatologia kaj kvarantena kurso, kiun vizitis pli ol 200 profesoroj kaj agronomoj el diversaj lokoj de Ĉinio. En ĝi donis salutvortojn Zheng Zhong, vicministro de la Agrikultura Ministerio.

La 15-an de la sama monato la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la redakcio de EPC kune aranĝis tekunvenon por bonvenigi d-ron P. Neergaard.

Vespere de la 22-a, li ĉeestis la ŝtatan bankedon faritan de la ĉina registaro por bonvenigi danan ĉefministron Anker Joergensen kaj lian edzinon. La 24-an de oktobro d-ro P. Neergaard forlasis Beijing por viziti Shanghai, Hangzhou kaj Guangzhou.



Ye Junjian (Cicio Mar), membro de la Konstanta Komitato de ĈEL, kaj P. Neergaard


S-RO GEOFFREY SUTTON— VOLONTULO POR EPCĈ

Fotoj de XIAO QIU

Rekomendite de UEA, angla esperantisto s-ro Geoffrey Sutton venis al Ĉinio laŭ invito de la redakcio de EPCĈ por labori tie unu jaron kiel volontulo. S-ro Sutton diplomitiĝis el la universitato Uppsala de Svedio, kie li studis lingvistikon. Li, fervora por la Esperanta afero, laboris en UEA kelkajn jarojn kaj funkciis kiel prezidanto de la Uppsala-a Esperanta Asocio kaj ĝenerala sekretario de la Sveda Esperantista Junulara Unio. Li atingis Beijing en la dua tagdeko de oktobro kaj ricevis bonvenigon de Ĉ. Ĉen, ĝenerala sekretario de ĈEL kaj ĉefredaktoro de EPCĈ, kaj aliaj ĉinaj esperantistoj. Li esprimis, ke li faros ĉion eblan por kontribui al nia movado kaj la amikeco inter la diverslandaj esperantistoj.



S-ro Sutton en Beijing



S-ro Sutton en la kunveno aranĝita de nia redakcio por bonvenigi lin



S-ro Sutton ekskursas kun siaj ĉinaj kolegoj.



Jin Qihua (maldekstre) en provludo de nova programero

ĈINAJ ESP-ISTOJ

PUPTĒATRA AKTORINO JIN QIHUA


Fotoj de CAI HAIFENG

Jin Qihua estas aktorino de la Ĉina Pupteatra Trupo. En 1978 ŝi partoprenis en la 11-a Pupteatra Internacia Festivalo, en kiu ŝi kune kun siaj kolegoj prezentis la ĉinan mitologian teatraĵon "Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco" kaj ricevis laŭdojn de rigardantoj de Jugoslavio kaj aliaj landoj. Ekde tiam ŝi diligente lernas Esperanton kune kun sia edzo. En 1981 ŝi estis elektita kiel konsilanto de la Pekina Esperanto-Asocio.

Ŝi aprecas kaligrafiaĵojn de sia edzo.

Jin Qihua, gastama mastrino





Si estas amatoro
de ĉina luktarto.

Dum vizito al Tajlando



UNU TAGO DE LETERPORTISTINO

2. maj. 1981

Mia kara kuzino:

Mi ĵus revenis de vilaĝo Aule pro poŝtlaboro, kiam mi ricevis vian leteron. Nun ĉe vi eble jam ĉie brilas lampoj? Kion mi skribu al vi? Nu, mi unue konigu al vi mian labortagon. Ĉu bone?

Aule estas landlima montvilaĝeto je dek kilometroj for de nia poŝt-oficejo, inter kiuj kuŝas kelke da montoj. Matene kun granda poŝt-sako kaj ladbotelo mi komencis grimpi montojn, kie prosperas verdaj pinoj. La suno, trafenante densajn foliarojn, disŝutis sian lumon sur la vojeton. Irante sola en la arbaro, mi sentis timeton. Por min kuraĝigi mi ekzumis la kazaĥan kanton, kiun mi ellernis antaŭ nelonge. Elarbariĝinte kaj transgrimpite alian monton, mi jam vidis gregojn da ŝafoj de Aule.

"Aha!" ekkriis de malproksime paŝtisto onklo Jambul, "Venas nia poŝtistino!"

Mi alrapidis al li kaj, sidiĝinte sur rokegon, frotis miajn manojn sur molaj dorslanoj de ŝafo. La laco preskaŭ tute foriĝis de mi.

"Knabino, ĉu vi laciĝis?" diris li, rigardante mian ŝvitantan vizaĝon, "vi, urba knabino, devas elteni la provadon. Ha, hodiaŭ estas naskiĝtago de mia edzino. Bonvolu gastigi ĉe ni post via letersendado."

Dirinte "ĝis revido!" al la onklo, mi remaĉis liajn vortojn. Kiel kura-

ĝigaj ili estas! Laŭ la vilaĝa avenuo mi portis leterojn al diversaj domoj.

"Ho, vi venas, onklino," kriis infanoj, vidinte min, kaj invitis min al siaj hejmoj por trinki bovinan lakton. Mi esprimis mian koran dankon kaj iris al onklino Boŝahan. Tie mi voĉlegis por ŝi la ricevitan leteron kaj skribis por ŝi respondon.

"Bonege!" ŝi diris kun ĝojo, proponante al mi laktan teon.

Forlasinte ŝian domon, mi portis leterojn al aliaj. Kiam mi palpis mian poŝt-sakon, mi trovis kelke da kuiritaj maizospadikoj. Kiu tien ilin enmetis, mi ne scias.

Jam estis tempo por la kvara leciono de la geknabaj lernantoj. Pro manko de han-lingva instruisto, mi, diplomito de la supera mezlernejo, promesis al la lernejestro, ke mi donos unu-horan lecionon, kiam mi venos tien por liveri leterojn. Mi rapidis al la lernejo, donis lecionon, interparolis kun la geknaboj kaj, kiam mi prenis la sakon por foriri, mi trovis, ke ĝi multe plipeziĝis. Krom la novaj kajeroj tie aperis ankaŭ fromaĝo, sekigitaj abrikotoj, pomtranĉaĵoj kaj aliaj manĝaĵoj.

Kiam mi finis mian laboron, ĉie leviĝis fumo pro kuirado. Jam estis tempo por prepari tagmanĝon. Ĉe la vilaĝa enirejo mi renkontis onklon Jambul, revenantan hejmen kun sia ŝafaro.

"Onklo," mi bedaŭre diris, "morgaŭ mi vizitos la onklinon."

"Morgaŭ ja ne estos ŝia naskiĝtago!" Kun tiuj vortoj li jam tiris min al sia hejmo.

Hodiaŭ la onklino aparte viglis. Rimarkinte, ke dum la manĝado mi rigardis la horloĝon de tempo al tempo, ŝi diris: "Ne estu maltrankvila! Via onklo akompanu vin hejmen!"

"Ne rifuzu," mallaŭte alparolis min la onklo, ne atendante mian respondon, "alie ŝi kulpigos min pri tio."

"Pri kio vi klaĉis kontraŭ mi?" demandis la onklino kun larĝe malfermitaj okuloj, ŝajnigante sin ofendita.

"Kial mi kuraĝas priklaĉi la mastrinon en ŝia naskiĝtago?" respondis la onklo kun serioza mieno, levante la ŝultrojn.

Tion aŭdinte, la onklino rideksplodis. Kaj ekridis ankaŭ mi...

Apenaŭ foriris onklo Jambul kun sia ĉevalo, mi prenis plumon por skribi al vi. Nun mi jam sentas min nedisigebla de la ĉi tieaj vilaĝanoj. Kiel vi opinias pri tio? Bonvolu skribi al mi.

Ĉion agrablan!

Via kuzino

ZHAO SHUANG

* Pri la aŭtoro bonvolu legi la artikolon "Diligenta Knabino" en tiu ĉi numero.

maljuna kazaĥa paŝtisto onklo Jambul, ŝi rememoris sian gastadon kune kun sia patro en vilaĝo fora je dekkelkaj kilometroj, kie loĝas popolanoj nacimalplimultaj, kaj kuraĝe aplikis literaturajn priskribajn rimedojn en sia kreado, konsultante artikolojn pri moroj kaj kutimoj de nacimalplimultoj.

Zhao Shuang kun arda amo al literaturo tamen ne neglektas la aliajn lernobjektojn. Ŝi estas rigora al si mem. Ŝi havas tri gefratetojn kaj devas plenumi sufiĉe pezan mastruman taskon kaj krome ŝia lernado estas tre streĉa. Por ŝpari la minutojn bezonatajn por plekti la harojn, ŝi fortranĉis siajn amatajn harplek-

tajojn, kaj tiamaniere ŝi povas dediĉi pli multe da tempo al lernado. Irante al la lernejo, ŝi parkerigas novajn vortojn fremdlingvaj. En la pasinta jaro, en sia ekzamena distrikto ŝi per brilaj notoj gajnis la unuan lokon en la enirekzameno al supera mezlernejo.



De la primitiva homaro al la klana socio

de BA HONG

ĈINIO estas unu el la plej fruaj generaj lokoj de la homaro. Jam de tre malproksima antikveco la praavoj de la ĉina nacio laboris, vivis kaj generis sur la vasta tero de Ĉinio. En multaj lokoj de Ĉinio oni senĉese trovas historiajn lokojn de la primitivaj homoj. La yuanmou-aj homoj trovitaj en la gubernio Yuanmou de Yunnan-provinco de suda Ĉinio vivis antaŭ 1,700,000 jaroj. Ili estis la plej fruaj primitivaj homoj en Ĉinio ĝis nun konataj. Sed la plej fame konataj primitivaj homoj, pri kiuj la materialoj estas plej abundaj, estis pekinaj simi-homoj.

PEKINAJ SIMI-HOMOJ

Sur la monto Longgu apud Zhoukoudian, sudokcidente de Beijing (Pekino), estas roka kaverno. De 1927 ĉinaj sciencistoj trovis sinsekve en tiu loko pli ol 40 diversajn fosiliojn de simi-homoj, inter kiuj troviĝis kompleta kranio. Krome, oni elfosis fosiliojn de pli ol 90 specoj de mamuloj, dekmilojn da krudaj ŝtonaj instrumentoj kaj cindron miksitajn kun lignokarbo, animalaj ostoj, semoj de celitido kaj ŝtonpecoj. La simi-homaj fosilioj kaj la restaĵoj de la antikva kulturo montris, ke tie antaŭ 4-500,000 jaroj amase vivis primitivaj homoj. Ili estis la pekinaj simi-homoj, fame konataj tra la tuta mondo.

Laŭ aspekto la pekinaj simi-homoj tre similis al simioj, sed ili estis homoj, ĉar ili jam povis iri rektastare kaj elfari pintajn kaj akrajn ŝtonajn instrumentojn kun eĝoj por ĉasi bestojn kaj elfosi manĝeblajn tuberojn de plantoj.

Ili scipovis porti naturan fajron estigitan per fulmo al sia kaverno por baki manĝaĵojn kaj sin varmigi, kaj konservi la fajron longtempe.


La tiama klimato de tiu loko estis varmeta kaj humida, ĉie kreskis arbaroj kaj herboj. Sur la vasta herbejo vivis grupe sovaĝaj ĉevaloj, cervoj, megaceroj (*Megaceros pachysteus*) kaj antilopoj. Ankaŭ rinoceroj kaj elefantoj iris ofte tien por serĉi manĝaĵojn. Ĉe la riveroj kaj lagoj vivis bubaloj, lutroj kaj riveraj leopardaj katoj. En la densaj arbaroj vivis tigroj, leopardoj, lupoj, ursoj kaj aliaj rabobestoj, kiuj minacis la pekinajn simi-homojn. Ĝuste en tia danĝera medio vivis la pekinaj simi-homoj. Ili kunvivis kelkdekoj, kune kolektis fruktojn de arboj, ĉasis bestojn kaj ilin manĝis komune, kaj vivis tre malfacilan vivon. La trovitaj fosilioj de simi-homoj montras, ke ili vivis meznombro nur 14-15 jarojn.

Travivinte longan periodon de 2-300,000 jaroj, la pekinaj simi-

homoj altigis sian laboran sperton, ankaŭ ilia socia organizo ekŝanĝiĝis kaj iom post iom transiris de primitivaj homoj al klana socio.

ĜERMO DE MATRIARKA KLANA SOCIO

Antaŭ ĉ. 200,000 jaroj la simi-homoj evoluis en paleohomojn. La paleohomoj havis tre grandan progreson en la korpa aspekto. En vasta tereno de Ĉinio oni trovis paleohomojn. Inter ili la Dingcun-homoj trovitaj en Shanxi (Ŝanĥi)-provinco, vivantaj antaŭ ĉ. 100,000 jaroj, estis tre fame konataj. Samtempe kun tio oni trovis pli ol 2,000 ŝtonajn instrumentojn. La Dingcun-homoj daŭre uzis hakajn, skrapajn kaj pintajn instrumentojn kaj faris ŝtonajn trieĝajn pintaĵojn kaj sferajn instrumentojn. La ŝtonaj globoj kun grandeco de pomo eble estis iliaj ĉasiloj kiel kunŝnuraj ŝtonaj ĵetiloj. Ili envolvis du ŝtonajn globojn per felo respektive kaj ilin kunligis per fela ŝnuro. Dum ĉasado ili tenis unu globon enmane kaj svingis la alian ke ĝi rondire flugu en la aero, kaj poste ĵetis ĝin al la celita objekto. La turniĝanta ŝnuro kun ŝtongloboj povis volvi la kolon aŭ piedon de la ĉasaĵo. Oni iam trovis en Xujiayao — unu el la historiaj restaĵoj de Dingcun-homoj — pli ol 1,500 tiajn glo-



Pekina simi-homo

bojn, kiuj ja estis siatempe avangardaj armiloj.

Tiam la paleohomoj komencis forlasi malordan geedziĝon kaj iris en la stadion de sangaparenca geedziĝo inter anoj de samaj generacioj.

Ĝis antaŭ ĉ. 4-50,000 jaroj la paleohomoj evoluis en novhomojn. El la historiaj restadejoj de novhomoj trovitaj en Ĉinio, la plej fama estas tiu de montsupraj kavernuloj vivantaj antaŭ 17-18,000 jaroj. Ili loĝis en kaverno de la montsupro de la monto Longgu apud Zhoukoudian, tial oni nomas ilin montsupraj kavernuloj. Ilia aspekto estas tre simila al tiu de la nunaj ĉinoj.

La montsupraj kavernuloj havis pli progresajn laborinstrumentojn kaj laborkapablon. Ili jam povis bori truon kaj poluradi. En la kaverno oni trovis 82-milimetran ostan pinglon glatan kun akra pinto kaj malgranda truo. Tio montris, ke ili tiam portis kudritan felveston. Ili kunligis truitajn bestajn kaj fiŝajn ostojn, konkojn kaj ŝtonetojn, kaj pendigis

ilin sur la kolo kiel ornamajon. La montsupraj kavernuloj jam posedis rimedon por artefara fajro. Inter la historiaj legendoj de Ĉinio estas unu pri “lignoborado de Surenshi por fari fajron”, kiu ĝuste spegulis la tiutempan atingon.

Ili organizis sin en relative fiksitajn grupojn laŭ la sangaj parencoj kaj vivis en matriarka klana socio. Ili simple dividis inter si la laborojn laŭ malsamaj seksoj kaj aĝoj. La viroj okupiĝis pri ĉasado kaj la virinoj pri kolektado de fruktoj kaj aliaj, preparado de manĝaĵoj, kudro de vestoj kaj vartado de idoj. En la socio de amasa geedziĝo ili konis nur sian patrinon, sed ne la patron. La virinoj ludis gravan rolon en la ekzisto de la klano kaj posedis pli gravan pozicion ol la viroj.

En ilia tombejo oni trovis ĉirkaŭ la mortintoj ŝutitan pulvoron de hematito, kiu eble simbolis sangan. Tio montris, ke ili jam havis primitivan religian koncepton. La akompanaĵoj ĉe la mortintoj estis ŝtonaj instrumentoj kaj ornamaĵoj sen evidenta diferencigo. Tio signifas,

ke la membroj de la klano estis egalrangaj.

PROSPERO DE LA MATRIARKA KLANA SOCIO

Forpasis longa malfacila tempo. En la tempo antaŭ 6-7,000 jaroj, en iuj lokoj ĉe la Flava Rivero kaj la malsupra baseno de Changjiang (Jangzi)-rivero de Ĉinio, la matriarka klana socio iris en sian prosperan stadion.

Apud la ĉefurbo Xi'an de Shaanxi (Ŝenhi)-provinco troviĝas Ekspoziciejo de la Historia Restadejo Banpo, kiu vivece eksponas al la vizitantoj matriarkan klanan socion.

La restadejo situas ĉe la orienta bordo de la rivero Chanhe, okupas areon de ĉ. 50,000 kvadrataj metroj, inkluzive de loĝtereno, ceramika bakujo kaj komuna tombejo. Ĉirkaŭ la loĝtereno estas fosaĵo pli ol 300 metrojn longa kaj 6 metrojn profunda kaj larĝa respektive por protekti ilin de bestoatakoj. En la tereno dislokiĝas pli ol 200 diversformaj terkavernoj, kiuj estis ilia komuna tenejo por konservi grenon. Krome, en ĝi troviĝas ĉ. 50 domoj, el kiuj iuj estas duone subteraj ortangulaj, kaj iuj surteraj rondaj, domoj kun pintaj tegmentoj kaj ambaŭ specoj kun areo de ĉ. 30 kvadrataj metroj. En la centro de ĉiu domo troviĝas fajrokavo por varmigi la domon. Ĉiuj domoj alfrontas al unu centra granda ortangula domo kun areo de ĉ. 150 kvadrataj metroj. Ĝi estis loko por okazigi klanan kunvenon, feston aŭ religian aktivadon. Oni taksis, ke tiu vilaĝo povis enteni ĉ. 400 loĝantojn. En la domo estas ceramikaj potoj kaj ŝtonaj instrumentoj. Oriente ekster la ronda fosaĵo

estas bakforno por fajenco, kaj norde tombejo.

En la restadejo eksponiĝas multaj frote formitaj ŝtonaj hakiloj, ŝtonaj, konkaj kaj ceramikaj falĉiloj, kaj ankaŭ greno, legomsemoj kaj ceramikaĵoj konservitaj en kaverno. Tio montras, ke la Banpo-homoj longe fiksloĝis tie kaj regule kulturis grenplantojn kaj legomojn, kio provizis ilin per ĉefaj nutraĵoj.

El iliaj ceramikaĵoj troviĝas speco de poto kun du ujoj unu sur la alia. La malsupra ludas rolon de kaldrono kaj la supra tiun de vaporumilo, la plato inter ili surhavas truetojn. Alispeca poto ilia kun eta buŝo, granda ventro kaj pinta fundo povas mem kliniĝi por ĝisplene ĉerpi dum preno de akvo. La desegnoj sur la ceramikaĵoj estas egallateraj trianguloj, paralelo-


gramoj, fiŝaj, ranaj, ŝafaj, cervaj kaj aliaj figuroj. Ili ja estas eminentaj primitivaj artaĵoj.

Oni trovis sur koloraj ceramikaĵoj de Banpo 22 specojn de signoj, kiujn ĉinaj filologoj opinias rudimento de la fru-perioda ĉina skribolingvo.


DISFALO DE LA KLANA SOCIO

Antaŭ ĉ. 5,000 jaroj la ekonomio de la klanaj triboj, loĝantaj en la basenoj de la Flava Rivero kaj Changjiang-rivero, havis rimarkindan disvolviĝon, iliaj terkulturaj instrumentoj fariĝis pli avangardaj, la areo de la kampoj pligrandiĝis kaj la produktokvanto pliiĝis. Ili ankaŭ bredis gregojn da porkoj, bovoj, ŝafoj, ĉevaloj kaj kokoj.

Pro la disvolviĝo de terkultura produktado, la viroj, kiuj antaŭe okupiĝis pri ĉasado kaj fiŝado, iom post iom transiris al terkulturo kaj ceramika produktado — la tiamaj ĉefaj produktaj fakoj. La virinoj kontraŭe iom post iom forlasis tiujn ĉefajn produktajn fakojn kaj okupiĝis pri ŝpinteksado kaj mastrumado. Tiel la viroj iom post iom posedis regan pozicion en la produktado kaj vivo. En la geedziĝo aperis la fenomeno, ke la edzino loĝadis ĉe la edzo. Ankaŭ la sanga interrilato kaj hereda sistemo komencis esti kalkulataj laŭ la patra linio. Tiam la matriarka klanaj socio transiris en la stadion de la patriarka klanaj socio. Aperis ankaŭ privata posedo kaj la fenomenoj de riĉeco kaj malriĉeco. La primitiva socio iom post iom disfalis kaj transiris al sklava socio.



Kolora argila pelvo kun desegnoj de fiŝoj kaj homa vizaĝo



Argila forno de la klananoj



PRI POPOLANOJ ĈE WUZHI-MONTO

de LU CHUANZHEN

SAME kiel aliaj turistoj surpaŝintaj Hainan-insulon, la sudan pordon de Ĉinio, mi estis ĉarmita de la belaj pejzaĝoj, kaj min forte impresis la unikaj moroj kaj kutimoj de la naci-malplimulto li-oj kaj mjaŭ-oj, loĝantaj ĉe Wuzhi-monto, kiun ni povus en Esperanto nomi Kvinfingra Monto.

POST LA MONTARO

Mia aŭto kuris trans montojn laŭ serpentuma ŝoseo kaj penetris en la profundejon de Wuzhi-monto. Blankaj nuboj ŝvebis ĉe miaj piedoj. Mi direktis mian rigardon malproksimen kaj vidis, ke kvin verdaj montpintoj alte staras super la aliaj. La montregiono kun totala areo de pli ol 17,400 kvadrataj kilometroj okupas pli ol duonon de la tuta insulo. Ĝi estis longe izolita de la mondo.

Iu kuniranta indiĝeno ĉe Wuzhi-monto rakontis al mi jene: Antaŭ la Liberiĝo la han-aj regantoj sur la insulo praktikis grandhanan naciismon, kaj la li- kaj mjaŭ-popolanoj suferadis subpremon. Iutage, subite alflugis kvin ruĝaj nuboj, kaj ili falis sur la supron de Wuzhi-monto; poste alvenis popolaj armeanoj kaj la popolo de la insulo saviĝis el la suferoj. Sekve de tio muzikistoj kaj dan-

cistoj verkis la baleton “Kvin Ruĝaj Nuboj”, kiun oni ankoraŭ ludas nun. Aŭskultante la interesan rakonton de la indiĝeno, mi alvenis al Tongshi, la ĉefurbo de la Li-a kaj Mjaŭ-a Aŭtonoma Subprovinco de Hainan.

La juna monturbo en tropikaj kaj subtropikaj koloroj estas gemo profunde en Wuzhi-monto. Ĉe tiu loko ĉie kreskas altaj kokosarboj kun longaj etenditaj folioj balanciĝantaj en vento; ambaŭflanke de la stratoj kreskas densaj vicoj da artokarpoj (*Artocarpus heterophyllus*); inter la verdaj arboj elrigardas etaĝdomoj konstruitaj sur montodeklivoj.

Oni diris al mi, ke en tiu loko frekventita de sovaĝaj bestoj nun loĝas pli ol 30,000 homoj kaj formiĝis centro de politiko, ekonomio kaj kulturo de tiu aŭtonoma subprovinco. Ĝia industrio komenciĝis de la unua fabriko de rotangaj objektoj starigita en 1957, kaj nun tie jam funkcias pli ol dudek fabrikoj de maŝinoj, cemento, medikamentoj, plastaĵoj kaj radioaparatoj.

TUBOJUPOJ EL LERTAJ MANOJ

Ĉu sur stratoj aŭ en butikoj, plej okulfrapaj estas la li-aj vi-

rinoj en originalaj kostumoj. Ili portas senbutonajn jaketojn kaj flordeseĝajn tubojupojn, iliaj haroj estas ligitaj malantaŭ la kapo kaj ornamitaj per ostaj pingloj; ili portas ankaŭ broditajn kaptukojn, ĉirkaŭkolojn kaj orel- kaj brakringojn. La viroj portas nigrajn aŭ blujn senkolumajn jaketojn, iuj el ili portas jaketojn similajn al tiuj de la virinoj, same portas orelingojn, kaj krome malgrandan korbon surdorse ĉe la talio por enteni objektojn.

La li-a junulo, kiu min gvidis, diris al mi, ke la tubojupoj de la virinoj estas faritaj de ili mem, kaj la knabinoj tre ŝatas mem teksu tiajn jupejn por montri sian lertecon kaj altiri la atenton de la junuloj. Iutage la junulo kondukis min al iu li-a vilaĝo por rigardi teksadon de tubojupo. Kiam ni atingis ĝin, vilaĝanoj ĵus revenis de kamplaboro kaj kolektiĝis sub banjanoj aŭ bambuaroj antaŭ siaj domoj por ripozo. Dume knabinoj sidis sur mato kaj teksis kun bambua korbo da koloraj fadenvolvaĵoj ĉe sia flanko. Sen bezoni deseĝajn projektojn ili povas formi sur la teksaĵo belajn florojn, birdojn kaj bestojn, teksante laŭ siaj imagoj kaj memoro. Ili eĉ bildigas sur teksaĵoj gravajn okazaĵojn, kiel brulo de domo aŭ inundo, kiu detruis la plantojn.

Laŭ historiaj verkoj la li-aj virinoj estas lertaj en ŝpinado kaj teksado, precipe en uzado de insula kotono. Antaŭ la kvara jarcento antaŭ Kristo, iliaj prapatroj jam scipovis teksu kotonan ŝtofon kun bela flordeseĝaĵo, kiun ili uzis kiel tributon al regantoj. Oni diras, ke la ĉina antikvulino Huang Dao-po migris al Hainan-insulo en

sia infanaĝo, vivis inter li-oj pli ol 40 jarojn kaj lernis de ili la arton de ŝpinado kaj teksado. Poste ŝi revenis al sia hejmloko proksime de Shanghai (Ŝanhajo), instruis tieajn virinojn pri ŝpinado kaj teksado kaj reformis instrumentojn de tiu metio. Ŝi faris sian kontribuon por disvolvo de la ŝpinteksa tekniko en suda Ĉinio.

ŜIPOFORMAJ DOMOJ

La li-oj amas vivi kun samklananoj. En unu vilaĝo ĝenerale loĝas dek ĝis ĉirkaŭ cent familioj, iuj en nove konstruitaj brikaj domoj, aliaj en malnovaj ŝipoformaj domoj konsistantaj plejparte el bambua aŭ ligna framo, pajla tegmento kaj rotanga aŭ bambua planko je ĉ. 16 centimetroj super la tersurfaco por gardi la domon kontraŭ tajfuno.

Ni vizitis iun maljunulon loĝantan en duonnova ŝipoforma domo. Li diris, ke lia filo kaj bofilino petis, ke li transloĝiĝu en ilian brikdomon, sed li sentis domaĝon forlasi sian domon pro tio, ke ĝi estis projektita por memorigi pri la prapatroj de la li-oj, kiuj migris al Hainan-insulo trans maron. Kaj li rakontis al mi jenan legendon:

Antaŭ tre tre longe estis malriĉa familio, al kiu naskiĝis bela knabino nomata Wuna. Kiam ŝi plenkreskiĝis, ŝi enamiĝis al laborema kaj talenta junulo Laoke en najbara vilaĝo. Ĉiuj diris admire, ke ili estas ideala paro. Sed malfeliĉe, la reĝo ordonis havigi al si belulinojn kaj Wuna estis elektita. Oni devis sendi ŝin al la palaco en sep tagoj. Bonkoruloj konsilis, ke ŝi tuj edziniĝu al sia amato por eviti la malfeliĉon, sed informi-

ĝinte pri tio la reĝo sendis forrabi ŝin. Wuna kaj Laoke devis forkuri. Ili estis pelitaj ĝis marbordo, kaj havante neniun eliron, ili saltis en la maron. Subite ekventegis kaj leviĝis teruraj ondoj. Ili kaptis grandan lignopecon, flosis sep tagojn sur la maro kaj fine atingis Hainan-insulon. Ili sin kaŝis profunde en montaro kaj tie konstruis ŝipoforman domon el herboj kaj branĉoj por loĝado kaj memorigo pri sia alveno per ŝipo. Tiel do fariĝis la unua ŝipoforma domo.

ORIGINALA GEEDZIĜA CEREMONIO

Iutage mi kaj la junulo iris al la oficejo de popola komunumo pro afero kaj sur la revena vojo renkontis knabinojn en festa kostumo. La junulo diris al mi, ke tio montras, ke ie okazas geedziĝo. Ni salutis ilin kaj ili tuj invitis nin al la geedziĝa festo.

Rimarkinte nian alvenon, la novgeedzoj montris apartan ĝojon, sidigis nin sur honoraj lokoj kaj plenigis por ni du bovlojn per vino. Oni diris al mi, ke

Li-a knabino



li-aj novgeedzoj sentas apartan honoron, se ilia geedziĝa ceremonio povas iri kun ĉeesto de gastoj el malproksimaj lokoj.

Kutime la novedzino estas venigita de sia svatinto kun brulanta torĉo en vespero. Kiam la novedzino eniras la vilaĝon, oni faras solenan ceremonion: Unue plejaĝulo de la vilaĝo benas la novgeedzojn kaj poste ĵetas kokovon sur la teron por signi ilian interligiĝon por dumviva kunloĝado. Poste oni faras fajron, kaj ĝin la novedzino kaj ŝiaj akompanantoj devas transpaŝi por montri, ke ĉiuj malbonaj spiritoj estas baritaj ekster la vilaĝo kaj ŝi estas pura por eniri la novan familion.

La li-a novedzino ne veturas per palankeno aŭ ĉevalo nek uzas ŝminkon aŭ parfumon. Ŝi portas nur orelingojn, tri aŭ kvar arĝentajn ĉirkaŭkolojn, brak- kaj piedringojn, kaj vestas sin per longmanika grize-nigra jaketo kun blanka galono, per kaptuko kaj tubojupo en brilaj koloroj.

Enpaŝinte en la novan hejmon, la unua afero farenda por

la novedzino estas interŝanĝi vinbovlojn, t. e. la novedzino interŝanĝas bovlojn kun tri knabinoj el la vilaĝo de la novedzo kaj trinkas vinon por montri, ke ŝi fariĝas membro de la familio de la novedzo.

Ĉe tio la festantaj gejunuloj kaj trinkas vinon kaj kantadas ĉirkaŭ longa tablo en viglega atmosfero. Post trinkado la knabinoj ekdancas dum la junuloj ekkantas por akompano, taktante per manklakado. Tiu ceremonio ankaŭ prezentas bonan ŝancon por amikiĝo inter la gejunuloj. Per kantado la gejunuloj el proksimaj kaj malproksimaj vilaĝoj esprimas sian amon, kaj se iu paro enamiĝas, tiam ili ŝtele forlasas la festantojn.


TRADICIA KUTIMO

Mi partoprenis plurajn geedziĝajn festojn, sed neniam antaŭe mi vidis tian festenon kun plezura drinkado. Min embarasis la tiea moro, ke la gastoj el malproksimaj lokoj devas esprimi sian sincerecon per same brava drinkado. Mi ne kapablis multe trinki, tial mi devis pe-

tegi pardonon kaj estis indulgita nur kiam oni vidis, ke mi vere ne povas trinki multe.

Por la li-oj vino estas same grava kiel manĝaĵoj. En ĉiu hejmo konserviĝas grandaj fajencaj bareloj plenaj de brando. Ĉiu domo havas sian distililon. Ili ŝatas precipe dolĉan brandon el glua rizo, ĉar ĝi estas bona toniko por la homo.

Antaŭe la li-oj severe dividis inter si la laborojn: la viroj ĉasis kaj la virinoj terkulturis. La viroj arope iris kun ĉashundoj por kapti sovaĝajn bestojn. Kiam ili akiris ĉasajon, ili ĉeloke faris fajron por senharigi kaj dividi ĝin en egalajn porciojn inter ĉiuj ĉeestantoj, kun la sola escepto, ke la trafapinto kaj la dividanto ricevas kroman bestokapon. Tiun kutimon oni hodiaŭ ankoraŭ observas, sed kun la ŝanĝo, ke nun oni ĉasas nur en sezono, kiam ne estas multaj terkulturaj laboroj.



Per kanto ili esprimas sian amon.



Kantodanco

ŜANGÎĜO DE LA MONDA PETROLMERKATO EN LIVERO KAJ MENDO

EKDE 1973, kiam la mondon unuafoje trafis la energia krizo, draste leviĝis la olea prezo pro la granda malekvilibro inter la mendo kaj livero. En la pasintaj dek jaroj 20-obliĝis la olea prezo de la Organizaĵo de Petrol-eksportaj Landoj. Kaj tiu fenomeno ŝanĝiĝis nur en la komenco de 1981, kiam la livero de nafto kaj ĝiaj produktaĵoj superis la mendon. Nun en la monda petrol-merkato ĉiutage superfluas 2-3 milionoj da bareloj kaj okazis kurzfalo. Nun la prezo de kruda oleo por unu barelo malpliĝis je 3-5 usonaj dolaroj. La kaŭzoj kuŝas ĉefe en la jenaj kvar punktoj:

Unue, pro la ekonomia depresio la ĉefaj okcidentaj evoluintaj industriaj landoj malpliigis sian petrolbezaron.

En la pasintaj jaroj en la kapitalisma mondo okazis du mondskalaj ekonomiaj krizoj, kiuj puŝis la kapitalisman ekonomion en longdaŭran stagnadon. De 1960 ĝis 1970 la totala jara produktovalorado de la ĉefaj okcidentaj kapitalismaj landoj kreskis meznombro je 5.1%, sed de 1970 ĝis 1978 nur je 3.2%. En la sama periodo tiu de Usono malleviĝis de 4.3% al 3%, tiu de FR Germanio — de 4.4% al 2.4%, tiu de Italio — de 5.3% al 2.8%, tiu de Francio — de 5.7% al 3.7%, tiu de Britio — de 2.9% al 2.1% kaj tiu de Japanio — de 10.5% al 5%. La ekonomia de-

presio reduktis la petrolbezaron de la ĉefaj energi-konsumantaj landoj, kiaj Usono, Francio kaj Japanio. Oni taksis, ke en la pasintaj 18 monatoj tiuj landoj malpliigis la konsumon de petrolo je 9%, t.e. ĉiutage ili malpliigis la petrolimporton je 4.5 milionoj da bareloj.

Due, la ĉefaj okcidentaj industriaj landoj alprenis serion da rimedoj por ŝpari energion, kio malpliigis ilian bezaron de importita petrolo.

Pro la iom-post-ioma kurzleviĝo de petrolo oni alprenis diversajn rimedojn por ŝpari energion kaj redukti la konstante multiĝantan elspezon por energio.

Ĉar la okcidentaj industriaj landoj konsumas du trionojn de sia energio en la produktaj kaj trafikaj branĉoj, tial produkti kaj uzi la ekipaĵojn kaj trafikilojn, kiuj malmulte konsumas petrolon, ja fariĝis unu el la plej gravaj rimedoj por ŝpari energion. De 1965 ĝis 1973, t.e. antaŭvespere de la nafto-krizo, Japanio devis pli konsumi 1% da energio por pliigi sian totalan ekonomian produktovaloron je 1%, dume Usono devis pli konsumi 1.25% da energio, FR Germanio 1.1% kaj Francio 1.02% por atingi la saman celon. Sed en 1975-1977 post la naftokrizo oni ŝparis energion dank' al transformo de la laborprocedo

kaj ekipaĵo. Nun por kreskigi la totalan nacian produktovaloron je 1%, Japanio devas pliigi sian konsumon de energio je 0.55%, Usono je 0.71%, FR Germanio je 0.88% kaj Francio je 0.96%. Por ŝpari energion iuj landoj penas pli multe fabriki aŭtojn konsumantajn malpli da energio. Ekz. la de Japanio produktitaj aŭtoj laŭdataj en la internacia merkato ja reduktis la energi-konsumon je 50%.

Kaj krome iuj industriaj landoj admonas ke oni veturu kun kiel eble plej multe da homoj en la aŭtoj, biciklu aŭ eĉ piediru al la oficejo kaj sammaniere returne hejmen. Dank' al ĉiuj tiuj rimedoj la mendo de petrolo multe reduktiĝis. De 1974 ĝis 1977 Japanio ŝparis energion egalan al 66,500,000 tunoj da petrolo, kaj Francio ŝparis 100 milionojn da tunoj da petrolo dum 7 jaroj. Ankaŭ Usono reduktis sian importon de petrolo je 1.7 milionoj da bareloj ĉiutage.

Trie, oni disvolvas kaj uzas diversajn malmultekostajn energispecojn kaj per tio reduktas la mendon de petrolo.

Laŭ statistiko la mondo ĉiutage konsumas 60 milionojn da bareloj da petrolo, inter kiuj du trionoj estas uzataj por produkti varmon kaj vaporon. Ĉi tiuj povas esti produktitaj ankaŭ per aliaj pli malmultekostaj energi-

specoj (ekz. karbo, natura gaso aŭ nuklea energio). Antaŭe la ĉefaj okcidentaj industriaj landoj uzis petrolon kiel la ĉefan energispecon. Ekz. en Japanio petrolo okupis 74% en la energikonsuma kvanto. Kaŭze de la drasta kurzleviĝo de petrolo ĝi sin turnis al utiligo de diversaj energifontoj, kiaj natura gaso, karbo, sunenergio, nuklea energio kaj sinteza fuzaĵo, tiel ke la bezonata kvanto de petrolo iom post iom reduktiĝas. En la tempo, kiam la prezo de petrolo pli kaj pli leviĝis, karbo denove fariĝis favorato. La japana publiko montras, ke ĝia lando nun eniras en "la duan karban epokon". Antaŭe karbo okupis la unuan lokon en la energi-konsumado de Usono, sed post la fino de la Dua Mondmilito ĝi cedis sian lokon al petrolo. En la periodo de 1945 ĝis 1973 la proporcio de karbo en Usono malleviĝis de 50.6% al 17%, dum petrolo leviĝis de 30.5% al 46%. De 1973 pro petrol-embargo kaj kurzleviĝo la proporcio de karbo ree leviĝis. En 1979 en la konsisto de la energikonsumado de Usono, natura gaso okupis 26%, karbo 19.1%, nuklea energio 3.5% kaj hidroelekto kaj aliaj 4.1%. En la fino de la nuna jarcento karbo espereble okupos 30%. De 1973 ĝis 1980 Francio reduktis sian importon de petrolo je 14,800,000 tunoj, ĝia energi-konsuma kvanto de petrolo reduktiĝis de 66% en 1973 al 53.5% en 1980, kaj en la sama periodo ĝia konsumkvanto de nuklea energio kreskis de 1.7% al 6.5%.

Kvare, Saŭdi-Arabio tenas sian altan nivelon de petrol-produktado, dume Irano kaj Irako plirapidigis siajn paŝojn por denove produkti kaj eksporti petrolon.

Antaŭ la milito inter Irano kaj Irako en septembro de 1980, Saŭdi-Arabio produktis 8,500,000 barelojn da petrolo ĉiutage. Post la eksplodo de la milito ekstrema streĉeco ekregis en la monda petrolmerkato. Kaj Saŭdi-Arabio levis sian tagan produktokvanton de petrolo al 10,300,000 bareloj, kiu konsistigas 43% de la totala produktokvanto de la Organizaĵo de Petrol-eksportaj Landoj. Nun, kiam la livero superas la mendon, Saŭdi-Arabio ankoraŭ tenas sian altan nivelon de petrol-produktado kaj daŭre superŝutas la mondan merkaton per sia malmultekosta petrolo (unu barelo por 32 usonaj dolaroj, kio estas la plej malalta prezo en la Organizaĵo de Petrol-eksportaj landoj).

En la pasinta jaro Irano kaj Irako rekomencis la petrolproduktadon kaj petrol-eksporton iam ĉesigitajn pro la milito. Nun ĉiutage Irako eksportas

1,250,000 barelojn da petrolo kaj Irano ĉ. 1,000,000 barelojn.

Ĉu oni povus konkludi, ke la energia krizo venis al sia fino hodiaŭ, kiam la livero superas la mendon en la monda petrolmerkato? Laŭ mi, estas frue fari tian aserton. En longa periodo oni ankoraŭ devos uzi petrolon kiel la ĉefan energifonton. Koncerne la petrolan prezon, ĉu ĝi povus fali al tiu de antaŭ 20 jaroj? Mi opinias, ke ne. La Organizaĵo de Petrol-eksportaj Landoj certe alprenos rimedojn kontraŭ la tendenco de kurzfalo de petrolo. Malgraŭ tio, ke la landoj de tiu organizaĵo havas malsamajn opiniojn pri la petrola prezo, ili tamen jam alprenis politikojn redukti sian petrolan produktokvanton kaj frostigi sian petrolan prezon por bridi la daŭran disvolviĝon de la nuna fenomeno en la monda merkato, ke la livero superas la mendon.

SENPAGA SPECIMENO DE EL POPOLA ĈINIO AKIREBLA

POR ĈIU KIU LETERE PETOS DE LA ĜENERALA DISTRIBUANTO DE LA GAZETO:
ESPERANTA SEKCIO DE CENTRO DE
ĈINAJ ELDONAĴOJ (GUOJI SHUDIAN),
P.O. KESTO 313, BEIJING, ĈINIO.



LA UNUA INTERNACIA FOTO- ARTA EKSPozICIO (AZIO) EN ĈINIO

La ekspozicio, aranĝita de Ĉinio, inaŭguriĝis je la 15-a de oktobro 1981 en la Ĉina Belarta Ekspoziciejo de Beijing (Pekino).

La montritaj 452 verkoj spegulis el diversaj anguloj la vastajn terenojn kaj buntajn naciajn vivojn de aziaj landoj. Oni aljuĝis 24 premiojn al la elstaraj verkoj. "Amo" farita de la singapura fotisto Liew Yew Foo, "Je Edziniĝa Tago" de la japana fotisto Yamamoto Lada kaj "Kuna Strebado" de la malajzia fotisto Kong Wanliang gajnis la unuajn premiojn. Aliaj sep gajnis la duajn premiojn kaj 14 gajnis la triajn premiojn. En la ekspoziciejo montriĝis ankaŭ la klozoneaj pokaloj (famaj metiartaĵoj de Ĉinio) uzataj kiel premioj.

La ekspozicio ricevis intiman kunlaboron de fotistoj el diversaj aziaj landoj. En ĝi montriĝis verkoj el Bangladeŝo, Hindio, Indonezio, Irano, Japanio, Demokratia Kamboĝo, Malajzio, Nepalo, Pakistano, Filipinoj, Singapuro, Srilankao, Tajlando, Turkio, Ĉinio, Hongkongo kaj Makao. La juĝa komisiono konsistis el 17 fotistoj de Ĉinio, Hongkongo kaj Makao.

AŬSTRA MIMO PROF. SAMY MOLCHO EN ĈINIO

Profesoro Samy Molcho, konata kiel "la plej fama aŭstra mimo en la dudeka jarcento", vizitis Ĉinion en oktobro, 1981. Al spektantoj en Beijing, Wuhan kaj Guangzhou (Kantono) li sukcese prezentis la de li verkitaĵajn mimikaĵojn "Mia

Lingvo", "Adiaŭo ĉe Stacio", "Hirurgo", "Orkestro" kaj "Proceso". Per siaj ĝustaj gestoj kaj variaj mienoj li tre vivece prezentis la sentojn kaj pensojn de diversaj roloj kaj rikoltis varmajn aklamojn de ĉinaj dramistoj kaj spektantoj.

Prof. S. Molcho naskiĝis en la jaro 1936. Li ricevis trejnadon ne nur pri la klasika kaj moderna dancarto, sed ankaŭ pri la orienta dancarto, kaj fariĝis eminenta spertimo. Nun li estas profesoro de la Viena Instituto de Muziko kaj Teatra Arto, estro de la Viena Mimika Lernejo kaj de la internacia Somera Mimika Kolegio en Vieno.

FRANCA MUZIKISTO JEAN MICHEL-JARRE EN ĈINIO

Fama franca komponisto kaj muzikisto de koncerta elektronika sintezilo Jean Michel-Jarre faris turneon en oktobro 1981 al Beijing kaj Shanghai kaj ludis siajn verkojn per novaj francaj porkoncertaj elektronikaj sinteziloj, havigante al ĉinaj aŭskultantoj ŝancon ĝui tiun novan specon de muziko.

La 33-jara Jean Michel-Jarre ŝatas muzikon de sia infanaĝo kaj ricevis rigoran edukon pri muzikteorio en la Pariza Konservatorio. Ekde la sesdekaj jaroj li studadis elektronikajn sintezilojn kaj atingis eminentajn sukcesojn en sia arto.

EKSPozICIO PRI "SEPTRE- ZORA KLOZONEO" DE S-INO SAITO KEIKO EN ĈINIO

Ornamaj klozoneaj bildoj faritaj de la fama japana artisto de "septrezora klozoneo", s-ino Saito Keiko, estis eksponataj en oktobro 1981 en la Ĉina Belarta Ekspoziciejo de Beijing kaj rikoltis multajn laŭdojn.

"Septrezora klozoneo" estas tradicia nacia metiartaĵo de Japanio. Tia metiartaĵo estas farita el kupra plato, sur kiu oni faras desegnaĵon el glazuro aŭ simila materialo, kaj poste bakas ĝin en arda fajro. S-ino

Saito Keiko heredis la tradician arton de "septrezora klozoneo" kaj ĝin novigis post esplorado. Ŝiaj verkoj temas pri la reala vivo kaj prezentas originalan stilon kun vivecaj figuroj kaj interesa komponado. En sia lando ŝi estas honore titolita "moderna artistino de septrezora klozoneo". La ekspozicieitaj kvardek kelkaj verkoj estis kreitaj preskaŭ senescepte post ŝia vizito al Ĉinio en 1980. Ŝi skribis en la antaŭparolo al la ekspozicio: "Per tiuj ĉi verkoj mi volas esprimi mian koran deziron al la popolo de Ĉinio — mia dua spirita hejmloko — kaj mi deziras, ke la amikeca ligo translandlima fariĝu ĉiam pli fortika."

EKSPozICIO PRI ANTIKVAJ EŬROPAJ GRAVURAĴOJ EN ĈINIO

Por celebri la dekan datrevenon de la starigo de diplomaciaj rilatoj inter Ĉinio kaj Belgio, okazis en oktobro kaj novembro, en la ĉinaj urboj Beijing, Shenyang kaj Harbin, Ekspozicio pri Antikvaj Gravuraĵoj konservataj de la Lieĝa Universitato.

En la ekspozicio oni montris pli ol ducent verkojn de 36 famaj pentristoj de la 15-a ĝis la 18-a jarcento, inkluzive de Jeroma Bosch, Albrecht Dürer, Rembrandt van Rijn, Pierre Bruegel Lancien kaj Albrecht Altdorfer. Tre diversaj estas la temoj kaj formoj de iliaj artaj verkoj.

EKSPozICIO PRI LA VIVO KAJ VERKOJ DE LUSIN EN AŬSTRALIO

Por celebri la centjaran jubileon de la naskiĝo de la granda ĉina verkisto Lusin, la ŝtata universitato de Aŭstralio okazigis en oktobro 1981 ekspozicion pri liaj vivo kaj verkoj.

La ekspozicio montris fotojn pri la vivo de Lusin, librojn pri li kaj gravajn kolektojn de liaj verkoj

PREMIADO DE VERKOJ EL "FOTOJ PRI NATURAJ BELAĴOJ FARITAJ DE ESPERANTISTOJ"

En 1981 ni aperigis 25 verkojn en la 12 numeroj de nia gazeto, kontribuitajn de esperantistoj de Danlando, Usono, Francio, Italio, Nederlando, FR Germanio, Norvegio, Svedio, Japanio kaj Jugoslavio. Kaj ankoraŭ nemalmultaj fotografiaj verkoj de esperantistoj, kiujn ni jam ricevis, estos publikigitaj sinsekve en tiu rubriko. Tiu rubriko ne nur plibeligis nian revuon, sed ankaŭ havigis al niaj legantoj ŝancon ĝui belajn pejzaĝojn de diversaj landoj kaj koni aktivadon de fotografiaj amatoroj-esperantistoj. Ni esprimas koran dankon al la amikoj, kiuj kontribuis al tiu rubriko.

En la resumado de nia laboro de 1981, ni elektis du bonajn verkojn el la aperigitaj fotoj, ili estas la kolora foto de Alberto C. Stagi (Italio) "Nubmaro ĉe Versiliaj Apŭamaj Alpoj" en la n-ro 3 kaj tiu de Otto Gessner (FR Germanio) "Vesperigo post Fulmotondro" en la n-ro 4. La du verkintoj ricevos



kiel premiaĵojn metiartajon kaj Esperantajn eldonaĵojn de Ĉinio, krom regulan donacaĵon por ĉiu fotokontribuanto de tiu rubriko.

Ni sincere esperas, ke esperantistoj de diversaj landoj plue kontribuos al ni fotojn. Estas pli bone, se oni sendos al ni kolorajn pozitivajn filmojn (la formato laŭplaĉe) aŭ kolorajn fotojn kun formato de poŝtkarto (pli granda ne taŭgas por poŝtendo) pri pejzaĝo, esperantista aktivado kaj moroj de diversaj lokoj. Ne forgesu aldoni la nomon

kaj adreson de verkinto kaj simplan klarigon pri la koncerna foto.

Ankaŭ en la komenco de 1983 ni premios bonajn verkojn en la rubriko "Fotografioj pri Naturaj Belaĵoj Faritaj de Esperantistoj" de 1982. Ni estos ĝojaj, se niaj karaj legantoj partoprenos en la elektado kaj sendos al ni siajn opiniojn pri ĝi antaŭ la fino de februaro, 1983.

La redaktoro de "Fotografioj pri Naturaj Belaĵoj Faritaj de Esperantistoj"

aperintaj en la pasintaj kvardek jaroj, inter kiuj troviĝis la plej nova kolekto de liaj verkoj eldonita okaze de la centjara jubileo, kaj krome ankaŭ faksimiloj de liaj manuskriptoj.

ĈINAJ INFANAJ PENTRAĴOJ PREMIITAJ EN INTERNACIA KONKURSO

Kvar el la dek pentraĵoj senditaj de ĉinaj infanoj gajnis la unuan, duan kaj trian premiojn en la Kvina Internacia Konkursa de Infanaj

Pentraĵoj por 1981, okazinta en la finna urbo Hyvenkää.

5,000 infanaj pentraĵoj el 54 landoj kaj regionoj estis senditaj al la konkurso. La temo estis "Mia Hejmloko". La juĝa komisiono proklamis, ke 410 pentraĵoj estas premiitaj. "Lotusfloroj kaj Anasido" pentrita de la okjara ĉina infano Wei Yuejun kaj "Ĝoja Kunveno" pentrita de dekdu-jara Wang Xingang gajnis la unuajn premiojn; "Azeneto" pentrita de naŭjara Liu Xu gajnis la duan premion; kaj "Monto de Simioj" pentrita de ok-

jara Song Yang gajnis la trian premion.

ĈINA PEKIN-OPERA TRUPO EL WUHAN TURNEIS AL KVAR EŬROPAJ LANDOJ

De la 8-a de septembro ĝis la 9-a de novembro 1981 la ĉina Pekin-opera Trupo el Wuhan faris turneon al Jugoslavio, Svedio, Islando kaj Danlando. Ĝi prezentis naŭ operojn kun brilaj akrobataĵoj kaj rikoltis multajn laŭdojn de la spektantoj.



Ilustraĵoj de Zhao Shiyang

BAOBABOJ DE SENEGALIO

Baobaboj kreskas ĉie tra la tuta Senegalio. Unu ordinara baobabo estas ĉirkaŭbrakumebla de kelkaj homoj mano ĉe mano. Por ĉirkaŭbrakumi relative grandan estas bezonataj ĉ. 20 homoj, almenaŭ dek.

Senegalio situas ĉe la rando de la granda dezerto Saharo. Ĝin tre ofte minacas vento sabla kaj seka, tamen ĉi tiuj ne povas subigi la baobabojn, prosperantajn ĉie tra la lando.

La baobaboj senrezerve oferas ĉiujn siajn ĉelojn al la homaro: Se okazas nerezistebla katastrofo, oni povas satigi sin per iliaj fruktoj; per iliaj folioj oni kuracas suferantojn de gastrito; per iliaj ŝeloj oni povas fari ŝnurojn; kaj iliaj dikaj trunkoj kaj branĉoj servas kiel plej bona hejtaĵo.

Pro la rezistemo de la baobabo kontraŭ vento kun sablo, trosekeco kaj aliaj naturaj katastrofoj kaj pro ĝia ĉiama sinoferemo al la homaro, la senegaloj opinias, ke ĝi havas supernaturan forton, kaj pro tio ho-

noras ĝin kiel dion. Oni diras, ke ĝi povas dividi ĝojon kaj malĝojon kun la homo. Tial, kiam oni renkontas malfacilojn, oni ofte petas de ĝi helpon. Antaŭ ol oni faligas ĝin por servi ĝin kiel brulaĵon, oni ĉiam preĝas al ĝi.

En Senegalio la baobabo estas rigardata kiel simbolo de la nacio. La bildo en la centro de la nacia emblemo de Senegalio konsistas maldekstre el figuro de leono kaj dekstre el figuro de tia arbo. En la centro de la sigelo de Senegalio estas gravurita desegno pri ĝi, kaj eĉ sur militista epoleto estas brodita bildo de tia arbo. La senegaloj rigardas la baobabon kiel la fonton de forto, simbolon de riĉa rikolto, kaj postulas, ke oni estu nobla kaj persistema kiel la baobabo por venki la naturon kaj prosperigi la landon.

APRA BATALLUDO SUR NIKOBARAJ INSULOJ

En la Andamana Maro norde de Sumatro troviĝas insularo de Hindio, kiu nomiĝas Nikobaroj, kie ofte okazas antikvaj lokaj konkursoj de apra batalludo.

Laŭ la moro sur la insularo, tia konkurso antaŭe okazis ĉiun duan aŭ trian jaron por celebri la sakramentan feston. De la lastaj jaroj, kun la disvolviĝo de turismo, lokaj batalludistoj ofte aranĝas tian ludon por turistoj.

La festo komenciĝas per kantado kaj dancado kaj finiĝas per apra batalludo, la plej alloga prezento en la festo. Antaŭvespere oni kaptas en la arbaro kelke da aproj kaj fermas ilin en lignan stalon en la centro de vasta randa placo. Por ke la aproj fariĝu des pli furiozaj, oni antaŭ la konkurso, anstataŭ manĝigi ilin, lasas ilin trinki palman vinon. Junuloj kaj batalludistoj konkure petas partopreni en la ludo. Ĉiuj partoprenantoj estas dividitaj

en kelkajn grupetojn. Por ĉiu grupeto estas asignitaj po unu batalludisto kaj po unu helpanto. Tuj ĉe la komenco de la konkurso elpaŝas batalludisto kaj lia helpanto vigloplenaj. La mastro de la festo malfermas la pordon de la stalo kaj ellasas apron, kies posta kruro estas ligita per longa ŝnuro tirata de la helpanto por bridi la apron en la kriza momento por ke ĝi ne vundu homojn. Poste la batalludisto sen armilo en la manoj ĵetas sin kontraŭ la apron kaj de tempo al tempo ekscitas ĝin por ĝin kolerigi. La batalludo intensa daŭras nelonge, ĝenerale kelkajn minutojn. La furioza apro ĵetas sin tien kaj tien, kaj la batalludisto lerte evitas ĝin foje refoje. Li gajnas la venkon nur kiam li kaptis la orelojn de la apro. Poste elkuras alia apro kaj komenciĝas la dua konkurso. Ne ĉiuj batalludistoj sukcesas en la konkurso. Iuj el ili ne nur ne povas kapti la aprajn orelojn, sed estas faligitaj aŭ eĉ grave vunditaj de ĝi.

En la landoj, kie okazas taŭro-batalo, la venkintaj bovoj povas esti ne buĉitaj kaj ne prezentitaj kiel oferaĵo. Sed kontraŭe sur Nikobaraj insuloj, kie ĉiuj aproj, kiuj partoprenas en la konkurso, devas esti buĉitaj kaj prezentitaj kiel oferaĵo, ĉu ili venkas aŭ ne en la konkurso.





TRAFI LA POSTAĴON PER UNU PAFO

Ni ĉiuj konas la miton pri la "Sago de Amoro". Ankaŭ la boŝmanoj en iu regiono de suda Afriko havas apartan pafarkon de amo, kiu havas la saman rolon kiel tiu de Amoro-Kupido.

En la regiono, se viro havas deziratan amikinojn, li faras pafarke-

ton el peco da ĉamegosto. Ĝi, kun sageto el kompakta pajlero, longas ĉ. 7.5 centimetrojn kaj estas elegante ellaborita. Post kiam li trempis la sagpinton en speciala likva medikamento, li sekvas ŝin por pafi la sageton kontraŭ ŝian postajon. Se ŝi eltiras la sageton kaj ĝin rompas, tio signifas, ke li malsukcesas; se ŝi ne faras la rompon, tio signifas, ke li sukcesas.



SOLENA KUNVENIGO EN BEIJING MEMORE AL LA 70-A DATREVENO DE LA REVOLUCIO DE 1911

La 10-an de oktobro 1981 pli ol 10,000 personoj el diversaj rondoj de Beijing solene kunvenis en la Popola Halo por rememori la Revolucion de 1911 je ĝia 70-a datreveno. Prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio Hu Yaobang kaj vicprezidanto de la Centra Komitato de la Revolucia Komitato de la Ĉina Kuomintango Qu Wu faris paroladon ĉe la kunveno.

La Revolucion de 1911 plenumis revoluciuloj gvidataj de Sun Zhongshan (Sun Jatsen) por renversi Qing-dinastion. La revolucio hisis la flagon de demokratia respubliko kaj fondis la Respublikon de Ĉinio. Ĝi estas epokfara revolucio en la ĉina historio. Praktika signifo de la kunveno estas, ke ĝi estas utila al reunuigo de Taiwan (Tajvan) kaj la Patrio.

SAVI LA MANĈURAN LINGVON

Manĉuroj estas unu el la naci-malplimultoj de Ĉinio kaj havas sian propran lingvon, kiu nun frontas pereon. Por savi la lin-

gvon, 80 lingvistoj kaj specialistoj lernis la manĉuran lingvon en kurso. Ili venis el Beijing kaj la tri nord-orientaj provincoj Heilongjiang, Jilin kaj Liaoning.

La kursanoj lernis la lingvon du monatojn en la gubernio Shuangcheng de Heilongjiang-provinco. La gubernio estas unu el la malmultaj lokoj, kie oni ankoraŭ parolas la manĉuran. La kursanoj ankaŭ lernis kiel kompili vortaron de la lingvo.

Dum la pli ol 200 jaroj ekde la tridekaj jaroj de la 17-a jarcento ĝis la komenco de la 20-a jarcento, kaj la manĉura kaj la hana lingvoj estis oficialaj lingvoj de Ĉinio. Nun tre malmultaj homoj el la 2.6 milionoj da manĉuroj kapablas paroli en la manĉura. Ili loĝas tre dise en la regiono Heihe de Heilongjiang. Nun en Ĉinio nur naŭ homoj bone posedas la manĉuran lingvon, sed ili ĉiuj bedaŭrinde estas tre maljunaj.

KUNVENO EN BEIJING POR CELEBRI LA 100-AN DATREVENON DE GEORGE ENESCU

Pli ol 1,000 artistoj el Beijing kunvenis en septembro 1981 por memori la 100-an datrevenon de la elstara rumana muzikisto George Enescu. En la kunveno, la ĉina Centra Filharmonia Orkestro ludis "La Duan Rapsodion de Rumanio" de Enescu, sub gvido de la fama usona direktisto David Gilbert.

George Enescu naskiĝis en Liveni, en 1881. Li eklernis violonludon en la aĝo de kvar jaroj kaj post tri jaroj li eniris en la Vienan Konservatorion por studi. En la konservatorio li gajnis la plej altan premion kaj 13-jaraĝa li iris en la Parizan Konservatorion por progresigi sian violonan ludarton kaj komponadon. Kiam li estis ankoraŭ nur 16-jara, lia nomo vaste dispartigis per lia "Rumana Poemo". Enescu estis ne nur komponisto, violonisto, direktisto kaj pianisto, sed ankaŭ socia aktivisto kaj edukisto.

INTERNACIA OLIMPIKA KOMITATO EKHAVIS ĈINAN KOMITATANON

En oktobro de la pasinta jaro He Zhenliang, asistanto de la ĝenerala sekretario de la Ĉina Olimpika Komitato, estis akceptita kiel membro de la Internacia Olimpika Komitato, en ĝia 84-a sesio okazigita en la okcidenta Germanio.

La membroj de la Internacia Olimpika Komitato ĝenerale devas esti rekomenditaj de la plenuma komitato kaj akceptitaj post konsento de simpla plimulto. Ĉiu lando povas havi unu komitatanon en la Internacia Olimpika Komitato, kaj la plej aktivaj kaj plej gravaj landoj en la olimpikoj, aŭ landoj aranĝintaj olimpikojn, rajtas havi en ĝi du komitatanojn.

NOVA SUBSPECIO DE PEKINA ANASO

Ĉinio elkulturis la unuan bonan subspecion de pekina anaso — Shuangqiao-a pekina anaso. Ekspertizo pri la subspecio diras, ke anaso de la subspecio donas ovojn pli multe, grasiĝas rapide kaj ĝia genetika kvalito estas stabila.


La viando de pekina anaso estas delikata, kaj rostita anaso estas aparte alloga frandaĵo. La sistema selektado de la pekina anaso komenciĝis en 1973, kaj la anasbredaĵo Shuangqiao de Beijing estas unu el la eksperimentejoj. En la lastaj ok jaroj oni faris sisteman selekton de sep generacioj kaj fine akiris la subspecion. Observado en la lastaj tri jaroj montras, ke ĉiu anaso meznombre donas pli ol 280 ovojn, kaj ĉiu ovo pezas pli ol 90 gramojn. Tia anaso grasiĝas tre rapide kaj en normala medio sepsemajna anaso pezas ĉ. 2.5 kilogra-

mojn, kaj la elcento de vivipovaj anasidoj superis 90.


PREZENTADO DE DIPLOMITOJ DE LA CENTRA TEATRA INSTITUTO DE ĈINIO

Ekde la fino de oktobro 1981 la progresiga kurso por instruistoj de la prezenta fakultato de la Centra Teatra Instituto en Beijing prezentis du teatraĵojn: "Senkulpa Kri-

mulo" de la fama rusa dramisto A. N. Ostrovski kaj "Butikistino" de la fama itala dramisto G. Goldoni. "Senkulpa Krimulo" priskribas honestan kaj bonkoran virinon, kiu estis perfidita de sia amato kaj perdis sian filon, sed en granda malfeliĉo ŝi tamen donis varman amon al alia vundita koro. La prezentado estis gracia kaj perfekta kaj fidele esprimis la ideojn de la aŭtoroj. Ĝi ankaŭ edifis la rigardantojn per vereco, boneco kaj beleco.



LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Datong
2. Kailuan
3. Shandong
4. Huaibei
5. Pingdingshan
6. Jixi
7. Hegang
8. Shidu
9. Shijiazhuang
10. Yili
11. Hai'nan-insulo

PARTA LISTO DE NIAJ PERANTOJ

Aŭstralio:

S-ro Kenneth G. Linton
4/2 Lyons Street
Glenhuntly, Vic., 3163
Akcepti nur EPC-abonojn

Libroservo de AEA
S-ro T. Elliott
8 Lone Pine Pde
Matraville 2036
Akcepti nur libro-mendojn

Aŭstrio:

S-ro Leopold Patek
Spittelauerl. 19-21/B/5/18
A-1090 Wien

Belgio:

Eldonejo-librejo "Sonorilo"
Doornstraat, 22
B-2610 Wilrijk
P.C.K. 000-0152140-44
BBL 320-0342460-23

Brazilo:

George Otto Vaske
Rua Esperanto S/N
95760 Cai RS

Marcelo Urbano Ferreira
Caixa Postal 5888
01000 Sao Paulo SP

Britio:

Brita Esperantista Asocio
140 Holland Park Ave.
London W11 4UF

Ĉilio:

Ivan Mattig G.
Casilla 13828
Santiago

Danlando:

Eldonejo KOKO
S-ino Edith Jensen
Post Box 952
DK 2400 Kopenhago NV

Finnlando:

Finna Esperanto-Librejo
PL 221
SF-70101 Kuopio 10
Pgk KU 152801-5

Libra Mendoservo Esperanta
Kivistontie
SF-05510 Hyvinkaa 51

Francio:

Union Francaise pour
l'Esperanto
4 bis. Rue de la Cerisaie
75004 Paris
C.C.P. Paris 855-35

Editions Francaises
D'Esperanto
11, rue Paul-Vergne
47200 Marmande
C.C.P. 309.00F Bordeaux

FR Germanio:

Libro-servo de LEA/G
S-ro Gerhard Kunze
Panoramastr. 25
D-7290 Freudenstadt 1
P.C.K. 465 64-705 Stuttgart

Sarlanda Esperanto-Ligo
Schulstr. 30
D-6601 Scheidt
P.C.K. Saarbrücken 5358-663

S-ro Peter Zilvar
Grubenhagenstrato 8
D-3420 Herzberg
Postĉekkonto: KTO
441176-304
ĉe Postscheckamt Hannover

Esperanto Eldonejo
Palatina kklr
Iggelbach
Schlossgasse 30
D-6371 Elmstein
Bankkonto Raiffeisen-
kasse
Esthal eG 106364 (BLZ
546 662 40)

Grekio:

D-ro St. C. Anagnostakis
P.O. Box 3505
Athens

S-ro Kimon G. Eliopulos
Esperanto-Oficejo
"Eŭoro de Esperanto"
P.O.B. 32
Nova Smirna, Attiki.

Hispanio:

S-ro Felix Gomez Martin
str. Corbeta 8, 5° A
Madrid 22.

Irlando:

S-ro Christopher Fettes
St Columba's College
Rathfarmham
Dublin 16.

Islando:

S-ro Baldur Ragnarsoon
Sogavegur 170
108 Reykjavik

Italio:

Itala Esperanto-Federacio
Via Villoresi 38
I-20143 Milano
P.C.K. 3/34154

Japanio:

Japana Esperanto-
Instituto
Waseda 12-3
Sinzyuku-ku
Tokio 162

S-ro Takenaka-Gisuke
28, Zikken'ura
Nisibiwazima-tyoo
Aiti-Ken 452

S-ro Tokuda Rokuro
9-1 Mizuochi
Shizuoka 420

Japana Esperanta
Librokooperativo
Sone-higasi 1-11-46-204
(Kobori Mansion Toyonaka)
Toyonaka, Oosaka-hu

Jugoslavio:

Tomo Plačkovic
P. Fah 90
52001 Pula

Ivan Bratos
Meljska c. 38
62000 Maribor

Marinko Gjivoje
41040 Zagrebačka Dubrava
P.P. 25

Zivko Milojevic
Sindjeliceva 21
32300 Gornji Milanovac

Milorad Djurdjevic
Vuka Karadzica 9
11300 Smederevo

Tovornik Martin
Esperanto Societo
63250 Rogaska Slatina

Voĉo
Skolska ul 25
56227 Borovo

Spomenka Stimec
Amruseva 5
41000 Zagreb

Kanado:

Esperanto Press
R.R. 1. Balilieboro
Ontario KOL IBO

S-ro W.D.B. Hackett
40 St. Hilda's Ave
Toronto, Ont. M4N 2P4

Kolombio:

Mario Ortegon E.
Calle 14 1-23
Bogota

Gonzalo Bermudez R.
Apartado Aereo 27625
Bogota 1

Luksemburgo:

Luksemburga Esperanto-
Asocio
S-ro Wickler Albert
1, rue de Kehlen
L-Olm
P.C.K. Luxembourg
8636-12

Malto:

Malta Esperanto-Societo
S-ro Carmel Mallia
89 Sanctuary Str.
Zabbar

Madagaskaro:

Rabevazaha Desire
B.P. 3171
Antananarivo

Nederlando:

Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
P.C.K. 378964

Saĝa respondo

Pentritaj de Cheng Hanzhong

SPRITAĴO DE LA ANTIKA ĈINIO

- ① En Song-dinastio estis politiki-
kisto. Lia filo estis tre saĝa,
kiun oni nomas mirinfano.



①



②

- ② Foje gasto donacis al li cervon
kaj riveran cervon (*Hydropotes inermis*),
kune fermitajn en sama kaĝo.

- ③ La gasto volis provi lian ta-
lenton kaj demandis: "Kiu
estas cervo kaj kiu rivera
cervo?"

- ④ Ĉar la infano antaŭe ne vidis
cervon, nek riveran cervon,
tial pripensinte momenton li
respondis: "Rivera cervo estas
apud la cervo kaj la cervo
apud la rivera cervo." La
respondo mirigis ĉiujn ĉes-
tantojn.



③



④

Libroservo FLE
S-ro R. Kwantes
Marnixstr. 57
2023 RB Haarlem

Norvegio:

Eldonejo Esperanto A.S.
Box 942, Sentrum
Oslo

Norvega Progresema
Esperantista Asocio
S-ro Egil Osmundsen
Poŝtkesto 103
4032 Gausel

Nov-Zelando:

LIBROFAKO de NZEA
-ro H.W.R. Petersen
180 Oneyu Road
Lyall Bay, Wellington 3

Portugallio:

Portugala Esperanto-Asocio
Rua Dr. Joao Couto
No. 6, R/C A
P-1500 Lisboa

Svedio:

Eldona Societo Esperanto

216 11 Malmo
Pgk 59 67 68-2

Esperanto-Skolan
Barnhusgatan 8, o.g.n.b.
S-111 23 Stockholm C.

Svislando:

S-ro Otto Walder
Esperantoweg 10
CH 8590 Romanshorn

Usono:

Esperanto League for
North America

P.O. Box 1129
El Cerrito, CA 94530


S-ro Bern Wheel
BOOKS
834 Wenonah Ave.
Oak Park, IL 60304



LA HISTORIA MITA
BALETO

“Feniksoj Ekkantas sur la Monto Qishan”

Fotoj de CAI HAIFENG




Daji ĉagreniĝas, ke ŝi baldaŭ mal-
kaŝiĝos en sia propra formo.

Daji . koketas
la reĝon Zhou.

La reĝo Wu kaj liaj servistinoj
dancas por celebri sian triumfon.





LA ANTIKVA
ĈEFURBO XI'AN

(I)

Antikvaj konstruaĵoj en Xi'an


Fotoj de LAO BAI

Xi'an, kiu portis la nomon Chang'an en la antikveco, sin trovas en la nordokcidenta parto de Ĉinio kaj estas unu el la mondfamaj antikvaj urboj. De la dinastio Zhou (1122-770 a. K.), 11 dinastioj sinsekve prenis ĝin kiel sian ĉefurbon en la tempoŝanĝo de pli ol 1,100 jaroj. De la dinastio Han (206-220 p. K.) Xi'an fariĝis grava urbo por amikaj rilatoj inter Ĉinio kaj aliaj landoj, kaj ĝi estis la komenco de la fama Silka Vojo.


La sonorilturo en la urbocentro konstruiĝis en 1384. Ĝi en ligna strukturo havas altecon de 36 metroj.



La urbomuro konstruiĝis en 1370-1378. Ĝi estas longa je 11.9 kilometroj, alta je 12 metroj kaj supre larĝa je 15 metroj, kaj havas turojn sur ĉiuj siaj pordegoj.



La nuna Xi'an estas la ĉefurbo de la provinco Shaanxi. Ĝi havas areon de 2.295 kvadrataj kilometroj kaj 2.8 milionojn da loĝantoj. Ĝi estas fama pro siaj abundaj historiaj objektoj kaj raraj artaĵoj, kaj ĝi jam disvolvigis en la plej grandan industrian urbon kaj ekonomian centron en la nordokcidenta parto de Ĉinio. Ekde tiu ĉi numero ni aperigos fotoseriojn pri tiu ĉi urbo.



La pavilono Feixia sur la monto Lishan



La pagodo Dayan estis konstruigita de la fama bonzo Xuanzhuang de Tang-dinastio en 625 p. K. en la templo Ĉien. En tiu templo li tradukis multajn budhismajn sutrojn kaj konservis ilin en la pagodo. En 701 p. K. oni rekonstruis tiun kvinetaĝan pagodon en la sepetaĝan.

Statuoj ambaŭflanke de la vojo de la maŭzoleo Qianling — tombo de la tria imperiestro de Tang-dinastio Li Zhi (628-683 p. K.) kaj lia edzino imperiestrino Wu Zetian (624-705 p. K.)

